
# kiel diri...



**PRAKTIKA ESPERANTA FRAZEOLOGIO (5000 ESPRIMOJ)**


*Kompilis :*

**LENTAIGNE**

*Cercle espérantiste de l'Agenais*
***Laûte !*** * *F 47340 Laroque*
*1988 * 25 FF*

KUARA MILO

# kiel diri...?



PRAKTIKA ESPERANTA FRAZEOLOGIO (5000 ESPRIMOJ)

Kompilis :

LENTAIGNE

- Kompletigita reeldono de 1988 -

*Al la genia ZAMENHOF*
*Al Koloman KALOCSAY*
*Al Gaston WARINGHIEN*

*kaj al Masao KAKUO*
*dank'al kiu la kompilinto akiris*
*novan rigardon al ESPERANTO.*

La Esperantistoj
ellernu sian lingvon.

*Nia celo estas esence pedagogia. Ni deziras krei ĉe la uzantoj la bezonon uzi tute pretajn vortkonstruojn, kaj tiel helpi ilin atingi fluan parolkapablon laŭ vere zamenhofa stilo.*

*Por tio ni provizas ilin per materialo relative abunda, en kiu ili trovos verŝajne la eblon solvi multajn problemon.*

*Tiun materialon ni ĉerpis el la PLENA ILUSTRITA VORTARO*, el la PLENA GRAMATIKO kaj el DOMFABRIKO (6000 Frazeologiaj Esprimoj Hungaraj-Esperantaj) de CSISZAR ADA kaj KALOCSAY kun la permeso respektive de G. WARINGHIEN kaj de CSISZAR ADA, kiun ni varme dankas.*

*La esprimoj estas kliŝitaj dirmanieroj, sankciitaj de la uzado. Ili estas grupigitaj ĉirkaŭ 67 "ideoj" arbitre elektitaj, laŭ la gvidlinio :* ***asociado de la ideoj****, ĉiufoje kiam eblis.*

*Ĉu necesas diri, ke ĉiu povos, eĉ devos kompletigi laŭplaĉe per esprimoj pli konformaj al siaj bezonoj aŭ temperamento ? Estas tre konsilinde parkerigi kiel eble plej multe el la esprimoj. Tio estas ne nur dezirindaĵo, sed ankaŭ plezuro.*

*Oni konstante memoru, ke :* "Apprendre une autre langue, ce n'est pas mettre de nouvelles étiquettes sur des objets connus, mais s'habituer à analyser autrement ce qui fait l'objet de la communication."

Martinet (Eléments de linguistique générale)

(= *Lerni alian lingvon, tio ne estas meti novajn etiketojn sur jam konatajn aferojn, sed ja kutimiĝi je nova analizo de tio, kion oni volas komuniki.*)

*Ni esperas, ke* ***"KIEL DIRI...?"*** *estos utila helpilo por atingi tiun celon.*

------

* *Averto : Ĉirkaŭ 30 vortoj fontas el "Suplemento de PIV"*

Kelkaj rimarkoj :

1) Pri "neologismoj" : ni indikis ilin per citiloj. ("frida", "hasti"), sed ne konsideris kiel neologismojn la vortojn apartenantajn al "Poetiko" (ŝriki, friska).

2) La uzantoj eble bedaŭros ne trovi vortojn kiel : honoro, frua, ktp. Ili troviĝas dise en **KIEL DIRI...?**, nome : "honoro" en 8 lokoj ; "frue" en 11 lokoj, ktp. Cetere, la PLENA ILUSTRITA VORTARO (PIV) restas la baza verko, kiun oni nepre konsultu.

3) Pri la fidindeco de la enhavo de **KIEL DIRI...?** :
   a) La "6000 Frazeologiaj Esprimoj Hungaraj-Esperantaj" estis kontrolitaj de esperantistoj el 9 diversaj lingvoj.
   b) Nuraj aldonoj de ni :
   "Gazetara konferenco" (ofte uzata), "diski telefonnumeron" (laŭ WELLS, en "Jen Nia Mondo").

4) Pri la zamenhofeco de tre multaj esprimoj (ĉefe pri la figuraj) oni konsultu PIV.

5) Pri "5000" esprimoj, oni kalkulis jene : "afero kuranta, afero konata, afero malnova" = 3 esprimoj.

6) Konsilinda libro : Praktika Bildvortaro de Esperanto.

7) Konsilo : Substreku la esprimojn, kiuj al vi plaĉas.

Malsupre de ĉiu paĝo troviĝas la numero de la ĉapitro. Fine de la libro eblas konsulti detalan tabelon de la "Enhavo".

KOREKTENDOJ al **KIEL DIRI...?**

1/5 Prave punita, laŭmerite.
1/7 Balbuti pardonpeton
2/7 Sciigu al mi kiel la afero statas
4/11 Komasacio
6/16 Aerujo
6/19 Istmo
10/4 Prefere mi hakus lignon, ol
17/16 Proceso por eksedziĝo
30/2-a alineo: Senatente kunpuŝiĝi
30/3 Nazo: Ne montri eĉ la pinton
de la nazo
30/11 ŜULTRO : akselo
31/13 Konformigi dieton al la temperamento
36/10 Granda kvanto da aliaj lingvoj
37/25 Magistrato
38/5 Tredi kolorajn bidojn
52. 2-a linio: "Al dio plaĉu, sed sur
la diablon ne kraĉu"
60/5 Kio fariĝis, jam ne refariĝos
63/2 Vera kiel la sankta skribo
67/40 Ŝvebi

## 1 ADMONI - RIPROĈI - PARDONI

*"Ne hontu penti pri faro,*
*hontu persisti en eraro."*

1. Kia diabla petolulo! Fari diablaĵojn hejme, stultaĵojn. Fari la kutimajn malsaĝaĵojn. Fari malhonestaĵon. Elpensi, teksi, kulpi mensogon. Malobei. Transpasi malpermeson. Senkore konduti. Agresa tono./ Infanaĵo inda nenian atenton (= inda je nenia atento). Turbulenta.

Konduki iun sur vojo malbona. Agi sub la influo de ... Provi malgrandigi sian eraron. Ĵeti, meti la kulpon sur iun. Propeka kapro. Esti pura de peko. Havi blankajn manojn./ Kompreni la gravecon de sia kulpo. Tio estas (ne estas) mia kulpo./ Konfesi sian kulpon. Mi ne volas fari al mi aflikton pro tio. Tio kaŭzis al ŝi zorgojn kaj afliktojn.

Severa admono, averto. Esti ĉe la limo de sia pacienco. Puninda kulpo. Ho! senkapa malsaĝulo, stultulo. Perdi sian paciencon. Rigardu al mi en la okulojn. Mi ne bezonu diri duafoje./ Stultulo trovas ĉiam pli grandan stultulon, kiu lin admiras. Eĉ stultulo tion scias. Senfina estas la nombro de stultuloj.

Doni al iu malgrandan averton, averton ne fari tion. Patre admoni. Silenta riproĉo. Riproĉa rigardo./ Akraj riproĉoj. Pike riproĉi. Lavango da riproĉoj. "Skoldi".

5. Meriti riproĉojn, la vergon, vangofrapon, bastonbatojn. Pugvergi. "Brutale" trakti iun. Postuli bedaŭresprimojn. Fari al iu bonan lavon. Sapumi al iu la okulojn. Puni infanon per senigo de deserto. Ne atenti lian ploradon./ Justa puno. Brave punite, laŭmerite. Severa sed justa.

Ŝpari nek penon nek admonon. Fari al iu predikon pri moroj. Doni al iu moralinstruon, morallecionon. Instrui al iu kiel paŝi rekte. Doni virtan ekzemplon por iu. Ludi la virtulon. Preni ekzemplon de iu./ Malsaĝa amiko estas pli danĝera ol malamiko.

Vibrigi la internajn kordojn de la koro. Efika admono. Afabla vorto pli efikas ol forto./ Ĉiuj miaj admonoj

nenion helpis. Stultigi infanon per senĉesaj admonoj kaj riproĉoj./ Grumbli flanken. Murmuri tra la dentoj, en sian barbon. Forĵeti konsilojn. Malatenti la riproĉojn. Ne ami edifajn moralaĵojn. Akcepti la riproĉojn sen palpebrovibro. Balbuti pardonon. Pente bedaŭri. Bati sin sur la bruston (pentosigne).

Pardonebla eraro, kulpo. Mi pardonas kondiĉe, ke vi neniam plu kulpu tiun kulpon. Fari belajn promesojn. Preta forspongi la pasintaĵon. Pardoni ĝis plena forgeso. Li ne esperu pardonon. Mi bedaŭras mian severecon. Bonaj ekzemploj pli forte influas ol admonoj./ Tio ne helpos lin.

**Notoj :**

## 2 AFERO

*"En fremdan vazon*
*ne ŝovu la nazon."*

1. AFERO kuranta, konata, malnova; intima, tute privata; ĉagrena, delikata, tikla; esenca, akcesora, tute certa; honorkoncerna, ruze elcerbumita; glatigita, finita.

La afero : dependas de tio, ne brulas, ne urĝas, havas tempon, ne toleras prokraston; iras bone, glate, lame (= estas tubero en la afero; ĝuste jen la tubero!); estas en bonaj manoj, statas tiel, malsukcesis.

Alpaŝi rekte al la afero. Transiri al la afero. Li ne sciis, kiel li komencu la aferon. Ĝi prezentas sin sub favora aŭspicio. Esplori la aferon.

Rigardi la aferon de malĝusta vidpunkto. Vidi en ĉiu afero nur la malbonan flankon. Ĉiu medalo du flankojn posedas. El du malbonoj pli malgrandan elektu. Dilemo. Alternativo. Solvi alternativon. Ĉio dependas de tio, kiel oni konsideras la aferon. Afekti interesiĝon. La afero prezentas malfacilaĵojn, kelkajn avantaĝojn. Tiu cirkonstanco ĵetas plenan lumon sur la aferon. Ĉio alia estas literaturo, tute alia afero.

5. Teni ies aferon sur la koro./ Tio estas problemo, kies

solvo ne suferas atendon./ La afero, kiom mi komprenas, (kiom mi scias) okazis subite. La afero estas pli komplika, ol ke oni povus ĝin aranĝi per ... Dediĉi sian atenton al io. Mi turnas vian atenton sur tion, ke ... Per kio la afero lin tuŝas? La afero ne tuŝas min, mi staras ekstere./ Ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero. Kio min ne tuŝas, kuŝu kiel kuŝas.

Havi nenian moralan rajton miksi sin en tiun aferon. Tion postulas la intereso de la afero. La afero iras bone sen mia enmiksiĝado./ Ŝovi la nazon en la aferon. Zorgi pri siaj propraj aferoj. Zorgu pri vi kaj nenion pli./ Plenumi rolon en ia afero.

La afero ne marŝas per sepmejlaj botoj. Sciigu al mi kiel la afero staras. La afero estas jam sen tubero. Finita kaj glatigita. La rezulto estis tute alia, ol mi supozis, imagis. Tra la tuta lando ekondas granda intereso por tiu afero.

**Notoj :**

## 3 AGI - FARI

*Agu kun aliaj, kiel vi volas, ke oni agu kun vi.*

1. AGO arbitra, punenda, malbona, aŭtokrata. Agi bonfare, filantrope, maŝine, juste, noble, prudente, singarde, kolere, partie; por ies bono, por komuna bono, laŭ sia kapo, laŭ sia bontrovo, laŭ sia oportuneco, sub masko de virto, por sia propra intereso.

Planon teksi, plekti, ŝpini, efektivigi, realigi. Gigantaj projektoj. Projektoj, kiuj de realiĝo staras ankoraŭ malproksime; kiuj kirladas en lia kapo. Projektoj en aero. Konstrui kastelojn en aero, sur glacio. Ĥimeraj projektoj.

Preni sur sin la iniciaton de la afero. La ago sekvis la penson./ Iniciativo absurda, sensenca. Fari ion je propra risko. Mia plano estas tia, ke mi esperas, ke ĝi

bone fruktos./ Senfruktaj provoj. Havi videblan rezulton.

Alpreni ion al la koro (tutkore interesiĝi). Havi forton por fari ion./ Risorto, motivo de lia agado. Determini la motivojn de ago. Pesi la sekvojn de ago./ Okazu, kio okazos.

5. La celo povas esti atingita per du vojoj. Agi ŝultro ĉe ŝultro (kunlabori akorde). Veki dormantajn energiojn. Unueco estas la unua kondiĉo de sukceso. Ĉiu komenco estas malfacila. Komenco bona - laboro duona. Por efektivigi la planon, oni jungis ĉiujn fortojn de la lando.

Ataki novan taskon. Havi du ŝnurojn al sia arko (= plurajn rimedojn por sukcesi). Akomodi la rimedojn al la celo. Havi ĉiujn atutojn por sukcesi./ Solvi ĉion per unu fojo.

Havi plenan liberecon de agado. Lasi al iu liberan manon. Havi kubutliberecon./ Li volas agi laŭ sia kapo. Sekvu vian nazon (agi laŭ intuicio).

La afero nepre efektiviĝos, kiom ajn la inerciuloj batalus kontraŭ ĝi./ Transigi ideon al la instanco, kiu povas ĝin efektivigi.

Agu decide, energie. Preni la bovon per la kornoj. Havi medolon en la ostoj (= esti energia).
Ne parolu, sed agu. Granda parolisto estas duba faristo.
Helpu al vi, vin helpos Di'.

10. Kritiki estas facile, fari malfacile./ Atribui al iu malsukceson de la afero. Por nenio oni faras nenion. Kiel li agis kontraŭ mi, tiel mi agos kontraŭ li. Homo proponas, Dio disponas. Ĉiu ajn ne kapablas fari ĉion ajn.

**Notoj :**

## 4 AGRIKULTURO

*"Kia la semo, tia la rikolto."*
*"Printempo semas, aŭtuno rikoltas."*

1. GRUNDO riĉa, fekunda, sterila, kompakta, "loza", tralasiva (= permeabla), kruda, plugebla, sabla, torfa, argila, roka, ŝlima, malgrasa, arida.

Grundo taŭgas por vinberujo. Forta tero. Humo./ Konformeco de la kultivoj kun la grundoj. Hektaroj de semotaŭga tero. Tero: virga, fruktodona, fruktoporta.

Rotacio de kulturoj. Alterna kultivado. Lasi agron novalo (= sen kultivo). Dreni kampon. Ekspluati la teron. Intensa terkulturado.

Plugilo (nazo, koltro, soko, ŝutilo. Vidu PIV p.1270) (vidu: 12/2). La plugilo tranĉas, fosas sulkojn. Elplugi putrajn radikojn.

5. Prilabori la teron. Disŝuti grenon sur la kampo. Prisemi kampon. Erpi. Rulpremi. Sterni tavolon da sterko sur la tero. Sterki kampon. Malbone grasumita tero (grasumo). Azotaj sterkoj.

Spikoj. Kiam la vento blovas super la greno, ĉi tiu ondiĝas kiel maro. Prifalĉi kampon. Forki, stakigi garbojn./ Stoploj. Draŝi: draŝilo, draŝrulo, draŝmaŝino. Kombajno.

Tero promesas riĉan rikolton. Tero abunda je rikoltoj. Jaro de abundeco. Superabundi je greno./ "Magra" rikolto. La malfrueco de la rikolto. La malbona vetero malfruigis la rikolton.

Hojo. Erpilo. Rultrabo. Skarifikilo. Traktoro. Motorizita kultivado. Rakĉaro (kun flankaj rakoj. Timono). Furaĝĉaro./ Ŝedo. Apogŝedo. Alero.

La agrikulturaj ekspluatantoj. Fari akiron de bieno. Ekspluati bienon. Retiriĝi sur sian bienon. Bieno. Bienulo. Farmanto (= farmulo). Havi en farmo. Farmopago. Farmi je duono (= donante al la proprietulo la duonon de ĉiu rikolto). Kontrakto pri farmoluo. Farmobieno. Grandbieno. Bienservantoj. Servutuloj./ Etbieno. Hubulo./ Kolĥozo. Kibuco. Katastro. Terimpostoj./ Hipoteko./ Uzukapo. Servitudo de trapaso./ Cisrivera kampo.

10. Asekuri agrikulturiston kontraŭ veterplagoj. Greno, vinbero batitaj de hajlo. La tero soifas (la radikoj suĉas la grandan humidon).

Komasocio (regrupigo de parceloj por faciligi la kultivadon per meĥanikaj rimedoj)./ Agrara krizo, leĝo, programo. Kampara sindikato, unuiĝo. Kooperativo.

Agronomia altlernejo. Magistro de agronomio. Inĝeniero pri agronomio. Agronomia eksperimenta stacio, parcelo. Selekti. Bredi. Eduki novajn variojn. Fermenta insilado. Naturigi planton en nova regiono. La valorigado de duondezertaj regionoj./ Disigi agrostemon je la tritiko.

VITO (= vinberujo). Rebo. Sarmento. Ĉiro. Grapolo. Vitŝimo (= peronospora viticola"). Bordoz-likvaĵo.

La lando vivas precipe el vitkultivado./ La ekstrema limo de la vinberkulturo, de vitkultivado./ Vita plantaĵo.

15. Pritranĉi fruktoportan vinberbranĉon. Rikolti vinberojn./ Blanka uvo. Rekomendi uvan kuracadon.

VINO : La mosto fermentas en la tino. Rekremento de vinberoj./ Vino laboras (= fermentas). Subĉerpi per sifono./ Spili barelon. Barelo "likas". La fundo de barelo (la senfunda barelo de Danaidinoj). Korki botelon. Maŝino por aŭtomata korkado de la ĉampanboteloj.

Unuaranga kvalito de vino. Fruktogusta vino, brando. Esti fiera de sia kelo bone provizita. Juna, maljuna, seka, delikata vino. Pura vino (= sen akvo). Via vino estas abomena acidaĵo.

Abomeni trinki akvon./ Provi vinon per gustumado. Jen vino, kiu havas korpon. Fajna, markhava vino. Ĉampano dolĉa, seka (= maldolĉa), glaciigita.
Moskatelo (= muskatvino). Klareto.

Falsi, adulteri, bapti vinon./ Distili. Alambiko./ Por vino bona ŝildo ne bezona. La vino gajigas la koron de homo. (Vidu: TRINKI). Vino dispozicias al dormo. Verŝi akvon en sian vinon (= kompromisemi).

20. *"Allogis la vinberoj/Sed estis tro alte"* *(fablo: Kalocsay)*
HORTIKULTURO : Ĝardeni. Ŝpati. Turni la teron. Semi legomojn laŭ linioj. Prikli. Buti terpomojn. Sarki (hojo)

Ĝardeno invadita de herbaĉoj. Ŝprucigi insekticidon, herbicidon sur plantojn./ Fruas la printempo : fruas la legomoj. Fruaĵoj.
Akvi. Aspergi. Irigacii (fenomeno de kapilareco). Partero. Bedo. Platbando./ Kompoŝto. Mulĉo./ Ĉarumo./ Ĉifonfiguro (birdotimigilo).

"HORTO" (ĝardeno de fruktarboj). Multobligi vegetaĵon: markoti, grefti, stiki). Ĵosi. Ŝosi. Draĵo. Maturaj, fruaj fruktoj. Fruigi la maturecon de fruktoj per artefarita prilumado./ Estos fruktoriĉa Septembro. Pomarbo (= pomujo). La frukto de pomvario Ruĝa Melba havas ruĝan vangon. Malfruaj piroj (maturiĝas post la ceteraj). Grajnoj de pomo, de vinbero. Kerno de nukso.

**Notoj :**

## 5 AĜO - JUNA - MALJUNA

*"Juneco ne scias, maljuneco ne povas."*

1. AĜO :Kian aĝon vi havas? Kia estas via aĝo? Kiom vi aĝas? Kiomjara vi estas? Kiom da jaroj vi havas? Kiam vi naskiĝis?

Mi estas 18-jara. Mi havas 18 jarojn. Mi estas 18 jarojn aĝa. Li atingis la aĝon de 60 jaroj. Li nun aĝas 60 jarojn. Li havas la aĝon de ĉirkaŭ 25 jaroj. Por sia aĝo, ŝi estas ankoraŭ sufiĉe juna./ Aĝulo de unu monato.

Zamenhof naskiĝis la 15-an de Decembro 1859 (15.12.59/ 14.04.17). Washington estas naskita la 22-an de Februaro 1732. Koran dankon por via amika gratulo al la datreveno de mia naskiĝo./ Ne havante eĉ plenajn 46 jarojn, mi ...

Li estas samaĝa kiel mi. Samaĝuloj. Esti je unu jaro pli juna ol iu. Personoj de diversaj aĝoj.

5. JUNA : Li ĵus elrampis el la ova ŝelo. Havi ankoraŭ lakton sur la lipoj. En la floro de la juneco. Esti en floranta, delikata aĝo. Eraroj de juneco kaj manko de pripenso. En lia frua aĝo. Juna kaj varmegsanga./ Huligano./ Uragana juneco.

MALJUNA : Konservi sian junecon. Vi ŝajnas almenaŭ tiel juna, kiel... Ne ĉiam per la aĝo mezuriĝas la saĝo. Amare bedaŭri la perditan tempon de la juneco, la forpasintan junecon. Jam de longe forflugis mia juneco. Forkuras, forflugas la jaroj. (Vidu: TEMPO kaj VIVO 66/3,4)

La aŭtuno de la vivo. Ĉe la sojlo de la maljuneco. En la daŭro de kelkaj semajnoj li maljuniĝis je pluraj jaroj. Faltoj maljunulaj. Velkoŝrumpa maljunulino. Kurbiĝi, klinita sub la pezo de la jaroj. La aĝo kurbigas./ Ĉagrenoj maljunigas. Pagas la maljunaj jaroj por junaj eraroj.

Oni devas lernigi la infanojn montri indulgon al la maljunuloj. Honori la maljunulojn. Ne malŝatu vian patrinon, kiam ŝi maljuniĝos.

Profunda aĝo. Tremanta, kaduka korpo. Homoj kadukiĝantaj morale kaj mense. Menskadukeco. Kadukulejo. Seniliĝo. Reinfaniĝi./ Li mortis profundaĝe.

10. Infaneco. Adoleskanteco. La malfruo de adoleskiĝo. Adolto. Prapatroj.

**Notoj :**

## 6 AKVO - RIVERO - MARO

*"Ne moku riveron, ne atinginte la teron."*

1. AKVO pura, distilita; mola, malmola, "dura"; sala, saleta, sensala (dolĉa). Akvo: lavenda, Kolonja. Akvo hipoklorita. Akvo peza. Akvon filtri, distili.

Bori puton. Fonto abunda je akvo./ Aspergi. Irigacii. Akvi. Akvumi ŝtofon (por gladi)./ Akvedukto./ Akvodukto (por distribuo de akvo en urbo).

Esprimoj : Multa akvo defluos ĝis tiam sub la pontoj (= pasos longa tempo ĝis ...)/ En akvo malklara oni fiŝon kaptas facile (= profiti el senorda situacio). Ĉi tio fluas kiel akvo el fonto./ Ĝi estas akvo al lia muelilo./ Ĵeti malvarman akvon sur ies entuziasmon./ Brogito eĉ sur (malvarman) akvon blovas. (= korniko vundita propran

voston timas)./ Barakti kiel fiŝo ekster akvo./ El malgrandaj akveroj (= gutoj) fariĝas grandaj riveroj (= per etaj ŝparoj oni riĉiĝas)./ Egalaj kiel du akvogutoj.

Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan.

5. RIVERO : fonto, fluejo (kuŝejo), kunfluejo, enfluejo, alfluanto, meandro, kubuto. Riverbrako. Estuaro. Delto. Rivero havanta 200 kilometrojn da longo. La kuro de la rivereto. La lando abundas je riveroj. Regiono riĉa je riveroj. Alvale de ...; almonte. La rivero defluas de la monto./ Akvodislimo.

Reguligi la fluon de rivero per digoj. La rivero rompis siajn digojn. La rivero rulas ŝtonojn./ Dragi. Dragilo.

Printempa riveraltiĝo (pro degelo). La inundo penetris en la landon ĝis profundo de kvar kilometroj. La inundo atingis la nivelon de la unua etaĝo. La nivelo de la rivero malkreskis. La detrua povo de la akvoj. Kluzo. Kluzisto./ Ponto. Gardrelo.

Havi piedtenon. Perdi la grundon sub la piedoj. Akvo alta ĝis la genuoj. Travadi la torenton (kiu ŝaŭmas). Transiro de vadejo kun sekaj piedoj. Vadbotoj. Li trapasis la vadejon, ĝistalie en la akvo.

10. La rivero ridis sub la suno./ Malakuta murmuro de rivero. "Rojo" "lirlas".

MARO serena, senventa, milda, glata; malkvieta, ŝtorma. Interna maro.

La maro (forte perturbata) ŝtormas, ĵetadas altajn ondojn, malkviete ĵetiĝas sur la teron. Ondoj kovritaj de blanka ŝaŭmo. La ondiĝoj de la akvo. Vento plugis grandajn ondojn. Maro rulas ondegojn sur la bordon. La ondoj elĵetis korpon sur la bordon./ La maro aspektis el oleo.

Rulo. Hulo. Surfo./ Ŝlifŝtonoj. Ĉiuj ŝtonoj estis ŝlifitaj kaj glatigitaj de la maro (erodi)./ Barumo.

Someraj stacioj ĉe la marbordo. Plaĝo (= strando). Kajto. Somerumi. Sin bani. Preni banon ĉe la marbordo. Naĝi sub akvo./ Plonĝi. Akvotreti. Padeli. Plaŭdi. (vidu : SPORTO).

15. Droni. Reanimado de droninto. Aeroforo. Savbuo. Savjako. Ĵeti ŝnuron al dronanto. Dronanto domon proponas, savito eĉ brikon ne donas. Dronanto eĉ herbeton kaptas avide.

Esplori la oceanajn abismojn./ Aereujo./ Ranhomo. (Vidu : DIMENSIO).

Fiŝo. Fiŝi. Fiŝisto (= profesiulo). Vergo, fiŝkano, fiŝfadeno, hoko. Provizi la hokon per logaĵo./ Submara ĉaso. Kombineo. Fiŝhoki. La fiŝo estas hokita./ Barakti kiel fiŝo ekster akvo.

Estis tro multe da haringoj; oni ĵetadis ilin returne en la maron.

La bordo faras golfon./ Insulo. Markolo. Itsmo. Kabo (La Norda Kabo). Rifo. Klifo. Tajdo: fluso, malfluso. Amplekso de la tajdo (malaltmaro).

**Notoj :** Stavo.

## 7 AMI - MALAMI

*Amu vian proksimulon kiel vin mem.*

1. AMO blinda, arda, fajra; papilia, trompita, sekreta, senfina.
Ama bileto, frenezo, rilato(j), ekstazo.
Ame rigardi, flegi, prizorgi.

Ami filon, amikon, hundon./ kafon, liton, honoron, laboron, ĝuon, la novon.
Ami danci, promeni, ŝerci, fanfaroni.
Amo : al la paco, la libereco, la proksimulo.

Ami plej kore, el la tuta koro, fajre./ Havi por iu grandan simpation. Amu unu la alian.

Flamiĝi, bruli, ardi pro (de) amo (dezirego) al (por) iu. Boli de pasio. Senbrida pasio. Blindigita de pasio. Konfesi sian amon al iu. Tiu juna homo estas furioze enamiĝinta en vin.

5. La amo estas blinda. Esti je genuoj de virinoj (ŝia sklavo). Oni ne facile forgesas sian unuan amon./ Aŭbado.

Ĉio estas aminda en ŝi. Ŝi unuigis en si la ĉarmon kaj la saĝon. Havi idealan, dian belecon. Nekompareble bela. Bele tornita knabino. Pli ol bela : belega. Virino tiel bela, kiel povis krei nur la naturo. La bela sekso. Konscii sian belecon./ Ŝi estis tute alia, ol kiel li ŝin imagis al si./ Li ne atentas la ĉarmon de virinoj. Amindumi lindulinojn.

Ĵeti sur iun avidan rigardon, okulon de deziro. Fari al iu la amajn okuletojn. Okulumi kun iu. Flustri dolĉaĵojn al koketulino. Kolombumi.

Unuavide enamiĝi al iu. Enamiĝinta ĝis la oreloj. La amo estas tiel forta kiel la morto./ Novaj, ĝis nun ne konataj pensoj atakis la kapon de la juna virino. Li amis kaj estis amata./ Amkunveno.

Ludi amon kun ies edzinoW. Ankaŭ ŝi ne estas indiferenta kontraŭ mi. Ŝiaj okuloj spegulis ŝian amon. Fajro ŝprucas el ŝiaj ardaj okuloj. Fari deklaron (konfesi sian amon) al dezirinda, fascinanta belulino.

10. Li ĵuradis per la ĉielo kaj la tero, ke li amos ĝis la morto./ La viroj ne havas konstantecon (en amo). Li ĉiam alvenas malfrue ĉe la rendevuoj. Ĉiu "li" havas sian "ŝi"./ Fari al iu amuzaĵon. Preni unun kaj ami la alian: malhonoro!/. Papiliumi./ Alkroĉiĝi al ŝi kiel lapo.
Ŝteli kison. Doni, ricevi kison. Kovri iun per kisoj.

For de la okuloj, for de la koro./ Rompi kun sia amatino.

MALAMO : arda, surda.
Teni malamon kontraŭ iu. Plena de malamo kontraŭ iu. Ne eternigu vian malamon.

Havi kontraŭ iu antipation naturan./ Mi ne amas la homojn duvizaĝajn. Antipatii la fanfaronulojn.

Elverŝi sur iun sian galon, mishumoron. Havi pikeman, malican langon.

15. Senti abomenon al iu./ Intergenta, interrasa malamo. La rasa antipatio.
Ksenofobio. Rasismo. Rasaj persekutoj. Antisemito. Pogromo. Kastaj antaŭjuĝoj. Rasa diskriminacio. Atmosfero saturita de genta malamo. Amasbuĉado de la judoj. La hebreoj suferis jarmilan martirecon./ La malplimultoj

estas apenaŭ toleratаj fremduloj. Apartismo. Segregacio. Aboliciismo. Mestizo. Mulato.

**Notoj :**

## 8 AMIKO - MALAMIKO

*"Amiko de amiko estas ankaŭ amiko."*

1. AMIKOJ komunaj, fidindaj, nedisigeblaj, intimaj, ĉiamaj. Amika konsilo, helpo, riproĉo, rilato(j).

Amikiĝi kun (al) iu. Neglekti, malzorgi, perfidi amikon. Amiko en malgajaj tagoj, en ĝojo kaj en ploro. (Vidu : FELIĈO). Vivi en en mirinda simpatio. Reciproka simpatio. Amikon montras malfeliĉo.

Malfermi siajn brakojn al amiko. Per signo de amikeco. Esti en amikaj rilatoj kun iu. Sigeli amikecon.
Honori iun per sia amikeco./ Konsideri iun, havi iun kiel amikon. Unu amiko mia./ Aro, areto da amikoj, da "kompanoj"./ Diru al mi kun kiu vi havas rilatojn, kaj mi diros al vi, kiu vi estas.

Dum vi estas feliĉa, vi havas multajn amikojn. Donacetoj subtenas amikecon. Kiu akceptas donacon, tiu sin katenas. Cedi al insista premo de kelkaj amikoj.

5. Amiko kara, sed mi mem pli kara./ Malkonfesi amikon. Gardu min Dio kontraŭ amikoj, kontraŭ malamikoj mi gardos min mem./ Al amiko tro nova ne fidu./ Pomo de malkonkordo (kiu naskis disputon). Semi malpacon.

MALAMIKO. Akiri malamikon. La disputo estis kaŭzita simple de miskompreno. Disputi kun iu pri io. Disputo kondukas al malpaco./ Malamikiĝi kun iu./ Abrupte turni la dorson al iu. Vivi kiel hundo kaj kato./ Ĝoji (aŭ: ne ĝoji) pri la malfeliĉo de malamiko. Fali en la manojn de malamiko. Ne deziri ion eĉ al sia malamiko. Ne taksu vian malamikon tro malforta. Li estas tia malamiko, kun kiu oni devas kalkuli./ Eĉ se ne kun mi, sed ne kontraŭ mi.

Al malamiko en kuro faru ponton kun plezuro. Ĉesigi malamikecon. Pardoni al malamiko lian kulpon. Noble

pardoni ofendon. Etendi al iu manon de paco.

Li ne esperu pardonon./ Venĝi amikon. La afero krias venĝon. Ĵuri venĝon kontraŭ iu. Venĝi sin por io kontraŭ iu. Reblovi en iu la fajron de l' venĝo.

**Notoj :**

## 9 AMORO - SEKSO - PUDORO

*Kiu el vi estas senpeka,*
*tiu unua ĵetu al ŝi ŝtonon.*

1. La karno estas malforta. Homo ne estas el ligno sed el karno./ Atakis lin furioza puŝo de pasio. Cedi al siaj pasioj. Sekvi siajn naturajn inklinojn. La impulso estis pli forta ol lia volo./ Perforti virinon.

Deziro, instinkto karna, bruta, volupta, arda. Sekslogo. La plezuroj de la sensoj. Sensama, voluptama.

Esti novico ĉe la virinoj. Havi feliĉon ĉe la virinoj./ Malfeliĉa je amo./ Li estis belulo kaj turnis la kapon al virinoj, malsaĝigis ilin. Ĉiuj virinoj cedas al li. Deturni iun de la ĝusta vojo. Lasi sin delogi./ Vera diablo kun la virinoj.

Havi kun ŝi tre vivan flirton. Palpi ies korpon per malĉasta tuŝo. Sub ŝajno de pieco, li palpas la virinojn. Ĝis tie, kaj ne plu. Facila virino. Ne akirebla virino. Elegantulino : nura pupo.

5. Luli la koksojn por altiri la rigardon de la viroj. Belkoksa, belpuga virino (AFRODITA). Apetita, dezirinda belstatura belulino. Pimpa virineto./ Sin dekolti malavare.

Kuŝi kun iu. Dormi en la brakoj de virinoj. Sin doni al ŝi. Bruli de dezirego. Deŝiri por si la floron de la plezuro. La kaliko de l' plezuroj.

Frotemulino./ Varma, amorveka, voluptema virino, temperamento. Voluptavida brusto. Ĝui, spici la

volupton. Venu, ni ĝuu volupton ĝis la mateno. La spasmoj de la volupto. SEKRETAJ SONETOJ.

Frivola, skandala konduto. Diboĉa, senbrida vivo. Ŝi ne estas virtmodelo. Vivi en atmosfero de malvirto.

Lasciva. Obscena. Perversa. Malpruda. Erotika. Amindumi. Flirti. Amori, kopulacii, seksumi, koiti (interrompita koito kontraŭnatura), fiki (triviala vorto). Sodomii, bugri (triviale). Masturbi. Ejakuli.

10. Sekso vira, maskla; virina, femala. La tria sekso (samseksemuloj). Transseksismo.
Peniso, "kaco" (kacujo). Glano. Prepucio./ Erektiĝo. Skroto, testikoj (suspensorio). Spermo, "ĉuro". Komplekso pri kastriĝo. Eŭnuko. ABELARDO. Vulvo, "piĉo". Klitoro (ekscizo). Vagino. Utero./ Lipoj. Himeno (deflori)./ Mamo. Cico. "Bideo". Monataĵoj (menstruo). Menopaŭzo.

Volupto. Orgasmo. Spasmo./ Afrodiziigaĵo./ Impotenta.

Depravacio. Safismo. Lesbanino. Pederastio (njo-knabo). Vuajerismo (skopofilio). Onanismo.

Venerologio : Sifiliso (heredosifiliso; ŝarĝita heredeco). Blenoragio (= gonoreo ; BIBLIO, Lev.15). Mola ŝankro./ Kondomo.

Bordelo, malĉastejo. Prostituitino, ĉiesulino, putino. Senlicenca prostituado. Iradi sur la stratoj./ Prostituisto./ Hetajro. Meretrico.

15. PUDORO : Ofendi, atenci ies pudoron, la honoron de virino. Ataki la virton de virino. Sekshonto. Honti antaŭ iu. Ruĝiĝi pro (de) honto. Neatakebla virto.

Ĉasta, frigida, virta, deca, virga, pruda virino. Rigidmora, severmora homo.

Ha! kviete, mi ne amas la palpistojn, la fingrumantojn. Ĉio devas havi limojn./ Forĵeti indigne malhonestan proponon. Mi kredis, ke vi havas la plej honestan intencon. Malkovri, riveli siajn intencojn. Virina honoro. Ŝia rifuzo estis atendebla. La naiveco kaj neniosciado de virgulino.
Konservi, perdi, oferi sian virgecon. Deflorado (perfingra ĉe certaj triboj komisiita al maljunulinoj). Perdi sian kroneton.

Forlogi virtulon al vojo malbona. Devojiĝi de la virta vojo. Fanatike persekuti la sekspekantojn.

**Notoj :** Spermicido.

## 10 ARBO - LIGNO

*"Laŭ la frukto oni arbon ekkonas."*

1. Trunko. Jarringoj (= sukringoj). Ŝelo. Alburno. Basto. Medolo.

Kaverna arbo. Centjara, fulmobatita kverko. Alta kiel cedro. Forta kiel kverko. Kurteno da arboj. Vojo borderita de arboj. Lozanĝe plantita arboparko. Duobla linio da arboj.

Fleksu arbon dum ĝia juneco. Pli bone fleksiĝi ol rompiĝi. La arboj lin malhelpas vidi la arbaron. Altan arbon batas la fulmo.

Dehaki branĉon de arbo. Dehaki kverkon. Dehakitaj arboj. Unu hako arbon ne faligas./ Dishaki kverkon, ŝtipon en splitojn. Haki brullignon sur bloko./ Ligno estas bona brula materialo. Prefere mi hakis lignon, ol...

5. Bloko el ligno. Ŝtipo (de ŝuisto, de amboso)./ Ligno imuna kontraŭ la fajro./ Flosigi trunkojn al segejo.

Ŝiprompaĵa ligno./ Kructavolita ligno. Plaki (mahagonon sur popla tabulo)./ Vermotrua ligno. Segi. Raboti. Torni. Turbi. Ne el ĉiu ligno oni faras violonon.

ARBARO densa, nepenetrebla, neekspluatebla. Arboporta ĉarego.

Forsto. Forstisto. Forstadministracio. Reforstumi. Recepi. Arbarizi; arbarumi la nudajn montojn.

10. Koniferoj : pingloarbo.
Pino. Piceo. Cedro. Abio (strobilo = konuso). Lariko. Cipreso. Taksuso.
Kverko (glano). Fago. Poplo. Platano. Tremolo. Betulo. Saliko./ Heveo. Mahagono.
Akacio (branĉeto de akacio estas unu el la framasonaj

emblemoj).
"Abio vi, Abio vi, Kun foliar' daŭrema". Kristarbo.

**Notoj :**

## 11 ARMEO

***"Kiu ne estis kaporalo, ne estos generalo."***

1. Armeo forta, konstanta, profesia, volontula. Ter-, aer-, mararmeo. Teraj, aeraj, maraj fortoj. Militfloto. Aerfloto./ Kontingento de la armeo.

Servi sian patrujon. Devigo de militservo. Sangimposto. Rekruti. Konskripcio. Konskripto. Rekrut-ekzameno./ Soldulo.

Kazerno. Militista disciplino. Soldati. Esti sub la armiloj./ Aktiva militservo. Rezervist(ar)o.

Komandoj : Marŝ'! Halt'! Front'! Dekstren! "Liven"! Antaŭen! Al kune! Po ses en vicoj. Al la armiloj! Densigu la vicojn! La ordonoj estas plenumitaj.

5. Apelo. Soldato en forpermeso. Pikedo. Saluti per kunmeto de la kalkanoj. Kunklaki la kalkanumojn. Saluti milite. Teni la manon laŭlonge de la kruroj.

Marŝi po du en vico, laŭkolumne, laŭvice, takte. Defili parade: tamburo kadencis la marŝon de la trupo. Anserpaŝo.

Sentinelo. Gardostara budo de soldato. Preni sian gardon. Garde deĵori.

Ekzerci soldatojn. Pafi senkugle./ Malstifti grenadon.

Fusilo (vidu PIV p.1276) : ĉano, kolbo. Bajoneto. Rako./ Fusilo, kiu trafas ĝuste. Mitral(et)o.
Surŝultrigi fusilon. Traŝultre. Baltee.
Kanono : rapidpafa, kanelita, retiriĝa. Afusto, faŭko, tubo. Efika trafdistanco de kanono. Kalkuli la trajektorion de obuso./ Kalibro.

10. Rangoj: (Epoleto). Oficiro, sub-oficiro. Servosoldato. Generalisimo. Marŝalo. Brigada, divizia, korpusa generalo. Kolonelo (komandanto de regimento). Kapitano (komandanto de kompanio). Leŭtenanto, vic-leŭtenanto (sub-...) (plotono). Serĝento. Kaporalo. Bona kaporalo revas esti generalo (rajtas esti ambicia).

Admiralitato. Admiralo (eskadro). Fregat-, korvet-, veselkapitano. Komandanto de torpedŝipo, destrojero, krozisto.

Perdi siajn galonojn. Degradi oficiron. Promocii iun leŭtenanto.

Artilerio : malpeza ("leĝera"), peza, longtrafa, kontraŭaviadila, atoma, surŝipa, fortikaĵa, montara, surrela, sieĝa.

Infanteri(an)o: Tiraljoro. "La Fremdula Legio". Taĉmento de kavalerio flankis la infanterion.

15. Kampanjo. Koloniaj kampanjoj. Komandi armeon. Resti garnizone en urbo. Bivaki. Kantonmento. Depoto. Provianti armeon. Proviantadministracio.

Akceli la marŝon de la trupoj. Sturmaj, freŝaj, aerportataj kirastrupoj (blenditaj tankoj)./ "Avano"./ Skolto.

Liniotrupoj. Bataliono ordigita laŭ tri linioj. Deploji regimenton. Batala formacio./ Manovri. Ŝirmi la flankon de marŝanta armeo. Eviti embuskon. Kvadratigi batalionon. Kvadrato.

Bazo, tereno de operacoj. Bilanco de la operacoj. Pretigi sin al batalo. Enfili. Desfili. Gvidi sian armeon al gloro. (Vidu: MILITO). Ekipi armeon per aviadiloj./ Ĵipo.

Napalmo. Atombombo. Misiloj. Bazo de raketoj. Atomnuklea armado. Serĉa kapo de raketo. Nova, sekreta armilo. Glavo de Damoklo. Ni estas devigataj havi grandan, potencan armeon.

Arsenalo. Municio. Pulvo. Obuso, kuglo, kartoĉo.

**Notoj :**

## 12 BESTOJ

*"Kiam la katoj promenas, la musoj festenas."*

BESTOJ : Vidu PIV, de p.1246 ĝis p.1256 (255 vortoj).

1. Ne turmentu bestojn.
Ĉasi : iri al ĉaso, reveni de ĉaso. "Batuo". Kurĉasi. Ŝtelĉasi.
Harĉasaĵo (leporo, kapreolo, ktp). Plumĉasaĵo (perdriko, ktp). Fiŝĉasaĵo.
Pafi ĉion, kion oni trovas./ Ĉasa fusilo./ "Bestio". Pafi paseron, kaj trafi anseron. Diana la Ĉasistino. Nimrodo.

BOVO : "Kripo"./ Remaĉi. Bovino havanta ventron ŝvelintan de gasoj. Melki la mamojn de bovino./ Brulstampi bovojn. Rigardaĉi kiel bovido./ Ne jungu la bovon malantaŭ la plugilon. (= Ne iru la fadeno antaŭ la kudrilo). Ekstaŭro (kastrita). Taŭro. Taŭrobatalo. Torei. Toreadoro. Areno./ Furioza taŭro.

ĈEVALO henas, baŭmas, "prancas", kalcitras, stamfas, karakolas, kapriolas; trotas (hot! hoto!), galopas, amblas, streĉas la orelojn, snufas de ekscito (virĉevalo = stalono).

Ĉevalo arda, fajra : beja, piga, ruana./ Krino. Jaraĝa ĉevalo. Strigli. Jungi ĉevalon laŭ ĝia trotado. Turni posten la ĉevalon. Piki ĉevalon per sprono. Konduki ĉevalon per la kolbrido. Trotigi ĉevalon. Instigi ĉevalon per vipo./ Ĝi deĵetis sian rajdanton. Desalti. Fali de ĉevalo. Ĉevalaj vetkuroj. Ĵokeo.

5. Brido (kaprimenoj, mordaĵo, kondukiloj). Lasi al ĉevalo la bridon sur la kolo. Kolbrido./ Surdorsigi selon al ĉevalo. Piedingo. Kur-, rajd-, selĉevalo. Tirĉevalo.

Hino (ĉevalo + azenino), mulo (azeno + ĉevalino). Poneo./ Pasterno. Fanono.
Hufo. Hufumo. Hufferi./ Hipofagio.

Rajdi sur ĉevalo, oni ne lernas sen falo.
Al ĉevalo donacita oni dentojn ne esploras.

ELEFANTO : Fari el muso elefanton (= troigi)

HUNDO bojas, jelpas, "hojlas", hurlas.
Hundoj terure hurlis, kvazaŭ morton antaŭflaris.

10. Hundo libera, ĉenita./ Hunda raso, vivo (mizera).
Azilo por perditaj hundoj. Hundo bojas, homo vojas. Bojanta hundo ne mordas (ne timu bojantan hundon). Bojas hundido, ĉar tiel faras hundo.
Por hundon dronigi, oni nomas ĝin rabia.
Al hundo ja "licas" rigardi episkopon.
La lastan el la amaso la hundo atakas./ Elpeli iun kiel favan hundon.

Luphundo. Levrelo. Spanielo. Vertago. Pudelo. Danhundo. Grifono. Spurhundo. Buldogo. Mopso. Miksrasa hundo.

KAMELO : Estas pli facile por kamelo iri tra trueton de kudrilo, ol por riĉulo eniri en la regnon de Dio.

KATO miaŭas, kraĉospiras, ĝibigas la dorson, buliĝas, ŝpinas ("ronronas"), faras velurpiedon.

Ekskato. Domedukita kato. Tegmentleporo (slanga nomo de migra kato).
Ne karesi la katojn kuspe, kontraŭ la haroj.
Fali ĉiam plandalsube kiel kato.
Kontentigi la katon kaj kune la raton.
Danci kiel kato ĉirkaŭ la poto.
BOTVESTITA KATO. (Vidu proverbon ĉekape).

LEPORO : Kiu ĉasas du leporojn kaptas neniun. Pafi samtempe du leporojn (atingi du rezultatojn) = Bati du muŝojn per unu bato.

15. LUPO : Oni konas lin kiel blankan lupon.
La lupino, kiu mamnutris Remon kaj Romulon. Ne enlasu lupon en la ŝafejon./ Lupo lupon ne manĝas. Inter lupoj, kriu lupe. Ne ĉio griza estas lupo./ Donu al la lupo iom, ĝi postulos ĉiom.

MUSO : Monto gravediĝis, muso naskiĝis.

PORKO gruntas. Muzelo.
Ĵeti perlojn antaŭ la porkojn (= esprimi altajn ideojn antaŭ malkleruloj).

ŜAFO : ŝafa lakto, fromaĝo, lano.
Milda kiel ŝafo. Rigardaĉi kiel ŝafo. Iri kiel la ŝafoj de Panurgo. Kiel anaro da ŝafoj post la kriemuloj (sekvi la antaŭirantojn). Ili estas blindaj kiel ŝafoj./ Paŝtu viajn ŝafojn. Grego.

SCIURO : Hejmigi sciuron, mungoton.

20. URSO : Antaŭ mortigo de urso ne vendu ĝian felon.

VULPO : Eĉ plej ruza vulpo falas en kaptilon.

KOKO : Kokino metas, demetas, ellasas ovojn, kovas. Ovo ĵus metita./ Beki grajnojn.
Brogi kokidon (por pli facile ĝin senplumigi).
Sentripigi kokidon.

HIRUNDO : Unu hirundo printempon ne alportas.

ABELO zumas.
Reĝino. Vir-, virinabelo. Kolonio da abeloj. Pikilo. Abela diligenteco. La mirinda instinkto de abelo. Senso de orientiĝo. Esameno. Edukado de abeloj.

Bredi abelojn. Nektaro. Miela ĉelaro. Ĉeloj el vakso. Abelkesto. Operkulo. Propoliso.
En abelujon ne blovu./ Abelujon ne incitu, amason ne spitu.

Vespo. Krabro. Burdo./ Meti la manon en vesponeston.
Talio kiel vespo. Nugato. Mielkuko.

MUŜO : Havi muŝon en la cerbo. Muŝo zumas en la kapo. Kalkuli muŝojn. Fari el muŝo elefanton./ Muŝpelilo.

KORVO : "La korvo por akiri plaĉon per sia voĉo grakis vante." (fablo de Kalocsay)

**Notoj :**

## 13 BLEKOJ - BRUOJ

1. Azeno iaas./ Bovo muĝas./ Ĉevalo henas./ Hundo bojas, jelpas./ Kapro mekas./ Kato ŝpinas./ Lupo hurlas, hululas./ Porko gruntas./ Ŝafo beas.

Akcipitro kriĉas./ Anaso kvakas./ Koko kokerikas. Kokino klukas./ Kolombo kveras, rukulas./ Najtingalo kantas./ Pasero pepas./ Rano kvakas. / Tigro, leono roras.

Cikado ĉirpas./ Muŝo zumas.

13 BLEKOJ

Glugli (akvo eliranta el botelo)./ Grinci (ŝlosilo en seruro) Klaki (vipo)./ Knali (krevanta balono)./ Knari (pordo, rado, neĝo sub paŝoj. Tondra krako)./ Lirli (rojo)./ Plaŭdi (ondoj)./ Sibli (serpento, kuglo)./ Soni (monero)./ Sonori (kristala glaso)./ Stridi./ Ŝriki./ "Ŝuŝi"./ Tinti (glasoj)./ Tumulti (popolo).

5. Rompobruo. Eksplodbruo. Paŝobruo. Bruo de "lika" poto. Frakaso. Muĝo. Hurlo.
Bruo metala, plaŭda, raspa, infera.
Malbrua tajpmaŝino. Fonbruo (fonbrua filtrilo).

Multe da bruo por nenio./ Pli da bruo ol da faro.

Mi silentos ĝis oni ne plu bruos./ La laŭtega muziko superbruis lian krion. Mallaŭta (= softa).

**Notoj :** Decibelo.

## 14 ĈIELO - SUNO - LUNO - STELOJ

*"Kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj egalas."*

1. ĈIELO : (vidu : RELIGIO)
Super ni pendis la pura ĉielo.
La nuboj kuris, vagis sur la ĉielo./ La miriadoj da steloj sur la nokta ĉielo./ La luno pendis alte en la ĉielo./ Ĉielarko. Sub libera, malkovrita ĉielo./ Esplori la aspekton de la ĉielo./ Se la ĉielo falus al la tero./ Firmamento.

Mi ekmovos la ĉielon kaj la teron (por atingi celon). (= strebi mane kaj piede).

SUNO : Sunaj makuloj./ Sensuna vetero, ĉambro. La disko de la suno.

Leviĝas la suno. Kiam komencos tagiĝi, mi... La matenruĝo. Flanke de sunleviĝo. La akurateco, kun kiu la suno leviĝas matene. Aŭroro./ Aŭroras nova epoko./ Krepusko (matena kaj vespera).

5. Suno estas baldaŭ subironta. La suno komencis subiĝi. La suno jam falas. En la momento de sunsubiro. La sunsubiro sub la maron.

De la sunleviĝo ĝis la sunsubiro (de oriento ĝis okcidento).

La suno ĵetis oblikve siajn radiojn./ Havi la sunon rekte en la okuloj. La radioj de la suno preskaŭ blindigis lin. La suno ne palpebrumigas min.

Sunumi al si la krurojn. Sin bani en la suno. Sin rosti sur la plaĝo. Sunbano. La suno bronzas la haŭton./ Teraso kun sunumejo. Brunigi al si la haŭton ĉe la suno. Sunbruno. Insolacio (= sunfrapo).

Pejzaĝo banigânta en la brilo de la suno. La suno brilis sur lin tra inter la branĉoj.

10. Aŭreolo. Haloo. Eklipso de suno (parta, totala, ringa). Diurno (la diurna movo de la tero).

Ekzistas nenio nova sub la suno.

LUNO : La fazoj de la luno : la unua, lasta kvaronluno; novluno; plenluno. La disko de la luno. La kreskanta, malkreskanta luno. Ĝi estas en stadio de malkreskado. Lunarko (krescento). La kornoj de la luno. La lunaj radioj./ La plenluno disvastigis lumon preskaŭ tagan. La luno arĝentis la tegmentojn, disĵetadis brilon kaj lumon. Ĉe la brilo de la luno.

Sendi raketon ĝis la luno. Retrokalkulado de la raketbruligo./ Memstiranta raketo./ Akceli la peladon de raketo. Propulsi./ Orbito. Interplaneda vojaĝo.

STELO : norda, polusa; fajreranta, scintilanta, nana, giganta. Stelplena ĉielo. Leviĝo de la stelo Arkturo. Kurado de stelo trans la ĉielo./ Scintili./ Novao. Studi la dispozicion de la steloj. Observatorio./ Konstelacio. La Granda, Malgranda Ursino. Polusa stelo. Oriono. Koĉero. Kastoro. Polukso./ Supernovao.
Falstelo (falstelo traflugis la ĉielon). Asteroido.

15. Kiam la vesperstelo speguliĝas en la rivero... Steloj rebrilantaj en la lago.

Estas skribite en la steloj./ Vi povas danki vian stelon.

PLANEDO : gravitas ĉirkaŭ la suno. La rivoluoj de la planedoj, de satelito (ĉirkaŭ la tero). Nia tero rotacias. Jupitero. Saturno (kun ringoj kaj 10 satelitoj). Neptuno. Merkuro. Tero. Venuso. Urano. Marso. Plutono.

NOKTO : Noktiĝas. "Descendas" la nokto. Bona horo por preni freŝan aeron (= puran). La nokto falas. Komencis krepuski. Krepuskiĝas. Ĝis profunda malfrua nokto./ La nokta silento. Sub la mantelo de la nokto.
Nokte eĉ monstro estas belulo. La nokta Parizo./ Noktogardisto.

**Notoj** : Planetario.

## 15 DIMENSIOJ - DISTANCO

1. Longo, larĝo, alto, diko, profundo, diametro.

Doni, taksi la dimension de ... Mezuri la larĝon, la rapidecon, la pezon de ... Mezuro. Formato (duon-, kvaron-, okon-, deksesonfolia formato). Formato de 14 per 20 centimetroj.

La trabo havis la dikon de 3 fingroj. Listelo kiu havis la larĝon de manplato.

La strato estas 1000 metrojn longa (longa je 1000 m.) Ĝi havas la alton de 300 metroj. Ĝia alto atingas la ĉielon. 300 metrojn super la nivelo de la maro, super la grundo. Konstruaĵo de imponaj dimensioj.

5. Ĉiuj de egala longo. Ĉambro duoble pli longa ol larĝa.

Viziti, trairi landon laŭlonge kaj laŭlarĝe. Vendi pometre. Veturi 60 kilometrojn hore.

Bildo en natura grandeco. Reprodukti miniaturon je centobla grando. "Diminui".

La internacia "buroo" pri peziloj kaj mezuroj. La metro estas teorie egala al la dekmiliono de la kvarono de tera meridiano. La metro estas la universala unuo de longo.

La pratipo de metro kaj de kilogramo kuŝas en Sèvres.

10. Faldebla mezurilo de ĉarpentisto. Kurvimetro. Mezurrubando de la tajloro. Mezurbendo de kudristino. Kalibrilo (mikrometra kalibrilo).
Spano. Colo. Futo. Ulno.

Je unuhora distanco. Iri ankoraŭ kelkan distancon. Li estas distanca de li je tri paŝoj. Je distanco de ĵeto. Stari ekster atingodistanco. (Vidu: MANO).

Ĝis vidlinio. Ĝis kie la rigardo povas atingi. Okulmezure.

Se ŝi iros laŭlonge de la marbordo, ŝi ŝparos preskaŭ du mejlojn./ La nul nivelo. Mil metroj super la nivelo de maro. La gajninta ĉevalo preterdistancis la sekvintan je unu kollongo. Vi estas certe je duono de kapo pli alta ol mi. Infanoj de sama kresko.

Fali laŭ sia tuta longeco./ Rigardi en kapturnan profundon (vertiĝo).

15. Taksi la dimensiojn de ribelo, de evento. La ora nombro. (Vidu : PENTRI). La ora proporcio.
Havi 30 centimetrojn en la diametro.

**Notoj :** Leŭgo. Kompti (la uzatan gason, ktp.)

## 16 DORMI

*"Kiel oni sternas, tiel oni dormas."*

1. Dormo profunda, peza, eterna.
Dormi profunde; kiel gliro, marmoto; unuokule, lepore, delikate kiel leporo; per peza dormo.
Dormi ŝtonan dormon, la dormon de justuloj.

Estas la horo, kiam la infanoj iras dormi. Luli bebon al dormo. Bonan dormon, bonan sonĝon./ Ekspedi la infanojn en la liton.

Oscedi. Somnoli. Esti en duondormo. Senti sin dormema. Bezoni dormi. Palpebroj pli kaj pli pezas. Apenaŭ teni la okulojn malfermitaj. Ŝiaj okuloj preskaŭ fermiĝas de dormemo, de laciĝo. Lukti kontraŭ dormo. Cedi al dormo. De tri tagoj mi ne fermis la okulojn. Avidi ripozon. Iri dormi. Siesti. Subpremata de dormo. Enŝovi la kapon en kusenon. Dormego falis sur ilin.

5. Dormi ĉe malfermitaj fenestroj. Havi trankvilan dormon. Dormi kapo ĉe kapo. Dormi kaŭre en la lito.

Ronki per longaj tiroj. Paroli dum la dormo. Somnambulo. Sonĝi. (Interpreti sonĝojn. Malaperi kiel malbona sonĝo). Dormo donas konsilojn.

Tradormi la nokton. Tranokti en iu loko, sub libera ĉielo./ Resti sendorme tutajn noktajn horojn. Sendorma nokto. Pasigi la nokton maldorme. Ĉu vi satdormis? Vekiĝi de bruo. Perdi la dormon. Ŝiri iun el la dormo. Rabi la dormon.

Esti vekita. En plena vekiteco. Vekiĝi el dormo, ĉe la aŭroro. Eliri kun postdormaj okuloj. Leviĝi antaŭ la tago, kun la suno. Vigle salti el la lito. Ektreni iun el la lito. Ellitiĝi./ Alkatenita al la lito./ Kiu frue leviĝas, facile riĉiĝas.

Enlitiĝi. Ŝanĝi la tukojn de sia lito. Aerumi la litaĵon. Aranĝi, pretigi liton./ Turniĝadi, ruliĝadi en la lito.

10. Lito : litkadro, somiero, matraco. Kapa parto de la lito. Plumono. Peplomo. Kapkuseno./ Hamako./ Ĝemela lito. Duloka lito. Klaplito.

**Notoj :**

## 17 EDZ(IN)O

*"Se vi volas filinon, flatu la patrinon."*

1. Fraŭlo ĝisosta, ŝtoniĝinta, "olda". Senedzinulo. Fraŭline maljuniĝi. Konkub(in)o./ Impostoj sur la fraŭloj.

Vidu : AMO.
Svati. Svatagentejo. Forregali svatiĝanton. Peti pri la mano de iu (proponi edzinigon). Estu mia advokato antaŭ mia patrino. Fianĉiĝo ne estas edziĝo. Fianĉiĝis, por ĉiam ligiĝis. Rigardu la patrinon antaŭ ol svatiĝi pri la filino.

Ŝi atendis bonan partion por sia filino. Edzigi sian filon al riĉa fraŭlino. Doni al iu sian filinon kiel edzinon. Doto. Malalte edziniĝi. Apartigitaj de tro granda diferenco de situacioj. Ŝia edzo ne estas sur ŝia nivelo. Mezalianco (= misedziĝo).

Edziĝi. Edziniĝi. Li edzinigis ŝin al si kontraŭ la volo de de ŝia patro. Ili geedziĝis sekrete.

5. Edziĝo pro (el) inklino, amo, mono, intereso, laŭ koro. Edziĝo estas loterio.

Edziĝopova, edziniĝmatura knabino. Provedziĝo.

Deklaro pri edziĝo. Civila edziĝo. Interkonfesia edzeco. Edziga promeso, formulo, ringo, ceremonio. Publikigi edziĝanoncon. Akto de edziĝo. Redakti oficialan akton. Nupto. Edziĝfesta procesio. Edziĝa soleno.

Novedz(in)o. Deflori. Kiel edzinon, ŝi donis sin al li.

Edziĝvojaĝo. Miela tempo. Edzece feliĉa. Ligita por la vivo./ Blanka edziĝo.

10. Virta, senriproĉa edzino. Tiu edzo estas vera perlo. Li sentis veran kulton por sia edzino. Edzo kaj edzino estas nur unu. Ili geedziĝis kaj ili kunvivis feliĉaj por ĉiam (fino de fabeloj)./ Ora edziĝo (post 50 jaroj). Nupta jubileo.

Rapida edziĝo, porĉiama kateniĝo. Edza potenco. Stato de virino. Postulema virino. Kial venis al li en la kapon esti ĵaluza pri sia edzino? (ĵaluza kiel tigro). La edzino faris scenon (= akrajn riproĉojn) al la edzo.

Submetiĝo, senfina cedado al la edzino. Vivi en humila submetiĝo al la kapricoj de la edzino. Hejme la virino sinjoras, mastras (sed ankaŭ : mastrumas). Konduki lin je la nazo. Li estas sub la ŝuo de sia edzino. Kun edzo plej malmola estas pli bone ol sola.

Ne deziru la edzinon de via proksimulo. Delogi ies edzinon. Serĉi plezuron ĉe fremda virino. Kial enbrakigi (...umi) virinon ne apartenan al vi? Ĉu tio estas la konduto de honesta edzo? Ĉu vi povis malleviĝi ĝis tiu ago?/ Ne ŝovu vin inter edzo kaj edzino. Detrui nian ĝisnunan harmonion. Ĵuru al mi per Dio, ke vi ne agas malfidele. Pri nenio oni povas ĵuri.

La edzo estas ĵaluzulo, kiu ne volas, ke oni ludu amon kun lia edzino. Furiozas la ĵaluzo de la edzo. Tio estas kazo de eksedziĝo. Liberigi min de edzino, kiu min malhonoras. Ŝi ne estis sufiĉe bona aktorino, por konvinki la edzon pri sia fideleco. Surprizi sian edzinon en la brakoj de ŝia amanto. Verda de ĵaluzo.

17 EDZ(IN)O

15. Kokri iun. Kreskigi kornojn al iu. Kornulo. Kokrita edzo./ Adulti. Perfidi la edzinon. Eksterleĝecaj amrilatoj. Esti kaptita en adulto.

Eksedziĝi kun (je, disde) iu. Procezo pro eksedziĝo. Divorco./ La katolika eklezio ne agnoskas divorcon./ Separo. Repudio./ Alimento.

Poligamio. Haremo.

Preni edzinon, kiu tenas sin pli alte ol li. Amdonantino. Ĉu vi opinias min kapabla por tia malnobla ago?

**Notoj :**

## 18 ELEKTADO

1. Universala voĉdonado. La periodo de elektado komenciĝos la... Balota afiŝo. Listo de kandidatoj. Elektokampanjo. Apogi kandidaton. Doni sian moralan apogon al iu. Intrigi por certigi la elektiĝon de kandidato.

La elektoj estu kiel eble plej demokrataj./ Oni balotos la 8-an de ... pri la prezidanteco. Prokrasti la elektojn ĝis la ... Rompi la indiferentecon de la publiko.

Por havi rajton de voĉdonado (= por esti balotrajta), por esti elektebla, oni devas havi la aĝon de .../ Por baloti (= voĉdoni) oni metas balotilojn (plej ofte paperon) en la balotujon (en la urnon) (plej ofte: skatolo).

Iri al la urnoj (= voĉdone elekti). La balotado estas sekreta, publika./ Li havis la kuraĝon voĉdoni "nen" publike.

5. Mi donas mian voĉon al... Anticipi la rezultojn. Prognozi. Havi plej multe da ŝancoj esti elektita. Lian elekton oni povas antaŭvidi ne sole kun tre granda kredebleco, sed eĉ kun plena certeco. Havi nenian ŝancon esti elektita. La ŝancoj kreskis, malkreskis.

Kalkuli la nombron de registritaj elektantoj, de la voĉdonintoj. Kalkuli la voĉojn. Kolekti voĉojn. Brila venko./ Kontroli la regulecon de la elektoj. Baloto ne regula. Ne valida rezulto. Nuligi la rezulton de baloto pro kalkul-

eraro./ Rebaloto. Aranĝi lojalajn elektojn.

Senrajtigita deputito pro miselekto. Malfeliĉa kandidato./ Kiom da kandidatoj realigis sian programon kiam ili estis elektitaj?/ Zorgi, ke la elektitoj estu homoj prudentaj. Vidu: KONGRESO : 29/16.

**Notoj :**

## 19 FAMILIO

*"Kia patro, tia filo."*

1. INFANO. Bebo, bebĉareto, bebvestaro. Suĉinfano. Mamo. Cico. (Areolo)/ Cicumo. Mamnutri. La lakto de la patrino estas la plej bona nutraĵo por la beboj. Malagrafi sian korsaĵon kaj suĉigi la bebon. Suĉi la lakton de dungita nutristino. Lakta febro. Infano metita for de la mamo. Demamigi./ Infanistino.

La Madono kaj la Bebo./ Dorlotata infano. Endormigi per kantado. Luli bebon al dormo. Lulilo. Lulkanto: baj, baj, lu. "Mia etulo".

La patrino kovis sian filon. Kroĉiĝi al la jupo de la patrino. Cedi al infano. Montri, havi anĝelan paciencon.

Solinfano. La sola filo, ilia espero por la estonteco. Orfo. Unuenaskito. Rajto de unuenaskito. Ĝemeloj. Ĝemela simileco.
Neleĝa, eksteredzeca filo (= bastardo). Elserĉado de patreco per esploro de sangogrupoj. Adopta infano. Adoptaj leĝoj. Adoptaj gepatroj. Rilatoj inter adoptito kaj adoptinto./ Miaj adoptaj gepatroj.

5. Vartejo, gardejo por infanoj. Infanĝardeno. Malgrandaj infanoj kaŭzas laboron, grandaj - doloron. En infano vidiĝas, kia homo fariĝos.

PATRINO : patrinaj zorgoj, karesoj, indulgoj./ Adorinda patrino./ Ŝi donis du filojn al la edzo. Patrino kiu sin mem forgesas por siaj infanoj. Esti por iu kiel patrino. Por patrino, ne ekzistas infano malbela. Bato de patrino ne longe doloras./ Kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon. Pli zorgas unu patrino pri dek infanoj, ol dek infanoj por

unu patrino.

Multinfanulino. Solpatrino. Vidvino de (post) oficisto.

PATRO, FILO : Duonpatro. Prapatroj. Prafiloj. Patra koro, amo, beno. Senindulga patro. Patre admoni. Fila amo, devo, respekto. Filo simila al la patro per la karakttero. Li estas la portreto, la vivanta bildo de sia patro. Homo, kiu havas la honoron esti mia filo.

Familianoj. Samsanguloj. Parencoj./ Agnato, kognato. Avo patrinflanka. Onklo sur la patra flanko. Praonklo. Oĉjo. Kuzo je la tria grado.

10. Posteuloj. Antaŭuloj. Seninterrompa ĉeno de generacioj. Genealogia arbo. Branĉo de familio./ Atavismo.

Incesto (= sangadulto).

**Notoj :**

## 20 FELIĈO - MALFELIĈO

*"Pelu mizeron tra l'pordo,*
*ĝi revenos tra l'fenestro."*

1. FELIĈO pura, perfekta, nemiksita, sennuba, ekstaza, perdita, facile atingebla.

Akiri, perdi feliĉon./ Ebria de feliĉo. Radii de feliĉo. Boli de ĝojo. Naĝi en plena feliĉo. Sopiri al feliĉo. Ĝoji pri ies feliĉo.

Favorato, dorlotato de Fortuno. Mi estas la plej feliĉa homo sur la tero, en la mondo./ Larmoj de ĝojo.

Ĝui per anticipo la estontan feliĉon. Havi fidon pri sia estonteco. Doni al iu antaŭguston de tiu feliĉo./ Feliĉo estas delikata floro. Vitro kaj feliĉo ne estas fortikaj./ Pensi nur pri ĝojoj kaj plezuroj. (Vidu: RIĈA)./ Nur suferinto ŝatas feliĉon. Esti levita ĝis la sepa ĉielo (= ĉe la supro de feliĉo)./ Homa feliĉo estas pasema.

5. MALFELIĈO : Antaŭflari, sperti malfeliĉon. Vidi ĉion nigra. Pesimismo (por la pesimisto glaso estas neniam duonplena, sed ĉiam duonmalplena)./ Desapontiĝi.

Certe okazis al li malfeliĉo. Malfeliĉo trafis lin. Li estas la aŭtoro de sia malfeliĉo. Ĉiu forĝas sian sorton. Malforta volo (kiu rompiĝas sur la cirkonstancoj). Amasiĝas obstakloj, baroj, malfacilaĵoj./ Maljusteco de la sorto. Ne havi bonan ŝancon. Peza bato de la sorto. Submeti sin al la sorto. Pro kio vi kolerigis la Fortunon, ke ĝi ...

Barakti en financa embaraso. Esti en tre premita situacio. Malriĉa kiel muso preĝeja. Mi simple kaj litere, ofte, ne havas eĉ kion manĝi, per kio min vesti. Krom la vestaĵo sur la korpo mi posedas nenion. Li havas tiom, kiom li surhavas./ Jen la fidela bildo de mia situacio./ Pezaj zorgoj premas mian bruston.

Ŝuldi al iu monon. Droni en ŝuldoj. Sidi en ŝuldoj ĝis super la ŝultroj. Amasigi ŝuldon sur ŝuldon. Li ne volis sin devontigi (en la futuro) al pagago de grandaj sumoj. Ne sufiĉas ploro al kreditoro. Datfalo (kiam oni devas pagi ŝuldon).

Lombardi. Lombardejo./ Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de Majo. (Mi senŝuldiĝos, kvitiĝos la 9-an de Majo).

10. Havi multe da zorgoj. La zorgo manĝas la homojn. Sidi en vera kaĉo, ĝiskole en la peĉo. Implikiĝi en malagrablaĵoj. Maro da mizeroj. Suferoj ne venas izolitaj. Ŝi staris ankoraŭ ĉe la komenco de sia Kalvaria vojo./ Alporti al iu la misfortunon. Redukti iun al mizero. Amarigi, veneni, maldolĉigi la vivon al iu. Alkonduki iun al mizero.

Niaj esperoj falis en abismon. Enfali en malesperon. Treni sian mizeran ekzistadon. La fundo de mizero. Suferi grandan, profundan mizeron./ Ĉiu havas sian kaŝitan mizeron./ Senfina litanio da plendoj. Senelira situacio.

Persekutita de la fatalo. Subfali sub la malfeliĉo. Hunda vivo. Vivi sur la tero kiel en infero. Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita. Ŝi estas virino pli malfeliĉa, ol kiom mi opiniis./ Kontraŭ volo de Dio, helpas nenio.

Plendi kontraŭ la sorto. Lamenti. Ĝemi. Veki kompaton. Eksenti kompaton al iu, pro io. Rigardi la aferon kun (pli) kompata okulo. Ĉiu estu bona kaj kompatema al sia frato.

**20 FELIĈO**

Aktiva pruvo de kompato. Kompatinda. "Povra". Pli bone estas enviigi ol kompatigi./ Emociiĝi antaŭ tia mizero.

Tio premas, fendas, ŝiras, traboras la koron. Havi bonan koron. Vi estas tre bona kontraŭ mi./ Abnegacio. Havi ŝtonon por koro. "Dura", malmola koro. Lasi iun en peĉo.

15. Fidu la Providencon. Rekomendi paciencon. Ne perdu la esperon. Kie estas sufero, tie ankaŭ estas espero. Gardi esperon. Nur la espero tenas lin vivanta. Pala lumradio, lumstrio de espero. Fajrero da espero. Estas nenia motivo por malesperi. Nutri, dorloti, flegi (belan) esperon. Luliĝi en ia espero. Mi esperas, ke mi min helpos. Tio (= helpo) estis pli ol mi kuraĝis esperi. Ĉerpi esperon el io.

Vana, detruita, neplenumita, iluzia, efemera, kaduka espero./ Maldolĉa sento de neplenumita espero. La espero cedis lokon al plena disreviĝo.

Lia espero montriĝis trompa. Esti trompita en siaj esperoj. Enabismiĝi (= sinki en abismon).

Rezigni pri ĉiuj esperoj. Liaj esperoj disfalis, forfalis en la abismon. Diri adiaŭ al siaj lastaj esperoj. Estingiĝis ŝia lasta espero. Li melankolie rigardis la ruiniĝon de siaj lastaj esperoj. La fortuno sin turnis kontraŭ li, lin forlasis, perfidis.

Cedi, fordoni sin al ĉagreno, al tristo. Droni en tristeco. Konsumiĝi de tristo. Frunto ombrata de malgajaj pensoj. Ombraj tagoj. Tre afliktita, deprimita. Deprimo (= depresio)./ Maltrankvilo, anksieco, angoro : tri gradoj de unu sama stato./ Ezofaga bulo.

20. Troviĝi en prema, ekstrema situacio, sen eliro, pli kaj pli neelportebla.

Trafi de Scilo al Ĥaribdo, el pluvo en riveron, el sitelo en barelon, el fajro sub flamon. Mizero sur mizero.
Kion fari? - estu kiel estos.

Mizero instruas, hardigas la korojn. Instruita de la malfeliĉo, de la malriĉeco.

Laboro asekuras kontraŭ mizero. Serĉi konsolon en preĝo./

Preni sian sorton en propraj manoj. Pistu triston, ŝutu ĝin en venton. Forĵetu la malĝojon.

Malfeliĉo ofte kunigas la homojn, kaj feliĉo ofte disigas ilin. Amiko fariĝas frato en mizero. Tiu malfeliĉo cementis ilian amikecon. Al malfeliĉulo decas kompato de amiko.

25. Bonfaron oni facile forgesas. Bono farita ne estas perdita. Pagi al iu bonon per malbono.
Nedankema. Mi montros min inda je via konfido. Ne moku mizeron de alia, ĉar baldaŭ venos via.

Malfeliĉo ne estas malvirto.

Mizera, kripla almozulo. Vagulo, ĉifonulo, vagabondo, "trampo".
Almozdoni, almozpeti (= almozi). Vivo peralmoza.

Kiu donas rapide, donas duoble.

Malsata stomako orelon ne havas.

30. Sociala asistantino.

**Notoj :**

## 21 FIERA - AMBICIA - HUMILA

*"Kontentigi ĉiujn eĉ anĝelo ne povas."*

1. Ambicia, malhumila, "orgojla", aroganta, impertinenta, (povas esti:) oficisto, funkciulo, princo, rigardo, teniĝo, mieno, letero, tono./ Avida je gloro, al laŭdoj./ Ĉasi famon.

Okupi altan situacion. Li ne estas homo ia ajn. Triumfi super ĉiuj obstakloj, malfacilaĵoj. Fari profundan impreson. Li estas la fiero de sia patro./ Avanci pro merito. Promocii. Promocivica tabelo.

Ekzistas laŭdaj ambicioj. Havi la ambicion fariĝi ... Akiri al si meritojn. Strebi, aspiri al grandaj faroj, pli altaj celoj. Lia ambicio estas ... Lin spronas ega ambicio. Meti limon al sia senbrida ambicio. Oni ne devas havi tro da konfido al si mem.

Meriti estimon. Amasigi sur sin ĝojojn kaj honorojn. Esti tenata en granda estimo, taksata kiel alte estiminda, grandvalora, alte aprecata. Li ĝuas grandan aŭtoritaton super siaj kolegoj pro sia kompetenteco./ Havi profundan estimon por iu. La aŭreolo de la sukceso.

5. La multo da mono faris lin malhumila. Enblovi fieron en ies bruston. Gloraltigi ĝis la ĉielo. Brile glori iun. Incensi iun ĝis sufoko. Dronigi iun en laŭdoj. Ne ĉesi laŭdi iun. Ne povi tro (sufiĉe) laŭdi. Prikanti ies gloron./ Taksi iun pli alte, ol kiom li meritas. Estu dirate por lia laŭdo... Ne ŝpari laŭdojn pri io./ Avara je laŭdoj.

Lin ebriigis la laŭdo. Avida je gloro. Akiri al si gloron. Tiaj herooj estas la fiero de sia lando. Nenio mankas al lia gloro.

Fiera kiel pavo. Veŝtokrevige fiera. Fiere rigardi. Trakti iun de alte. Paroli el alta selo./ Ŝveli de fiero. Fiero ŝveligas lian bruston. Li estas tro fiera por obei. Tio ne estas kaŭzo por fieriĝo./ Ekflami pro ofendita fiereco./ Megalomanio./ Pensi, ke li estas la centro de la mondo.

Ambicia oficiro, politikisto. Karieristo./ Li "descendos" de sia alta piedestalo. Kiom multe mi donus, por ke ... .

Malaltigi, humiligi, rompi ies fierecon. Descendigi iun de lia alta ĉevalo.

10. Cedigi sian "orgojlon" antaŭ la cirkonstancoj. Tio instruos al li pli da modesteco. Senti sin humiligita.

Humile fleksiĝi sub malamika potenco, el la forto de la cirkonstancoj./ Malaltiĝi al iu.

Esti kontenta je, per, pro, pri sia sorto. Havi la fierecon ne peti helpon.

Bone estas esti humila kun malriĉuloj.

Afekti modestecon. Li havas en si grandan modestecon. Modesta kiel violo./ Li estas malkontenta pri si mem.

**Notoj :**

## 22 GAZETO - OPINIO

*"En ĉiu kranio estas sia opinio."*

1. OPINIO persona, komuna, populara, tre prudenta, ortodoksa, ne konforma, rekte kontraŭa al, arte fabrikita, bazita sur, fundamentita. Opinion formuli, gardi, konservi, ŝanĝi, revizii, bazi sur (realaĵo), altrudi perforte, ekstermi, elradikigi, adopti.
La fluktuado, la diverseco de la opinioj.

Aŭdi plej diversajn opiniojn. Kolekti la opiniojn de la amikoj. Sin apogi sur ies opinio. Pri tio, ĉies opinioj konsentas. Post la diskuto la opinioj ankoraŭ pli diverĝis. La opinioj ŝajnas kristaliĝi al unueca solvo de la problemo.

Laŭ mia opinio vi estas malprava. Mia opinio baziĝas sur 19-jara sperto. Lia opinio ne multe pezas en la pesilo.

Mi opinias tute same kiel vi, tute malsame (alie) ol vi. Ili akordas kiel akvo kaj fajro. Mi havas alian opinion, sed ne volas enŝovi min kun mia opinio. Konfirmiĝis la opinio, ke ...

5. La publiko, kutimanta opiniadi ĉiun atakanton bravulo kaj ĉiun atakaton kulpulo./ Opinisondo.

Mi pensas, do mi estas.

GAZETO : revuo, ĵurnalo, magazino.
Artikolo reportera, propaganda, sensacia, seka, morda, acerba. Fari la rubrikon teatran, filman, sportan, monduman. La angulo de ŝakamatoroj. Felietono. Teatra kritikisto. (Vidu: TEATRO). Reportero. Milita korespondanto.

Kunlabori ĉe gazeto. Redakti. Redaktoro./ Lasthoraj novaĵoj. Rebaki tutan artikolon. Represita artikolo. Revuo de la revuoj. Ne ĉiu gazeta artikolo estas ege fruktoporta. Influa gazeto. La gazeto deziras nur regali la legantojn per novaĵo.

La aŭtoro de la artikolo. Bone informita gazeto. Penetri ĝis la koro de la temo./ Bone vortigita ideo. Klare aludi ĵusan skandalon. Raporti pri ĝi severe kaj malŝate. Tiu artikolo estas nur deliraĵo. Garantii pri la ĝusteco de la informo. Trempi sian plumon en galon, venenon. Partia ĵurnalisto.

10. Ne povi lasi tiun provokon sen reago. Eviti personan polemikon. Elstreki ĉion, kio havas personan karakteron./ Pri kelkaj detaloj mi petos, ke ili estu redaktitaj iom pli precize.

La artikolo havu karakteron iom sensacian. La artikolo faris sensacion. Tiu artikolo ne spegulas la opinion de la redakcio. Akcepti senkritike ĉion, kion diras la gazetoj./ Kritika spirito ne akceptas aserton sen informo pri ĝia origino kaj valoro. Senvalorigi argumenton per lerta kritiko.

Sin kaŝi sub anonimeco. Persono kiu deziras resti anonima. Skribi sub pli-malpli sincera masko.

Esti apatia kontraŭ ĉiaj atakoj./ Serene ignori la provokojn de gazetisto. Polemiki kun vervo. Respondrajto. Li ne ŝuldas respondi. Meti finan punkton al la polemiko. Dementi. Konfirmi. La artikolo aperu en formo de respondo al... Vi devas por tio akiri la permeson de la ...

La informo filtriĝis en la gazetaron. Alarma novaĵo. Aŭtoritata fonto de informoj. Ĉerpi dokumentojn el la fonto mem. Diri libere sian opinion. Diskonigi sian opinion per la kanalo de la revuo./ Peti, ricevi intervjuon. Gazetara konferenco.

15. Cenzuri. Mutigi la gazetaron per drakonaj leĝoj. La gazetaro portas buŝumon.

Ekskluziva rajto de kopio. Reprografi. Ĵurnalo informa, politika, loka, semajna, maldekstra, ilustrita, faka. Aperas ĉiumonate./ Lanĉi gazeton. Direkti, ekspluati gazeton. Labori ĉe gazeto.

Paperbobenoj por gazetpresado. Tipo (= preslitero). Tipopresa ricevilo./ Li preteratentis multajn erarojn en sia korektado.

Aboni la gazeton. Varbi novajn abonantojn. Via abono finiĝas en majo. Subskribi abonon. Mi petas reaboni. Abonpago. Suplemento ne abonebla, aparte abonebla. Rilatoj inter abonantoj kaj abonata gazeto.

Gazeto vendata ĉe ĉiu stratangulo (kiosko, gazetbudo), sendita sub banderolo./ Prikrii gazeton.

20. Jarkolekto de gazeto. Malnova numero de gazeto. Kolekti artikolojn pri unu temo. Eltondaĵoj pri iu temo. Gazeteltranĉo.

**Notoj :**

## 23 INSULTOJ

1. Insulto(j) kruda, kruela, reciproka(j).

Tuta rozario da insultoj. Torento da insultoj. Insultoj pluvas./ "Molesti".

Ĵeti insultojn al ies vizaĝo. Verŝi sur ies kapon plenpoton da insultoj. Superŝuti iun per insultoj, per koto. Sputi insultojn al iu. Galaj, malicaj vortoj. Surĵeti, surkrii iun per koto kaj ŝlimo. Vorto dirita neniam revenas.

Respondi nur per insultoj. Mi havas kion respondi al mia insultanto. Fi! Kia malkonvena esprimo. Blasfemi. Sakri. Sakraĵo.

5. Arkikanajlo! Protokanajlo! Abomena kanajlo! Kanajlo de la plej bela akvo! Mizera, penduminda fripono. Kreteno! Stultulego!

Aĉulo. Melonkapulo. Flavbekulo. Napokapulo! Nekonvinkebla ŝtipkapulo. Malnobla bruto! Ventkapulo!

Fermu vian klapon! Trifoje stulta. Senvalora nulo! Kornulo! Nepenetrebla muro de stulteco.
NORDA PRISMO n°3/1972.

**Notoj :**

## 24 JUSTICO - KRIMO

*"Kiu pekis, tiu pagu."*

1. JUSTICO : Alegorio de la Justico : bronza matrono kun pesilo. Pesilo : atributo de la juĝpovo./ Ministrejo pri justico.

**Delikto : ŝtelo, fraŭdo, insulto, uzuro. Delikto oficiale persekutenda.**

**24 JUSTICO**

Krimo : mortigo, dombruligo, seksatenco, infanŝtelo./ Rajto de sindefendo./ Monfalsisto.

Oni komencas per ŝteletoj, oni finas per ŝtelegoj. "Latrono". Vivi el rabado. Prifriponi la gapantojn (pripluki iun). Kleptomanio./ Hipokriti honestecon. Okazo faras ŝteliston./ Ricelo mem estas ŝtelo.

5. Komplici kun iu. Pruvi ies komplicecon. Denunci siajn komplicojn. Denunco de iu al iu, kontraŭ iu, pro io. Ŝtelisto ne perfidas ŝteliston./ Imanenta justo. Honorkoncerna afero. Plendi ĉe la tribunalo./ Meti, deponi plendon ĉe la tribunalo, ĉe la juĝisto.

Mi esperas, ke mia afero venos baldaŭ antaŭ la tribunalo. proceso komenciĝas. Troviĝi sub la valido de iu paragrafo. Procesi, fari juĝon kontraŭ (super) senhonora fripono. Konfronti. Akuzi iun pri io, ke li faris tion. Malveraj akuzoj.

Aperi trian fojon antaŭ la tribunalo./ Publikeco de la proceso. Esti kondamnita pro ŝtelo de kasmono, pro enrompa ŝtelo, kiel enrompisto, pro ŝtelo kun brutalaĵoj. Aŭdaca ŝtelisto./ Puni ŝteliston je malliberiĝo, al plej malhonoraj punoj. (malgraŭ, kontraŭ ĉia atendo).

Kulpi brutalaĵojn kontraŭ infano. La admono de la juĝisto al la kondamnito por pli bona konduto.

Liberigi akuziton kaŭcie.

10. Verdikti. Apelacii. Konfirmi verdikton.

Justa, partia juĝisto. Juĝisto celanta justecon, akcelanta la veron. Juĝi objektive. Korupti juĝiston. Aĉetebla juĝisto./ Talaro. Juĝisto devas havi du orelojn./ Subaĉetita, fripona atestanto.

Pri propra afero neniu juĝas libere. Vi ne povas esti samtempe juĝanto kaj juĝato. Neniu povas esti juĝisto en sia propra afero.

Juro. Juraj formalaĵoj. Formulo de juro. Jurisprudenco. Paciga juĝisto. Enketa juĝisto. Tribunalo de la unua instanco. Civila jurisdikcio./ Kasacia kortumo. Apelacia kortumo. Alta kortumo.

KRIMO : Oni trovis iun kun tratranĉita gorĝo. Enpiki ponardon en ies bruston./ Identigi la kadavron./ Krimo de pasio. La pasio kondukas al krimoj. Mistera krimo. La okazejo de la murdo./ Distingi inter okaza mortigo aŭ intenca murdo. Antaŭpensita, besta krimo. La intenco "konstituas" la krimon.

15. Malaperi komplete sen lasi spurojn. Anonci premion, prezon por (pro) la kapo de krimulo. Riĉa rekompenco./ Elserĉu la krimulon. La polico rastis la kvartalon./ Aresti suspektaton. La policisto iom taŭzis la kaptiton. (Liaj manoj estas puraj de tiu afero).

Teksi, streĉi reton kontraŭ iu. Lasi sin entiri en reton. Fali en kaptilon./ Kaptito laŭ parolo. Gangstero ĉassekvata, persekutata kaj arestita. Mankateno.

Akuzi iun pri murdo. Ne aŭskultinte, ne kondamnu. Zorge esplori la aferon antaŭ ol suspekti iun. Imputi al iu krimon; kulpigi iun pri krimo. Krianta eraro. Invoki ateston. Ĝis la fino de la proceso, la akuzito malkonfesis la krimon. Li konsciis sian senkulpecon, sed ne povis ja elmontri sian pravecon. Kredi je ies senkulpeco. La honorindeco de lia filo estis difektita de tiu akuzo. Restariĝis lia honoro.

Konfesi krimon. Krii al venĝo. Kapkosta, mortmerita krimo./ Ŝtonumi.

Prezentiĝi por arestiĝo. Kulpokonscio lin ŝarĝas. Homo kies konscienco estas ŝarĝita de mortigo.

Pridemandi kulpigiton./ La kulpinto metis ĉion sur onian dorson./ La demandoj de la enketisto estas plenaj de insidoj. Enketa juĝisto.

20. Havi materialan, nerefuteblan pruvon en la mano. Akumuli pruvojn kontraŭ la akuzito. Pruvi per atestaĵoj de okula atestanto. Raporti pri ĉiuj cirkonstancoj. Indigni pro (pri) maljusta akuzo. Kaptita ĉe la freŝa faro.
Malprave, senpruve akuzi. Pruvi sian senkulpecon. Via senkulpeco ne estas pruvita, do neadebla, neigebla. Ne ĉiu akuzito estas kulpulo./ Nun lia krimo estas pruvita.

Alvoki iun kiel atestanton. Kredindeco de atestanto. Fari, meti ateston. Certeco de atesto. Atesti favore al iu./ Elmeti atestojn kontraŭ iu./ Falsa ĵuro. Depozicio. La

atesto kongruas kun la asertoj de la akuzito. Cirkonstancoj ekskludantaj kulpecon. Kontroli alibion. Malkovro de nova fakto senkulpigas lin.

Pridemandi politikan krimulon. Persekuti, torturi, turmenti, martirigi. Barbaraj turmentoj. Torturo per akvo, elektro. Draŝi, tradraŝi al iu la dorson.

Konstati ies kulpecon. Lia kulpeco ne plu estas duba. Deklari iun kulpa. Akto de akuzado. La akuzito havas tre bonajn antecedentojn (se konsideri la antaŭaĵojn...).

Komenci kriminalan proceson. Krima afero./ Fari juĝon kontraŭ (super) iu. Kriminala tribunalo : asiza juĝĉambro.: Juĝi pordoferme.

25. Fariĝi ies advokato (ĵura advokato). Advokato pledas, defendas sian klienton. La artifikoj de advokato. Konvinka pledo./ Peti ekspertizon de medicinistoj pri mensa stato de akuzito./ Fari ĉe la juĝejo sensacian ateston. La akuzito persistas en sia neado./ La ŝtata akuzisto : per pruvobjekto intencas pruvi la kulpecon de la akuzito.

Raporti pri ĉiuj cirkonstancoj. Peti la indulgon de la juĝistoj./ Akuzito, kion vi havas por diri?

Recidivulo. Rekrimanto. Publika malamiko. Hardita krimulo.

Asiza ĵuriano. Decidi laŭ sia konscienco. Ne apartenas al homo kondamni alian homon al morto.

Meriti la morton. Ekzemplodona puno. Senindulga kondamno. Kondamni iun je morto per ŝnuro, pendingo. Solene eldiri la verdikton. Sensacia proceso. Absolvita kun benefico de dubo (se la pruvoj ne estas sufiĉe fortaj). Reparacio.

30. Kondamnita al dumviva malliberiĝo. Prizona puno, reĝimo, sistemo, organizacio.
Meti en karceron. Velki en karcero. Kradita vizitoĉambro. Forkuri, eskapi, fuĝi el la malliberejo. Provoso./ "Bagno" (= punlaborejo). Relegacio.

Ekzekuti : pendumi, strangoli, krucumi, ŝtiparumi, palisumi, radumi, kvaronumi, elektroekzekuti. Oni pendigis la kanajlon, la kapon malsupren.

Ekzekutisto. Doni la finfaran baton al iu. Voĉdoni la abolicion de la mortopuno.

Pendingo. Gilotino. Eŝafodo. Rado. Ŝtiparo. Pilorio.

Juĝo pro kontumaco. Ekstradicio. Preskripto./ Juĝi en foresto.

35. Tajloro krimis, botisto pendas (senkulpulo pagas por kulpulo). Kiu ne krimas, tiu ne timas.

**Notoj :** Pli valoras interkonsento, ol juĝa dokumento. Suspendi sian juĝon. Kompensodevo./ Rehabiliti.

## 25 KALKULO - KVANTO - NOMBRO

1. Ĝusta kalkulado forigas disputon.

Kalkuli ĝuste, erare, rondcifere, en la kapo, laŭ (per) la fingroj. Mensa kalkulo. Kalkulo algebra, infinitezima, diferenciala. Kalkulo pri probablecoj.

Miskalkuli. Erari en kalkulo. Pruvo per naŭ. En adicio enŝteliĝis eraro.

Nombro para, nepara, finia, nefinia. Entjero. Decimala komo.

5. La kvar bazaj operacioj de aritmetiko.

Adicio : 3 + 4 = 7 tri plus kvar faras (= estas) sep. Sumo (7).
Subtraho : 10 - 6 = 4 dek minus ses faras kvar. Diferenco.

Multipliko : 2 x 6 = 12 duoble ses faras dek du.
Aŭ: du per ses estas dek du. Produto (12).
Multiplikanto. Multiplikato. La multiplika signo. La multiplika tabelo.

Divido : 61 ÷ 4 = 15 / 1 sesdek unu dividite per kvar faras dek kvin ; restas unu.
Kvociento (15). Dividato (61). Dividanto : 4

10. 3/7 tri sur sep **aŭ** : super sep = 3 seponoj.

La plej granda komuna divizoro.
La plej malgranda komuna oblo.

Frakcio ordinara, decimala : 3/4. 75/100 = 0,75

Frakcia nombro (miksa frakcio) : 5 3/4

15. 3/4 : 3 dividato (= numeratoro)
4 dividanto (= denominatoro)

En la duuma nombrosistemo 4 estas skribita : 100 kaj 7, 111.

Potencigo : $15^3$ dek kvin en la tria potenco./ $2^4 = 16$ la kvara potenco de du estas dek ses. Levi nombron al la kvina potenco.

Elradikado : la kvarapotenca radiko de sescent dudek kvin estas kvin. La noa radiko de 10.
La radiko de 8 per 3 estas 2.
Proporcio : 2:4 = 1:2. Du rilatas al kvar, kiel unu al du. En proporcio de du al tri./ Raporto : tiuj nombroj estas en la raporto de 3 al 2 (3:2).

20. Ne kalkulebla. Tre malgranda, facile kalkulebla per la fingroj. Ne kalkulante ion./ Kalkulante plej alte (maksimume). Duobla pago (havanta la valoron de du simplaj pagoj). Dufoja pago (farita du fojojn de la sama persono). Pasi unuope sur la ponteto. Kvinope ili sin ĵetis sur min. Kiomope vi estas? Marŝi arope.

Kvaropige faldita papero. Faldi tukon duige. Duoble pli ol ĉio, kion li havis antaŭe. Triobligi sian ludmonon. Ricevi okoblan gajon de sia vetmono.

Kvaro da ludantoj.

Duoblo aŭ nenio. Aŭ ĉio aŭ nenio.

Disduiĝo de la personeco.

25. Li estas nul oble nul.

El la lernantoj nur malmulta elcento finas la studadon. La nombro de la naskiĝoj estas du pocentoj de la loĝantaro. Ili produktas 30 pliajn pocentojn.

La dividendo (de la akciulo) estas 5 pocentoj.

Altprocenta imposto.

Resti en loko ok ĝis dek tagojn.

30. Kvorumo.

KALKULO 25

Plenmano. Kelke da plenmanoj. Plenbuŝo. Plentaso. Pinĉaĵo da salo. Plenlango da lakto.

Li kolektis kolocintojn, plenan sian veston.

La kvalito estas pli grava ol la kvanto./ Morbokvanto. Mortokvanto. Naskokvanto.

GEOMETRIO : vidu PIV p.1264 (82 vortoj)

35. Triangulo. Kvarangulo. Kvadrato. Rombo. Ortangulo. Paralelogramo. Egallatera, simetria, nesimetria triangulo. Bisekcanto de angulo. Mezortanto.

La perpendikularo estas pli mallonga ol ĉiuj oblikvaj rektoj kondukitaj el la sama punkto ĝis la sama rekto./ Tiri paralelon al la latero de triangulo.

Rekto orta al alia rekto, al ebeno. Orto (= orta angulo).

En triangulo oni rigardas bazo la lateron oponan al la vertico.

**Notoj :** No-aria nombrosistemo (duaria, dekaria,...)

## 26 KARAKTERO - KOLERO - ŜERCO

*"Kolero pravecon ne donas."*

1. Karaktero (naturo, humoro) gaja, feliĉa, firma, milda, olea, nobla, arda, "rezoluta", solida, senhezita, ŝercema, fortika, hardita, iniciatema, elita, egala, kompleksa./ intuicia, acida, aspra, rigida, melankolia, kolera, kaprica, lunatika, hezitema, ced(em)a, ŝanĝhumora, maldigna, malinda, kurbiĝema, ŝanĝa, senpripensa, kruda, malserioza, "timida", ŝanceliĝema, impulsiĝema, enfermiĝema, eksplodema (kiel pulvo), flamiĝema (kiel ligno rezina), obstina (kiel azeno, mulo), ekscitebla (kiel bolanta lakto), uragana.

Mi konas vin pli bone, ol vi mem konas vin. Li estas la bona humoro mem, ĉiam egala al si mem./ Ne havi emon ŝerci. Esti en ŝercema humoro./ Ekvilibro de humoro./ Por signo de bona humoro, mi... / Ŝi estas anĝelo de mildeco. Forteco de karaktero.

Malbonaj trajtoj de karaktero. Karaktero havanta grandajn

difektojn. Karaktero laŭ la vetero. Esti ellitiĝinta per la malbona piedo. Nerve balanci la piedon. Fari la dikan lipon. Paŭti. Infana kaprico.

Li ĉiam bojas, grumblas kontraŭ ĉio. Lia karaktero estas por mi enigmo. Tio kuŝas en lia karaktero, en lia humoro.

5. Ne ĉiuj homoj havas egalan karakteron. Personoj de diversaj karakteroj. Afineco (altiriĝemo inter du samkarakteraj homoj). Diverseco de karakteroj. Profunda disonanco inter la karakteroj. En komparo kun sia filino, ŝi estas milda./ Mi estas tre impresiĝema. Ŝi apartenis al tiu kategorio de karakteroj, kiu... La amo al si difektis lian karakteron./ Karaktera perturbo.

KOLERO flama, ekscesa, neretenebla, senbrida, elĉenigita, retenata, obtuza, justa.

Perdigi al iu paciencon. Tiri sur iun ies koleron. Verŝi oleon sur fajron. Iriti (Vidu: ADMONI).

En granda kolero. Ŝajnigi koleron. Ili kun ŝajna kolero atakis unu la alian./ La kolero leviĝis al lia kapo. Vidi sur iu, ke li estas kolera. Trafis min kolero. Atako de kolero. Lia buŝo ŝaŭmas de kolero.

Koleri kontraŭ iu. Kolerigi iun.

10. Ekscitiĝi ĉe la plej malgranda bagatelo, kiel bolanta lakto. Ne havi kaŭzon por koleri. Li ne povas rezisti al sia unua impulso. Ne plu povi sin regi. Elverŝi sur iun sian koleron./ Furioziĝi.

Montri, aperigi koleron. Fari geston de kolero. Boli de kolero. Bati la tablon per pugno. Eksplodi de kolero. Elverŝi sur iun la ardon de sia kolero. Ruĝiĝi de kolero. Pala pro kolero. Esti ekster si. Perdi la estrecon de si mem. Esti kolera kiel rabia hundo. Esti furioza, en plena ekscitiĝo. En tia stato esti kapabla je ĉio.
Kvietiĝis lia kolero. Disciplini siajn impulsojn. Bridi, sufoki sian koleron. Regi super sia kolero. En ĉiu okazo, li scias ekregi sin./ Milda respondo kvietigas koleron.

ŜERCO peza, triviala, maldelikata, malkonvena, pikanta, ofenda, senkulpa, sensala, sengusta, sensprita.

Ne havi emon ŝerci. Esti en ŝercema humoro. Tio ne estas ŝerco. La ŝerco maltrafis, retrotrafis. Sufiĉe da ŝerco. Li ne komprenas ŝercon. Troigi la ŝercon. Distriĝi per ies ŝercoj. Fari ŝercojn.

Ŝerce dirite. Spriti. "Nur la senutileco de la unua diluvo, diris Renano, malhelpas Dion sendi al ni duan."

15. Longaj konversacioj spicitaj de bonhumoro kaj ŝercoj.

**Notoj :**

## 27 KOMERCO

1. Aĉeti, vendi firme, kontante, kredite, monatpage, pogrande, popece, pometre, malprofite, telkele, aŭkcie (per plidono), je minimuma, fiksa, modera prezo./ Prezaltiĝo./ Manaĝero. Merkatanalizo. Merkatesploro. Reklamindustrio.

Fari komercon. Vendi ion por iom da neniom. Vendi ĉapelon por (kontraŭ) 10 frankoj. Vendi ĉion por plej bagatelaj prezoj. 150 rublojn la frako kostas kaj en la bazaro, li ĝin forblovis por dudeko da rubloj. Kiel per turno de mano, ĉio malaperis. Por tiu prezo la vesto ne estas kara (estas "ĉipa").

Ŝakri. Brokanti. Kolporti.
Tiu drapo kostas po dek frankojn por metro. Aĉeti vinon po dek boteloj. Vendi cigarojn po skatolo.

Vendado de artiklo estas facila, malfacila, delikata, profitdona./ Tiu komercaĵo havas grandan debiton./ Debiti.

5. Konkurenco lojala, mallojala. Fikomercisto./ Reĝimo de libera konkurenco. Prospera komerco./ Altigi la prezojn.

Por vendisto mensogo estas necesa apogo. La bazaro estas tenata ĉiun merkredon. Fiŝbazaro. Pulbazaro./ La legombazaro montris la tutan gamon de verdo. Iri serĉi provianton en la kamparo, en la bazaro./ Fruaĵoj./
Ĉu sufiĉas la provizo da viando?

Oferti, proponi varon al klienton. Garantii pri la kvalito de varo. Mane pesi brasikon./ Fari bruan reklamon (per afiŝo, per afiŝhomo, prospektoj). Reklami, tamburi, tamtami, distrumpeti.

Proponi tre avantaĝajn, definitivajn, firmajn prezojn. La ondiĝo de la prezoj./ Tro pipritaj, salitaj prezoj. Intersezonaj rabataĵoj. Vendi rabate. 50% da rabato. Aĉeti, pagi kontante./ Apunto.

Marĉand(ad)o aĉeti ne devigas. Ekzameni ne devigas preni. Oni donas nenion por nenio. Kostu, kiom ĝi kostos, mi... Je kia ajn kosto. Akiri ĉiapreze. Pagi per bonaj, sonantaj taleroj. Ĉiu malfruiĝo ĉe la pagado ĉesigos la liveradon./ Deponi sumon en la manojn de triulo (kiel garantiaĵon). Demonstristo. Bazarulo. KREDU MIN, SINJORINO.

10\. Magazeno, butiko, ĉiovendejo, superbazaro, memserva butiko. Ĉenbutiko./ Komerci je propra konto. Diversfaka komerco. Multklienta butiko./ Komiz(in)o. Eksponi robojn en la fenestro de la magazeno.
La morta sezono por la ĉapelistoj. Sezona komerco. Inventari siajn komercaĵojn. Malkovri, anonci deficiton.

Kalkuli la kasmonon en la fino de la tago. Trovi la kason malplena. Kompensi./ Fakturo. Debeto. Kredito. Saldo./ Ekpago. Kvitanco.

Trabutiki. Rigardi kaj aspiri ne signifas akiri. Ju pli granda la deziro, des pli kara la akiro. Tiu magazeno afiŝas grandrabatan vendon./ Mi ne povas permesi al mi la aĉeton de tiuj luksaĵoj (kiuj) ĉiam atingas altan prezon. Mi domaĝas la prezon./ Mi akiris ...on je malalta prezo.

Grandkomercisto. Riĉiĝinta komercisto. Enketi pri la solventeco de negocisto./ Vojaĝa, migra komizo. La provizio de komerca reprezentanto, vojaĝanto. Havi agenturon en sukero, Portovino./ Kiu estas via agento en Parizo?

MERKATO de la lano, kafo. La Eŭropa Merkato. La libera merkato. La nigra merkato. La sukermerkato estas saturita./ Serĉi novajn merkatojn. Studo pri novaj merkatoj. Oni devas fari merkatesploron tute larĝan./ Inundi la internacian merkaton per siaj produktoj.

15\. Ju pli da aĉetantoj, des pli alta la prezo. Oferti je la plej bonaj kondiĉoj. Leĝo pri ofertado kaj mendado. Negocaj aferoj estas severaj. Kiel statas, iras la komerco? Ĝi stagnas./ Konjunkturo.

Makleristo. Kurtaĝo. Borso pri kotono, lano. Kurzo. Spekuli pri la greno, ĉe la borso. Spekulaj manovroj. Akcioj kvotitaj ĉe la borso.

Borso firma, malvigla. Komerca ĉambro.

Faktorio. Staplejo. Konsorcio./ Eksporti. Bilanco de eksterlanda komerco.

**Notoj :**

## 28 KOMPAROJ

Barakti kiel fiŝo ekster akvo./ Danci kiel kato ĉirkaŭ la poto./ Drinki kiel truo, spongo, funelo./ Ekscitiĝi kiel bolanta lakto./ Esti por iu kiel patrino. Esti kiel fiŝo en akvo./ Fali ĉiam plandalsube kiel kato. Gapi kiel bovido. Gardi iun kiel la pupilon de sia okulo. Helpos kiel hirudo al mortinto./ Iri kiel anaro da ŝafoj post kriemuloj./ Iri kiel ŝafoj de Panurgo. Iri kiel la vento. Konduki iun kiel ŝafidon al la buĉo./ Kreski kiel fungo post la pluvo./ Kurbiĝadi kiel diablo en akvo benita./ Kuri kiel rabia./ Malaperi kiel malbona sonĝo./ Manĝi tiom kiel birdeto./ Marŝi kiel procesio./ Mensogi kiel kalendaro, gazeto, funebra parolado./ Ridi kiel kreteno./ Rigardi stulte kiel ŝafo./ Salti lerte, gracie kiel urso ebria./ Soni kiel malplena barelo./ Tremi kiel aŭtuna folio./ Vivi sur tero kiel en infero./ Vivi kiel kuko en butero./ Vivi kiel hundo kaj kato.

Alta kiel cedro. Amara kiel galo, aloo, genciano, kakao./ Bela kiel anĝelo./ Certa kiel duoble du kvar. Ĉasta kiel glacio. Fiera kiel pavo, Hispano. Ĵaluza kiel tigro./ Kaprica kiel aprilo./ Klara kiel kelo nokte./ Libera kiel birdo aera./ Maldika kiel haro./ Malgrasa kiel skeleto, kiel balailtenilo./ Malriĉa kiel muso preĝeja./ Malsaĝa kiel ŝtipo./ Milda kiel ŝafido./ Modesta kiel violeto./ Mutega kiel la steloj./ Nigra kiel korvo, inko./ Obstina kiel kapro./ Premataj kiel sardeloj en barelo./ Pura kiel vango de virgin' amata (= virgulino)./ Ronda kiel la suno./ Ruza kiel lupo./ Sama kiel la mia - tute malsama ol la mia./ Sekura kiel sub hunda gardo./ Stulta kiel ŝtipo, azeno, ansero, kaprino, kukurbo, napo, melono./ Vigla kiel

lacerto.

Diferenco kiel inter tero kaj ĉielo./ Okuloj bluaj kiel ĉielo. Tio trafis min kiel tondro./ Talio kiel vespo.

Tiel simila unu al la alia kiel du gutoj da roso, akvo. Tiel densa kiel rafanetoj en fasko. Tio konvenas kiel botoj sur manĝotabloj. Oni konas lin kiel blankan lupon.

**Notoj :**

## 29 KONGRESO

*"Unueco donas forton"*

1. Preni sur sin la malfacilan taskon aranĝi kongreson. Centralizi la kongresajn servojn. La kongresanoj devas sin anonci plej baldaŭ./ Delegitoj rajtigitaj. Pagantaj gastoj./ Akceptejo. Akcepto al la kongresanoj. Interkonatiĝa vespero./ Urbodomo dekoraciita per ĉiuj naciaj flagoj. Flagitaj stratoj./ La kongreso promesis esti grandioza.

Patroni la kongreson. La kongreso okazos sub la aŭspicio de la registaro. Honori per ĉeestado. Estis la unua fojo, ke ministro parolis en Esperanto./ Mortintaj batalantoj. Mi proponas, ke ni honoru ilian memoron per leviĝo de (= de sur) niaj seĝoj.

Ĉeesti per propra korpo, kun karno kaj ostoj./ Aklami la veteranon. Malfermi solene la kongreson. Deklari la kongreson malfermita. La procesio de la delegitoj./ Havi festan paroladon (kiu) estis la kulmino de la kongreso. La arto de parolado. Li estas oratoro pli el naturo ol el arto. "... Ĝi estas la sonoj de io granda, kiu naskiĝas."
(Unua kongreso, Bulonjo ĉe Maro, 1905).

Post kiam, post ol la prezidanto, la aĝo-prezidanto, malfermis la kunsidon, oni komencis la tagordon./ La "buroo" konsistas el la prezidanto (esti prezidanto nur pro formo), la vicprezidantoj kaj la sekretarioj de la kvar komisionoj./ Kvorumo atingita. Agnoski, kontesti la reprezentivecon de persono, komitato.
La kongreso taksis al la komisiono esplori la problemon.

5. Transiri al la problemoj. Ataki demandon./ Partopreni en la brila, vigla diskuto. Penetri ĝis la koro de la temo. Proklami siajn principojn en kunveno. Persisti, stari fidele ĉe siaj principoj.

Akcepti tekston, kiel bazon de diskuto. Konsenti principe kun iu. Kolekti opiniojn de amikoj. La nun diskutata kazo. La parolo apartenas al li. Turni kaj returni ideon en ĉiu direkto. Apogi, subteni proponon. En tiu propono kuŝas la solvo de la problemo. Trovi ĝeneralan aprobon. Tiu propono estas laŭ mia opinio tre prudenta.

Esprimi malaprobon. Febra diskuto. Diskuto kun fajro (pro miskompreno). Droni en detaloj. Malforta flanko de argumento. Postuli neeblaĵojn. Havi la lastan vorton en diskuto. Protesti kontraŭ per manoj kaj piedoj. La demando ne estas sufiĉe maturiĝinta. Tio tuŝas la esencon mem de la demando. La kerno de la demando. Lasi flanke la demandon pri... Fortaj argumentoj: malsolidaj kritikoj. La malforteco de argumento senhava. Refuti, senvalorigi argumenton per lerta kritiko. Finfine la tuta malkonsento reduktiĝas al diskuto pri la senco de unu vorto.

Eviti akran polemikon, ĉion agresivan, polemikan. Pli akrigi la disputon. Akre batali ies proponon. Ne povi aŭdigi sian voĉon. Rebati atakojn. Sterila diskuto. Retiriĝi kun humoro.

Diversaj fluoj de opinioj. Riĉa provizo da ideoj. Neakordigebla konflikto. Estas abismo inter tiuj du opinioj./ Lasi la pordon malfermita por nova traktaĵo.

10. Debati. Polemiki. Kontesti. Repliki. Obĵeti. Refuti. Opona opinio. Defendi sian vidpunkton. Kostu, kiom ĝi kostos, mi defendos mian projekton. Neniu havas la rajton dikti al ... siajn postulojn.

Ŝanĝi sian opinion, sub la influo de antaŭkongresa agitado. Barakti en kontraŭdiroj. Forbalai ĉiujn obĵetojn. Ĵongli per argumentoj. Ĉerpi el sia arsenalo da argumentoj.

Persista kontraŭulo. Montri sin tute ne cedema, firma. Obstina opozicio. Stari ĉe la sama punkto.

Teoria diskutado kondukos al nenio. Por ke la diskutado estu trankvila, matura kaj fruktodona.../ Ni revenu al la

demando. Diskuti la "por" kaj la "kontraŭ"./ Unuj jesas, aliaj neas, ceteraj silentas.

Deklari sin kontraŭ la propono. Ankoraŭ ne estas dirita la lasta vorto. Finveni al kompromiso, al interkonsento. Ne serĉi vanajn kompromisojn, kiuj flikas lokon, krevigante alian. (Vidu: 4/19). Elĉerpi ĉiujn eblojn de solvo. Silenta interkonsento. Definitive fermi la diskuton.

15. Prezenti proponon en taŭga formulo. Tiu propono akiris ĉies aprobon. Oni devas disigi tiujn du proponojn. Ĉiu ano disponas unu voĉon. Ĉiu delegito havos tiom da voĉoj, kiom da ... Voĉdonado per aplaŭdoj, per sido-staro, per kartlevo, per manlevo, per koloraj globoj, per sekretaj balotiloj. Mi rajtigas vin voĉdoni en mia nomo. La forestanto estas ĉiam malprava. Sin deteni.

Rezolucio akceptita unuanime, ĉiesvoĉe, per aklamo, senopone post longa marĉando. Disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto. Proponi, voĉdoni, forĵeti rezolucion./ Mocio.

Oni elektis lin kiel prezidanton (= oni elektis lin prezidanto). Ŝarĝo peza sed honoriga. Honora prezidanto. Preni sur la ŝultroj tiom da respondeco. Havi sur si tre grandan moralan respondecon. Aklami la elekton de nova prezidanto (elektita per aklamo). EKtondras tempesto da aplaŭdoj. Neĉesema aplaŭdo. Ovacio. Fermi la kongreson.

Brilanta sukceso. Brila aranĝo de la kongreso. Ĝi povas esti kalkulata kiel la plej grava el ĉiuj kongresoj.

20. Provizi la gazetaron per informoj pri la kongreso. (La malfermo de la kongreso estis disaŭdigata de la nacia sendostacio).

Konferenco. Kolokvo. Simpozio. Seminario.

**Notoj :**

## 30 KORPO

Vidu: PIV p.1258 (65 vortoj). KORPO, laŭ jena ordo : 1) Kapo. 2) Vango, mentono, frunto, barbo. 3) Nazo. 4) Okulo, brovo. 5) Orelo. 6) Buŝo, lango, lipo (kiso). 7) Dento. 8) Vizaĝo, mieno. 9) Dorso, flanko. 10) Kolo, gorĝo. 11) Ŝultro. 12) Kokso. 13) Vertebraro + ostoj. 14) Koro. 15) Sango. 16) Haŭto. 17) Haroj. 18) Sensoj.

................................................................................

KORPO : Korpĉekorpa homdenseco (Svarmo da homoj . Fendi la bruantan amason. Bori al si vojon per kubuto. Senatente kunpuŝiĝi kun iu). Korpulenta. Dikventra. Graskorpa./ Talio.

1) **KAPO** bela, sencerba, leona, kalva, klinita.
Kapo de bastono, pinglo, bolto, martelo.
Kapon ŝanceli, levi, mallevi, turni, balanci, skui, klini.

Jese balanci la kapon. Nee skui la kapon. Teni la kapon klinita. Perdi la kapon. Turni la kapon de bela virino. Agi laŭ sia kapo. Frapi per la kapo kontraŭ la muro. Kun la kapo klinita malantaŭen. Doni fingroklakon sur ies verton. Rigardi iun de la kapo ĝis la piedoj./ Kalkuli en la kapo. Manke de kapo oni devas havi krurojn.

Havi, ricevi, senti kapturnon. Leviĝi ĝis kapturna alto. Meti ion kaploken, frontloken. Sin ĵeti en la akvon, la kapon antaŭen. Fali kap-al-sube. Fali kapantaŭe en la foson./ Reveme balanci la kapon. Honesta de verto ĝis plandoj.

2) **VANGOJ** : kavetaj, kaviĝintaj, enfalintaj, pufaj, rondaj, sulkoplenaj.
Vangoj brulas post plorado, vangofrapo.
Survangi iun, vangofrapi, fari aplaŭdon sur la vangon. Mi volonte donus al mi vangofrapojn. Al tiu, kiu frapas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian.

**MENTONO** : Havi duoblan mentonon./ Mentonrimeno de kasko.

**FRUNTO** : Kuntiri, sulkigi, kunŝovi la brovojn. Sulkigi la frunton. Lia frunto nubiĝas. Kruta frunto. Faltiĝinta frunto. Tempia faltaro.

Porti sur la frunto la signon, la stampon de io. Havi grandan, inteligentan frunton./ Fruntalo.
**BARBO** bele kombita, distaŭzita./ Karesi al iu la barbon./ Ĵuri per la barbo de l'profeto.

3) **NAZO** rekta, kurba, hoka, plata, kuspita.
Naza(j) kavoj, sonoj. Septo. Lobo (alo). Naztruo. Vibrisoj./ Nazalo.
Nazo de plugilo, kruĉo, ŝipo, aviadilo.

Platnazulo./ Nazfluo. Muko. Mukplena nazo. "Mungi" sian nazon. Kiu ne sentas sin nazmuka, ne viŝu la nazon. Havi ruĝan, bonan nazon. Ricevi nazofrapon.

Teni la nazon supren. Iri laŭ sia nazo. Sekvi sian nazon (agi laŭ instinkto). Konduki iun je la nazo. Ne montri eĉ ne la pinton de la nazo. Foriri kun longa nazo. Kuntiri la nazon. Vidi nur ĝis la pinto de sia nazo./ Platigi sian nazon sur la fenestra vitro.

Sur mia nazo ne estas skribite, ĉu mi havas monon.

4) **OKULO, BROVO** (Vidu: OKULO)

Brova arko./ Kuntiri, kunŝovi la brovojn. Pentritaj brovoj./ Glabelo.

5) **ORELO** : vidu ORELO. Ruĝiĝi ĝis la oreloj.

6) **BUŜO, LANGO, LIPO, KISO**
Gustoburĝonoj de la lango (= papiloj). Plenlango da lakto. Perlanga kuracado. Perlange. Klaki per la lango. Montri moke al iu la langon (eletendi la langon). Kontraŭ kiu vi elŝovas la langon?

Lasi ion elgliti el la buŝo, de sur la lango. Malligiĝis lia lango./ La lango estas vundanta sago.

**LIPO** : Komisuro./ Leporlipo./ Mordeti al si la lipojn./ Inter pokalo kaj lipo povas okazi multe.

**KISO** : Kovri iun per kisoj. Ŝteli kisojn. Kovri, superŝuti iun per kisoj. Preni kison sur ies vangon.

7) **DENTO** karia, baznudigita; falsa, artefarita, hokradika, plombita./ Dentobreĉa.
Denta absceso, alveolo, eburo (dentino), emajlo; kavo, krono; medolo, nervo, kario.

Incizivo (tranĉdento), kanino (kojndento), molaro (mueldento). Laktodento. Saĝodento./ Cerviko. Radiko. Krono./ Tartro. Dentopinglo (por purigi la dentojn).

Eltiri denton. Ŝiri putrintan denton. Denttirilo. Drilo. Obturi (cemento) dentan karion./ Plombi. Plombaĵo. Kroni (kronaĵo)./ Falsa dentaro./ Protezo.

Kunpremi la dentojn (obstineco). Montri la dentojn (minaco). Murmuri tra la dentoj. Liaj dentoj klakas de malvarmo, timo. Liaj dentoj rompiĝis sur tio.

**8) VIZAĜO, MIENO :**

Vizaĝo osta, nesimetria, dikhaŭta (el ledo), velkebla, zorgoplena, morte pala, nepenetrebla, nelegebla, nedeĉifrebla, pokera, senesprima; surverŝita, humida, banita de larmoj, larma; ridetanta; absorbita, agrabla, afabla; delikata.

Vizaĝo : heliĝas, nebuliĝas (nubo pasas sur lia vizaĝo), ekflamas.
Vizaĝon : razi, pudri, ŝminki (ŝminkita kiel prostituitino).

Tomba paleco de vizaĝo. Havi la stampon, la sigelon de io sur la vizaĝo. Spegulas ion la vizaĝo. Priridi iun al v-. Ĵeti insulton, ofendon al ies v-. Kaŝi al si la v- post, en la manoj./ Sin ĵeti vizaĝaltere.

Kun mieno malĝoja, trista, afabla, grava, indiferenta, stulta, gaja, kontenta, funebra, severa, ruza, taŭzita, treĝenita, veaspekta.

Havi vinagron en la mieno. Li faris mienon kvazaŭ li laborus. Mieni kiel malsanulo. Mieni mielon al iu.

Trajtoj delikataj, nenidiraj, ĉarmaj, fajne gravuritaj, ĉizitaj, cizelitaj.

Harmonio de la vizaĝaj trajtoj./ Salono de beligado. Beligistino.

**9) DORSO, FLANKO, TRUNKO :**

Draŝi al iu la dorson. Pluvigi batojn sur ies dorson. Teni sin dorso ĉe dorso. Fali dorsen. Eksenti froston en la dorso. Fari ion malantaŭ (post) la dorso de iu. Ataki iun de malantaŭe, de poste, dorse. Mortigi iun de post la dorso.

Malestime, abrupte, malfidele turni la dorson al iu.

**FLANKO** : flanko ĉe flanko. Stari ĉe la flanko de iu. Turni sin aliflanken./ Konsideri ion laŭ ties plej bona flanko.

**TRUNKO** : Kapti iun ĉirkaŭ la korpo. Tiel malgrasa, ke liaj ripoj estas kalkuleblaj. Malgrasa kiel skeleto, kiel balailtenilo./ Esti maldika ĉe la koksoj.

Kava brusto de maljunulo./ La brusta perimetro./ Brusta inflamo, tuso./ Arkigi la vertebraron./ Kurba dorso. Busto. Torso. Sino.

10) **KOLO** : Fali al iu sur la kolon, sin ĵeti sur ies kolon. Ĵetiĝi al lia kolo. Pugni lin rekte en la kolon./ Penetri profunde en la kolon (tranĉilo).

**GORĜO** : Kapti iun je la gorĝo. Kunpremiĝas lia gorĝo. Li sentas bulon en la gorĝo. Gorĝostreĉe. Plengorĝe.

11) **ŜULTRO** : Anstataŭ respondi li levis la ŝultrojn. Ŝultri la respondecon. Depreni ŝarĝon de sur ies ŝultroj./ Akcelo. Ĵeti ŝalon sur ies ŝultrojn. Surŝultrigi la fusilon (soldatoj)./ Skapolo.

12) **KOKSO** : Meti la manon al la koksoj. Kun la manoj sur la koksoj./ Denaska koksa luksacio, elartikiĝo. Koksalgio./ Ingveno.

13) **VERTEBRARO - OSTOJ** : Vidu PIV p.1259. Kolaj vertebroj (7 = nukaj), torakaj (12), lumbaj (5), sakraj (5), kokcigaj (3-5). Brustokorbo.

Mi rompos al vi la ostojn, la ripojn.

Aspekti kiel skeleto. Li ne faros maljunajn ostojn (frutempe mortos).

Diska mislokiĝo. Diska hernio./ Cefalospina likvaĵo. Splito. Splinto./ Skoliozo./ Propran ĝibon neniu vidas. Sidi sur la kalkanoj. La kalkano de Aĥilo./ Ĉu tiuj ostoj meritis nenion alian, ol ke oni ludu per ili keglojn?

14) **KORO** : Aroganta, ĝoja, kontenta, malica, prudenta, saĝa, kruda, "dura", sensenta, nobla, milda, suferanta. Koron fendi, malpezigi, malŝarĝi./ Frakasi, rompi, ŝiri, trabori./ El la tuta koro: ami, ĝoji, ridi, labori.

Lia koro mildiĝas, malpeziĝas, senŝarĝiĝas, moliĝas, krevas, fendiĝas, jubilas, tremas, sangas, flamas, ardas, kunpremiĝas.

Havi koron el ŝtono, plenplena de sentoj. Havi la koron libera. El la fundo, el la plejprofundo de lia koro./ Io ĝojigas la koron.

Gravuri ion en la koro. Enskribita en la koro. Io lasas profundan sulkon en lia koro./ Gardi ion en la koro. Vivi en ies koro. Tio fariĝis tre kara al lia koro.

Faru kion (kiel) diktas al vi la koro. Elaŭdi la voĉon de sia koro./ Paroli al la koro de iu. Sin adresi al ies koro.

Senkore konduti./ Alpreni ion al la koro (tutkore interesiĝi pri io). Se la koro tiras vin (se tio plaĉas al vi).

Malkovri antaŭ, al iu sian koron.
Vi parolas kiel senkorulo.

Atrioj kaj ventrikloj. Sistolo, diastolo. Valvoj. Palpitacio.

15) **SANGO :**
Sanga makulo, batalo. Pursanga ĉevalo. Samsanga amo. Soifi sangon. Delavi ion per sango. Oferi sian sangon. Fari al si malbonan sangon (maltrankviliĝi pri io). Fari ion kun malvarma sango (kun "frida" sango).

Glaciiĝas la sango en liaj vejnoj. Sangado de la nazo. Endas tuj fari sangan transverŝon. Transfuzi. Banko de l' sango.

Infarkto. Embolio. Trombozo. Flebito./ Leŭkocitoj (blankaj globuloj). Hematioj (ruĝaj globuloj). Sero. Sangcirkulado. Vaskulo (kardiovaskula afekcio). Arterio. Vejno. Kapilaro./ Aorta arko. La blua malsano (blua infano).

16) **HAŬTO. FELO :**
"Antaŭ mortigo de urso, ne vendu ĝian felon".
Haŭto silka, dika, velura, ventotanita.
Brunigi al si la haŭton ĉe la suno. Senhaŭtigi la kranion de la malamikoj. Skalpo. Akneo. Efelidoj. Lentugo. Sebumo. Veruko. Poro. Haŭto sentiva al iu ungvento./ Lezo. Haŭtaj krevoj sur la manoj./ Perspiri.

17) **HAROJ :** longaj, rigidaj, krispaj, blondaj, brunaj, rufaj, buklitaj, malarangîtaj. Harojn kombi, tondi, flegi, perdi. Oni tondis lin kalva. Brunigi la harojn per tinkturo./ Ŝampuo./ Ondumi la harojn. Lasi sian hararon flugi en la vento./ Ponevosto. Aŭreolita de siaj blondaj haroj. Ŝiaj haroj ondiĝadis ĉirkaŭ la kapo. Disfendi harojn (subtil-aĉe diskuti). Harfendado. Maldika kiel haro (kapilara)./ Harsekigilo.

18) **SENSOJ :** vidado, aŭdado, flarado, gustumado, tuŝado (= palpado). Odoro. Saporo./ La senso de ekvilibro.

La sensorganoj: okulo, orelo, nazo, lango, tuŝkorpuskloj (ĉefe en la polmaj facoj de la fingro) (= sensorganoj pri la palpado).

Sensa delikateco, obtuzeco. Havi delikatan flaradon.

La sojlo de senseblo, de aŭdeblo. Senti odoron de. Sensi fetoron, sonaltecon, malvarmon.

Akuta sensiveco. Esti sensiva al malvarmo. Li ne havas senson por humuro.

**Notoj :**

## 31 KURACI - MALSANO - SANO

*"Taksi la sanon ni lernas en malsano".*

1. Doloro, sufero: akra, obtuza, profunda, neelportebla, neeltenebla, lancina, apenaŭ imagebla.
En paroksismo de doloro.

Kiel vi vin sentas? Mi sentas min malsana, ne tute sana. La stato de mia sano ne estas bona. Delikata sano. Mi facile malvarmumas. Doloras ĉi tie. Min doloras mia reŭmatismo. Dolorigi al si la piedon. Mute kovata doloro. Senti doloron en la kapo. Kramfo. Senti piketadon en la gorĝo.

Grimaco de eksufero. Kriegi de doloro, kvazaŭ oni lin tranĉus./ Kvietigi doloron./ Kontraŭ doloro helpas bona humoro.

Febro forta, intensa, intermita, kontinua. Febro akcelas la pulson. Preni la temperaturon. Havi febron. Skuiĝi de febro. La febro lin tenas. Kuracilo kontraŭ febro. Intermita kurbo de temperaturo. La intenseco de febro malkreskas.

5. Malzorgi sian sanon. Perdi la fortojn. Esti la ombro de si mem. Vangoj palaj de anemio. Havi kapturnon. Suferi je nerva singulto. Suferi trafon de sinusito, de brusta seka tuso, nehaltigebla, konvulsia tusado. Senti palpitaciojn. Suferi ventojn (furzi). Borborigmo. Trancas al mi en la ventro (kolikoj). Teni al si varme la ventron. Krizo de astmo, apendicito. Insuficienco: kora, rena, hepata.

Antaŭavertaj simptomoj. Malsaniĝi je ftizo. Severa atako de podagro. Homo psike malsana. Psikopato. Mania-deprimiĝa psikozo. Paranojo. Psikosomata. Somato.

Lukti, rezisti kontraŭ malsano.

Malsano benigna, maligna, kontaĝa, imaga, hereda, kronika.

Sterni en la lito. Sveni. Vomi. Sputi. Stertori. Deliri. Agonii.

10. Kuracisto familia. Doktoro Z. Specialisto pri pulmoj. Praktiki medicinon. Alopatio. Homeopatio. Akupunkturo. Praktikanta kuracisto. Praktikisto. Via vivo estas en liaj manoj.

Havi la liberan elekton pri sia kuracisto. Mi sendos venigi la kuraciston./ Kabineto de doktoro Z. La akceptejo de la kuracisto. La atendejo./ Li akceptas ĉiun ĵaŭdon. Klinika esplorado, signo. Diagnozi. Lokalizi la tumoron./ Ĉiu malsanulo estas kazo./ La kuracisto povas nur helpi la naturon. Paciento./ Bulteno de sanstato.
Deontologio. Kaduceo.
La kuracarto estas nun dividita en multajn specialojn. MALGRAŬVOLA KURACISTO. MALSANULO PRO IMAGO (Molière).

Montru, elŝovu la langon. Ŝlima lango. Esplori la fundon de la gorĝo. Aŭskultumi la pulmojn, la koron (stetoskopo). Palpi la pulson. Kiom da pulsbatoj en unu minuto? Senti la pulson de siaj arterioj. Akcelado de la kora ritmo. Arteria tensio, premo. Tensiometro. Hipotensiulo. Hiper-

tensiulo./ Radioskopio (iksaj radioj). Radiografi. Radioskopia ekzameno. Analizo. Kolesterolo.
Tio estas zorgiga simptomo. Esti serioze malsana. Havi pravan kaŭzon por maltrankviliĝi. La vortoj de la kuracisto trankviligis la malsanulon.

Preskribo adekvata. Preskribo entenas konsilojn pri dieto kaj recepton por pocio. Konformigi dieton al la temperaturo de malsanulo. Nutra, severa, senvianda dieto.

Obei la indikojn de recepto. Religie sekvi, observi la preskribon de la kuracisto. Fari tri inhalojn en unu tago (inhalilo).
Antibiotikoj. Aerosoloj. Apliki kuracilon en malsano. Fari al iu aplikon de nova kuracmetodo. Singarde dozi medikamentojn. Intravejna injekcio de kalcio. Injekti morfinon al agonianto./ Medikamento ne tolerata.

15. Ordoni ripozon al iu. Supernutri malsanulon. Eviti ĉiujn ekscitaĵojn. Lasi la naturon agi mem. Pli bona kuracilo estas la tempo.

Banloko. Banurbo. Termobanejo (trinkkuracado). Termofonto.

Retrovi la sanon. Mirakla resaniĝo./ Konvaleski. Recidivo.

Kuracilo efika, senefika, vere aktiva. Panaceo. Trakti iun per antibiotikoj. Donaci akurate medikamentojn. Kvietiga drogo, bone tolerata. Trankviligaĵo. Kordialo. Medikamento. Drogo. Placebo. Vehiklo. Paliativo. Specifa medikamento. Medikamento avantaĝe anstataŭita de nova. Avizo pri la uzado de medikamento.

Organismo sentiva al drogo. Sentivigita al sulfamidoj. Bone tolerata drogo. Ne tolerata medikamento. Malgranda tolereco al antibiotikoj. Kontraŭindiko.

20. Farmakopeo. Kodekso. Apoteko. Farmacia specialaĵo, patentaĵo.
Supozitorio. Pilolo. Aspirina tablojdo. Premaĵo de aspirino. Kontraŭtusa siropo. Oficinaj plantoj. Medicinaj herboj. Oleo de hepato de moruo (gadoleo). Sinapa kataplasmo. Pocio. Klistero. Klisterpilko. Vagina pilko.
Merbromino. Miksturo. Ungvento. Sparadrapo./ Oni devas tre prudente dozi la toksajn kuracilojn.

Profilaktiko : Preventa medicino. Preventi. Dispensario. Preventorio. Sanatorio. Propagi epidemion, mikrobojn. (La ratoj kontaĝas peston). Sanitara kordono. Lazareto. Kvaranteno. Kvarantenigi ŝipon. Kovejo de epidemio. Vakcino antaŭgardas de la variolo. Serumo imunigas kontraŭ... Unu fava ŝafo tutan ŝafaron infektas. Fokuso de epidemio. Infekti iun je tuberkulozo per sia tuso. Tuberkuloza unue-infektiĝo. Kutireakcio (pro tuberkulino). Sanatesto./ Desinfekti. Seninfektigi. Reserĉi la aganton de... (kancero). Hospitalo. Kliniko. Sanitara zorgado. Sociala ŝtata asekuro. Mutuala societo.

Flegi. Perbuŝa kuracado. Perbuŝe. Detergi vundon (per oksigenakvo). Joda tinkturo. Dreni absceson. Sondi la vezikon. Pansi (bandaĝo). Surmeti pansaĵon sur vundon. Pansobendo. Provizore bandaĝi, ĝis oni povos venigi la kuraciston. Vindi. Kompreso. Donadu akurate la medikamentojn./ Kinezoterapio. Kinezoterapeŭto.

Gargari sin per... Skarifiki (kupo). Kaŭterpunktoj. Fajropunktoj. Perfuzi. La paciento havis du seancojn de radioskopio.

25. Malvarmumo. Korizo. Fojnkataro. Astmo./ (Alergio). Sinusito. Adenoidaj vegetaĵoj. Laringito (akuta, kronika). Krupo. Difterio. Otito.

Bronkito (pusa). Emfizemo. Pneŭmonito (= pneŭmonio). Tuberkulozo. Ftizo (salubra aero, sanatorio). Kokluŝo.

Misdigesto. Ulcero. Iktero. Lakso (= diareo).
Konstipo. Intesta okluzio. Hernio (umbilika, ingvena, strangolita).

Hemoroidoj. Varikoj. Flebito. Infarkto (pulma, de la miokardio). Brustangoro.

Litiazo (kalkulusoj). Gruzmalsano./ Ekzemo. Skabio. Frostoŝvelo (pernio). Zostera erupcio. Morbilo. Mumpso.

30. Gripo. Rabio. Tetanoso./ Diabeto. Migreno. Neŭralgio. Paralizo./ Podagro. Tortikolo. Reŭmatismo. Kancero./ Pesto. Sifiliso (reago de Vaserman). Hereda malsano. Aideso.
Parkinsona morbo. Sepsemio.

Absceso (resolucio). Kontuzo. Skrap-, ŝir-, mord-, ung-,

31 KURACI

pik-, bat-, brul-, streĉvundo. Lumbago. Vidu : OPERACIO.

SANO : fizika, morala. Kiel vi fartas? Esti en bona stato, bonfarta. La sano ne estas ĉio, sed sen sano ĉio estas nenio. Nenio anstataŭas la sanon. Havi fortikan sanon. Kverka sano. Ĝui, detrui, perdi la sanon.

**Notoj :** Alternativa medicino. Aromoterapio. Medicina bildaro (radiografio, skanografio, scintilografio, magneta resonanco, numerizita angiografio).

## 32 LABORO

*"Kia estas via laboro, tia estas via valoro."*

1. Laboro vana, intensa, laciga, herkula, sizifa. Laboro urĝas, premas, nobligas. Labori plu (= daŭrigi la laboron), per propraj fortoj, por malgranda salajro, laŭ la mezuro de siaj fortoj, por komuna utilo. Laboristo simpla, specialigita, alte kvalifikita.

Ek al la laboro! Kuraĝe entrepreni ion. Preni la bovon per la kornoj (= iri rekte al la malfacilaĵoj). Esti bolanta de energio. Febre sin ĵeti al la laboro. Profundiĝi en la laboro. Konscience fari sian taskon. Esti absorbita de sia okupo. Labori el la tuta koro. Heroo de la socialista laboro (laborbrigado). Labori ĝis elĉerpiĝo de sia forto.

Havi multon por fari. Sidi, droni en la laboroj, ĝis super la oreloj. Esti superŝutita de laboro. Kurbiĝi de multa laboro. Peni per ĉiuj fortoj. Tio estas super ĉiuj homaj fortoj.

Akceli la laboron, kiu alie povus senfine treniĝi. Multope ni pli frue finos la laboron ol unuope. Unuigi la fortojn.

5. Esprimi la bedaŭron ne povi helpi iun. Min doloras la nepovado helpi vin. Mi estas nun absolute ne kapabla por iu laboro, ne kapabla je io. Por kiu okupo vi sentas vin kapabla? Kio estas via okupo? Havi neniun okupon.

Efika helpo. Helpate de neniu, mi... Kun la helpo... Kiom eblas fari per homaj kapabloj. Avara je helpo. La kvina rado ĉe veturado. Rifuzi sian helpon./ Ĝui tempeton de

neokupiteco. Neniun helpanton plu mi deziras.

Laŭnatura inklino al malpenado. Havi hororon de la laboro. Leĝo pri minimuma peno. Elekti la pli facilan parton, flankon de la laboro. Li faris mienon, kvazaŭ li laborus. Farigi per sia frato sian malfacilan laboron. Serĉi pretekston por nenion fari. Li ne kuras post la laboro. Morgaŭ estas la amata tago de la mallaboremuloj. Ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ. Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras. Senlaboreco estas la patrino de ĉiuj malvirtoj.

Mallaborema, "pigra"./ "Nomis la leporo la testudon pigra" (fablo: Kalocsay). Gapanta nenifarulo. Nenifari pied-balance. Kalkuli la muŝojn.

Laboro ne estas hontinda. Memori pri mezuro en laboro kaj plezuro. Oni vokas la bovon ne festeni, sed treni.

10. Laboron! Panon!/ Laboro homon nutras. Vivi de sia laboro. Akiri sian vivpanon, siajn vivrimedojn./ Li havis bonan porvivaĵon, eĉ iom pli. "En mia kampo kuŝas sin trezoro. Vi trovos ĝin serĉante kun fervoro." (fablo: Kalocsay).
Prikalkuli la esperatan enspezon. Postuli la prezon de sia laboro. Egala pago por egala laboro.
"Lukra" okupo, posteno. Kiom vi "lukras"? Ni povas meznombre perlabori ok dolarojn. Pandona okupo. Esti pagata laŭ sia laboro. Mia laboro valoras kelkoble pli, ol kiom vi donas al mi por ĝi. Certigi al la laboristoj justan salajron. Horpage, kvantopage labori. Laborenspezo. Porlabora pago. Gajni sian vivtenon per la ŝvito de sia frunto. Li perdis sian laboron, kaj de afliktiĝo li malsaniĝis. Senlaborulo.

Metiisto, metilernanto. (Tempo de provado de metilernado). Proleto. Salajrulo. Dungito. Dungi. Ŝtata, privata dungoficejo. Laborperejo. La merkato pri laborforto. Taglaboristo. Laŭjara dungito. La dunganto devas pagi la duonon de la sociala asekuro. Laborakcidento. Publika asistado al la laborkripluloj. Plena dungiteco. Subdungiteco. La plena dungiĝado estas la ĉefa postulo de la sindikatoj.

Blokado de la salajroj. Protestondoj leviĝis ĉie. Blovis vento de striko. Striko: sovaĝa (nesindikata), loktena (la

laboristoj restas sur la laborlokoj), lanteca (ili laboras "lante"), surpriza. Aperis granda strikondo./ Redukti la nombron de la laborhoroj. Revalorigi la aĉetpovon de la laboristoj.

Partoprenigi la laboristojn en la profitoj de la entrepreno. Socialigi la grandajn ŝtalfabrikojn (krizo atakis la pezan industrion). La 8-hora labortago. La 40-hora semajno. Semajnfino.
Triskipa laboro. Tag-, noktoskipo.
La direkcio decidis redukti la nombron de la laboristoj./ Arbitracii konflikton socialan./ Mediacio. Paroloj en vento. Paternalismo. "Malasiduismo" estas formo de sabotado. Ekspansio. Liberalismo. Direktismo. Postuli akceladon de la laboro, de la laborkadencoj. Aŭtomacio. Ekspluati la proletaron./ Laboristaj centraloj. Laborborso. Ekspluatado de homo fare de homo, de homo al homo. Niveli la klasojn sociajn.

Eluzi siajn fortojn por vanaj penoj. Vana laboro. Melki virkapron. Serĉi kudrilon en fojnstako. Batadi venton. Ĉerpi akvon per kribrilo. Erpi la maron. Draŝi fojnon. Vana teoria laboro kaj senutila batado de vento. Konfesi la vanecon de siaj penoj.

15. Laboro estas balzamo kontraŭ ĉagreno. Laboro lumas la solecon. Per pacienco kaj fervoro sukcesas ĉiu laboro. Laŭ sia laboro laboristo taksiĝas. Oni devas taksi homon laŭ liaj meritoj./ Doni al iu bonegajn atestojn. Tro da metioj, profitoj neniaj. Ĉiu klopodu en sia metio, tiam al la urbo mankos nenio. Laboro finita, ripozo merita.

**Notoj :** Rilaksado.

## 33 LERNI - INSTRUI

*"Kiu ripetas abunde, lernas plej funde."*

1. Lernejo elementa, mezgrada, duagrada, supera, teknika, komerca, politeknika./ Konfesia, trologata, faka.
Vartejo. Infanĝardeno. Kolegio, liceo, gimnazio. Instituto.

Lernanto naturdotita, diligenta, bona, atenta, pigra, nove bakita; la plej forta (en ĉio, en sia klaso), "asidua" (al la lernejo)./ Viziti la vagantan lernejon.

Inteligenta : nivelo (debilulo, malfruiĝinto), kapablo(j). Testi lernanton./ Inteligenteco./ La filozofian ŝtonon, la pulvon li ne elpensis. Li ne estas aglo. Li neniam venkis la alfabeton. Ne povi distingi inter sia dekstra kaj maldekstra mano. Li ŝvitas ankoraŭ super la alfabeto.

Lernejo por malfruiĝintoj./ Kampanjo kontraŭ analfabeteco. Likvidi la analfabetecon ĉe la popolo.

5. Memorkapablo estas necesa por bona lernanto./ Papage ripeti gurditan lecionon.

La frueco de lia inteligento estas mirinda.

Multesperiga infano. Realigi, plenumi la esperojn sur lin metitajn. La honoro de nia familio. Kiom mi konas mian infanon, li sukcesos.
Havi la noton : tre bone, bone, ne tute bone, meze bone. La noto kvar signifas : bone. Ricevi la plej altan noton. Superi la rivalon per du poentoj.

Atendi rekompencon por sia bona konduto. Marko de bona konduto. Admoni lernanton pro lia maldiligenteco. Skribopuno. Pluvas punoj. Esti anĝelo inter la homoj sed satano en la domo.

Ekzerco de legado, skribado. Slojdo. Ekspliki tekston malfacilan, ekstemporale. Asimili novajn sciojn. Parkerigi. Parkeri la regulojn sen asimili ilin./ Ripetado estas la plej bona lernado. Reciti sian lecionon./ La troŝarĝado de la lernejaj programoj.

Tornistro. Liniilo. Cirkelo. Frotgumo. Angulmezurilo. Ortilo./ Forgumi krajonan noton.

Pedagogio estas arto (aktiva, pasiva pedagogio). Estri siajn afekciojn estas pedagogia postulato. Instruante, ni lernas. Instruado estas por ŝi vera apostoleco. Dediĉi sin al instruo. Instrui ion al iu, instrui iun pri io. Direkti ies studojn, lernanton.
Gvidi, fari korespondan, vesperan, perfektigan, fakultativan kurson. Aŭskulti ies instruon.

Abisma, nesondebla nesciado. Nesatigebla sciavido. Homo lernas dum sia tuta vivo. Neniu scias ĉion. Lerni el la propra damaĝo. Dediĉi multan tempon al lernado de lingvo. Ellerni.

33 LERNI

Aŭtodidakto./ Intuicia scio./ Libraj scioj. Erudiciulo profunda erudicio). Klerulo (lia profunda klereco). Studento pri botaniko. Stipendio. Profesoro de (pri) matematiko. Profesora tono, aŭtoritato.

Studi sub profesoro K... Li havas ĉiujn atutojn por sukcesi. Faktoro de sukceso. Tiu unua sukceso estas bona aŭguro por la fina venko. Fari ĉion necesan por sukcesi. Supoze ke ĉio prosperos, vi sukcesos. Rikolti laŭrojn. Abituriento. Bakalaŭro (posedas bakalaŭrecon).

Fari siajn klasikajn studojn. Juraj studoj./ Preni privatajn lecionojn pri la angla lingvo. Fakultato pri beletro, juro, medicino. Natursciencoj, homaj sciencoj./ Asistanto de botaniko.

15. Ekzameniĝi. Havi fidon pri la sukceso. Trapasi ekzamenon. Prezentiĝi antaŭ ekzamenonto./ Altigi la nivelon de la ekzamenoj. Elimini kandidaton. Elimina ekzameno. Li ricevis du nulojn ĉe la ekzameno./ Atendi kun streĉita atendo la rezulton de la ekzameno./ Mi deziras al vi sincere la plej bonan sukceson./ Li sukcesis ĉe la ekzameno, sukcese trapasis la ekzamenon.
Sensukcese kandidatiĝi./ Deprimita de sia malsukceso. (depresio).

Diplomo. Atesto pri lernado, pri kapableco (de instruado). Doktora tezo./ Honordoktoro.

Ovo kokinon ne instruas./ Al fiŝo ne instruu naĝarton.

**Notoj :**

## 34 LETERO - TELEGRAMO - TELEFONO

1. Letero aŭtenta, anonima, kondolenca, kompromita, registrita, nefermita (= publika al...), neta (malneto), ne sufiĉe afrankita.
Letero(j)n respondi, dati, tajpi, poŝti, sendi, registri, deĉifri, ĉifi, bruligi, ĵeti en la paperkorbon.

Bileto (ama). Cirkulero. Ĉenletero.

"Mi legis vian leteron kun aparta intereso...
"Mi nenion aŭdis de vi... Mi rapidas respondi la demandon,

antaŭ ol vi... Mi volis siatempe respondi al vi. Mi sendas ĉi-ene poemon.
"Respondu per revenanta poŝto (revenpoŝte).
"Akceptu mian plej koran dankon. Mi estas tutkore via. Kun profunda estimo.
"Atendante vian respondon, mi restas altestime via. Simpatie via. Mi sendas al vi miajn sincerajn bondezirojn, kondolencojn. Anticipa(j)n danko(j)n."

Familiara stilo./ Skribi sub ies diktado./ Atesti la subskribon de iu. Subskribo aŭtentika (= aŭtenta). Malkonfesi sian subskribon./ Falsi ies subskribon. (signaturo)./ Kopio konforma al la originalo. Akurata respondo. Li ĉiam estas akurata kun siaj respondoj. Senatende respondi.

5. Bombardi iun per leteroj. Ne trovi eĉ unu minuton por la kuranta korespondo. Letero skribita kun "hasto". Neglekti sian korespondaĵon. Via letero kruciĝis kun la mia./ Ne forgesu dati viajn leterojn.

Koverto. Stampi sian adreson, la nomon de la sendinto sur la koverto./ Letero adresita al X... zorge de S-ro Y. Adresato.

Kia estas la afranko por tiu presaĵo? Afranki per memorfesta poŝtmarko. Punpago por ne sufiĉa afranko. Respondkupono. La korespondo kun soldatoj estas senafranka./ Filatelisto.

Direkti leteron al iu./ Maltrankvile atendi respondon. Letero sendita el tre malproksime, aerpoŝte; alveninta ĝustatempe.
Elkovertigi leteron. Legi inter la linioj.

10. Poŝtrestante. Avizi pri ricevo de registrita letero. Ricevatesto. Aerogramo. Aerpoŝto.

Mesaĝo. Kuriero./ La poŝta konvencio de Berno. Telegramo. Ĉifri telegramon. Kodo./ Ekspedi telegramon. Telegrafa stilo.
Mi telegrafos al vi morgaŭ, ĉu mi venos aŭ ne. Transdoni la telegramon nefermita. Telegramportisto. Depeŝo.

Telefono. Telefonbudo. Esti ĉe la telefono. Mi trakonektos al vi la direktoron. Vaka telefona cirkvito. "Lo! Ha lo, S-ro Levi?". Respondi la telefonon. Signalo de okupiteco.

Diski la numeron 8.3.4./ Mi malbone vin ricevas. Mi tratranĉas la konekton, la telefonan komunikon.

Telefona lineo, budo, centralo, alvoko. Longdistanca telefonado. Granddistanda lineo./ Lia lineo estas subaŭskultata de la polico./ Telefonlibro. Telefonnumero./ Avizo pri la uzado de la telefono./

15. Ŝnuri paketon./ Sendi librojn kun pagoŝarĝo. (La akceptanto pagas la valoron de la sendaĵo plus, eventuale, la sendokostojn)./ Giĉeto.

**Notoj :**

## 35 LIBRO - LEGI

1. Stilo klara, glata, natura, lapidara, flua, rigida, konfuza, tute populara, pitoreska, elokventa, originala, seka, familiara, telegrafa, konciza, lakona, pompa.
Stilon poluri, rafini, glatigi, novigi.

Stilaj malglataĵoj. Unuformeco de la stilo. Figurriĉa stilo. Doni reliefon al sia stilo. Teksto farĉita per ŝablonaj, gurditaj, banalaj esprimoj. Kliŝoj. Trivitaj metaforoj./ Nuanco de stilo. Pika originaleco de la stilo. Stillerta verkisto./ Klareco estas la distingo (marko) de bona stilo./ Bele tornita frazo. Kultismo (afekta, rafinita prilaboro de la stilo).

Admiru la nudecon de lia stilo. La noveco de tiu stilo ne kompensas ĝian malbelecon./ La pompo de la stilo ne sufiĉas por kaŝi la senhavecon de la verko.

Verko, romano : aventura, detektiva, sciencfikcia, drama, komedia, romaneska, fantasta, enuiga, nigra, malserioza, instrua.
Simpla, malsimpla intrigo./ Pornografio. Lasi liberan flugon al sia fantazio.

5. La fono de la romano estas Nederlando. Ĉerpi materialon el ies verko. Plagiati. Rebaki la tutan verkon./ Tio estas frukto de lia unuatempa verkado. Li rakontis pecon el siaj bubaj jaroj. Honorarioj de aŭtoro de libro. Rezigni la aŭtorrajton. Jurisprudenco pri aŭtora proprieto. Rajto de aŭtoreco.

Dediĉi libron al iu. Omaĝi al iu per dediĉo de libro./ Malkonfesi verkon.

Kopii laŭ la originala manuskripto. Libro. Manuskripto prespreta. Libro broŝurita, lede bindita./ Jaketo. Dorso de libro. Luksa eldono. Eldono kun notoj. Definitiva, elĉerpita eldono. Libro dividita en 30 ĉapitroj. Tabelo de enhavo.

La libra merkato. Bibliofilo. Ekslibriso./ Libro de eleganta tipografio./ Vinjeto.

Formato : libro en plej granda formato. Formato de 14 per 20 centimetroj. Folianto. Kvarto. Oktavo. Duonoktavo.

10. LEGI. Leginda libro. Renkonti plaĉon ĉe la legantoj. Legi libron per unu spiro. Papilie tralegi libron. Ŝi ofte transsaltis tutajn liniojn, la paĝojn de priskribo./ Paĝosigno./ Diĝesto.

Legado de verkoj de la grandaj pensistoj. Narkota legaĵo. Senti naŭzon ĉe la legado de firomano. Ne ofendu la orelojn de viaj junaj legantoj. La ĝenerala malvigliĝo de la legemo dum somero.

Biblioteko prunta, konsulta, rondiranta, referenca. Misloki libron en biblioteko. Enfermi sin en sia biblioteko./ Provizi bibliotekon per binditaj libroj./ Inkunablo.

**Notoj :**

## 36 LINGVO

1. Lingvo nacia, hereda, patrina, prunta, vivanta, mortinta, artefarita, planizita.
Lingvon posedi, povoscii (= scipovi), majstri, primajstri. Sian lingvon fajli, poluri.

Dialekto, idiomo, ĵargono, slango./ Lingvo degenerinta en slangon./ Idiotismo./ La lingvo de la floroj, de la koro, de la rigardoj.

Ni ja scias, ke da lingvoj ekzistas tre multaj. Babelo: tie la Eternulo konfuzis la lingvon de la tuta tero.
La homoj ne komprenas unu la alian. Ne paroli alian

lingvon krom sia propra lingvo. Ne paroli alian lingvon ol sian propran lingvon.

Dediĉi multajn jarojn al la lernado de lingvoj. Fuŝparoli kvin, ses lingvojn.

"Tie la membro de unu nacio humiliĝas antaŭ la membro de alia nacio, parolante lian lingvon kaj hontigante la sian" (Z).
"Tie la membro de unu nacio indignas kontraŭ la membro de alia nacio parolanta sian lingvon kaj neglektanta la lian." (Z).

Scipovi lingvon libre, ne libere. Li afektis ne scii sian nacian lingvon. Senco: uzi vorton en la strikta, larĝa senco; en la jura, religia senco.
La senco de ambaŭ vortoj estas malsama.

5. Regulo, kiu akceptas multajn esceptojn./ La pola lingvo akceptas konstantan akcenton sur la antaŭlasta silabo.

ESPERANTO : Ne sufiĉas nomi lingvon tutmonda, por ke ĝi estu tia. Oni ne povas kredi, ĝis kia grado atingas ĝia facileco./ Ekzemple: jena frazo enhavas ĉiujn formojn de verbo:

"La buĉisto diris, ke li bedaŭras, sed estos necese, ke mi pagu kontante (kvankam) estus pli oportune por mi pagi kredite." (El: KREDU MIN, SINJORINO)

Esperanto estas multajn fojojn pli facila ol ĉiu ajn natura lingvo.
Anstataŭ ke ĉiu lernas diversajn lingvojn, ĉiu ellernadu la saman lingvon.

Estas pli facile varbi iun al Esperanto, ol fari, ke li lernu la lingvon./ Novebakita esperantisto.

La demando ĉu Esperanto povas havi poezion ne plu estas diskutebla./ La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en aliaj lingvoj.

10. La Biblio estas la ĉefa bazo, sur kiu lingvoj literaturiĝis. Biblio estas pli grava... ol la posedo de multe pli granda kvanto de aliaj lingvoj.

**Notoj :** Akronimo.

## 37 LOĜI - DOMO - HEJMO - URBO

*"Neniu estas profeto en sia urbeto."*

1. Dom(et)o kampara, urba, biena, ĝemela, kaduka, komforta, argila, gaje aspektanta, afablaspekta, la patra, la hereda, la hejma.
Domon konstrui, purigi, ornami, heredi./ Setli. Plansetligi.

Entreprenisto./ Firme fundamentita dombloko. Domo el brikoj kun betona armaturo. Antaŭpreparita, armita betono./ Gruo. Skafaldo./ Izoli la murojn kontraŭ bruo. Sonizoli.

Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam de longe konstruita./ Fariĝi predo de flamoj. Asekuri. Kaduka, vilaĝa dometo en tia stato, ke necesis deskrapi la malnovan kalkaĵon. Ŝmiri muron per mortero.

Kvarĉambra apartamento luebla, senrivala pro sia favora, pitoreska situo sur la supro de la monteto./ Altano. Belvedero.

5. Dormo-, manĝo-, viv-, banĉambro. Kabineto (por labori). Necesejo (klozeto, latrino)./ Forŝprucigilo de klozeto./ Septi salonon en du ĉambrojn. Ŝanĝi la dispozicion de... Subtegmenta, malluma ĉambro. Kamero. Mansardo. Alkovo.

Tegmento (vidu PIV, p.1267) : ebena, el ardezoj, tegoloj, ŝindoj, pajlo, kanoj./ Firsto. Tegmenta fluilo. Pinjono.

Kampara hejmeto, bangalo, kabano, barako, pavilono. Palaco. Nubskrapulo. Babilonaj domblokoj. Ladvilaĝo (onda lado)./ Izolita domo en kamparo. Vivi izole de la mondo./ Karavano (= ruldomo).

PORDO vitra, krada, unuklapa, duklapa. Pordon fermi, ŝlosi, barikadi, rigli; lasi larĝe, duone malfermita; fermita nur senŝlose./ Ekbruis la fermata pordo.

Puŝfermi, ŝlosfermi, tirfermi. La ŝlosado de la pordo estis komandata de ekstere (per elektra cirkvito). Pordo kondukanta el la ĉambro en la ĝardenon, donanta aliron al la strato.

10. Sonorigi ĉe ies pordo. Interfono. Luketo. Frapi je la pordo. Respondi la pordon. Malfermi la pordon en plena larĝo. Puŝi la pordon per piedoj. Frapfermi la pordon antaŭ

ies nazo. Forpeli iun tra la pordo./ Elĵetita tra la pordo, li revenas tra la fenestro. Eniri pordpuŝe, kune kun la pordo. Balai antaŭ sia pordo./ Se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, tiam en la urbo estos ordo.

Frapi je ies pordo por peti helpon. Homoj pri kiuj ni ne scias, de kie ili estas. Frapu kaj estos malfermita al vi. Kiu frapas, al tiu oni malfermas. Ora ŝlosilo ĉion malfermas.

Sojlo, lintelo, kadro (framo). Seruro. Manilo./ Serurlango, serurbuŝo. Klinko. Dirko. Paspartuo. Anstataŭanta ŝlosilo.

FENESTRO rigardanta al la korto, eliranta sur la strato. Levi la rulkurtenon. Sin montri ĉe la fenestro. Fenestrovitroj kovritaj de rosumo. Lumitaj fenestroj. Embrazuro. Ŝproso. Fenestrumo. Ŝutro. Provizi fenestrojn per vitroj. Stela fendiĝo de vitro. Ĵaluzio, persieno, luko, vasistaso./ Fenestra alo. Blinda fenestro.

HEJMO : Fari sian neston./ Asekuri sian domon kontraŭ incendio./ Enloĝi. Senti sin ĉe si. Estas tempo iri hejmen, domen. Atakis lin sopiro al la hejmo. Sin aranĝi komforte.

15. Eniri kaj ŝlosi la pordon post si. Senti sin kiel hejme. Sidadi hejme. Hejmosidulo. Sur kioma etaĝo vi loĝas? Sur la lasta. Loĝi en la dua etaĝo.

Doma vivo. Resti dome. Plenumi la mastrumajn laborojn. Mastrumi. Esti mastro en sia domo. Eksterigi iun el sia domo.

Luigi. Vicluigi. Lui ĉambron. Pagi la luprezon je la unua de ĉiu trimestro. Ni amas, ke oni pagu akurate la luan prezon. La luiganto rezervas al si la rajton repreni por sia uzo la domon en la okazo, se... Mi luigis mian apartamenton por la daŭro de... Oni avizis min, ke mi devos delasi mian apartamenton post tri monatoj./ Leĝe eldomigi iun.

Akvo-, gas-, elektrokomputilo.

HEJTADO : La elektra hejtado estas multekosta. Centra hejtado. Vaporhejtado./ Varmizoli./ Asbesto estas varmizola materialo. (Vidu: 65/9).

20. Kameno, kiu tiras malbone. Kamenbreto. Fendro. Ekrano. Fajrhundo. Noĉostango.

LOĜI 37

URBO : Domicilo. La leĝo de la unua okupanto. Ŝanĝi loĝejon. Translоĝiĝi. Rezidi en dense loĝata urbo. Li loĝas en mia najbaraĵo. Homogena loĝantaro, kiu kalkuliĝas al 3 500 homoj.

Densa, maldensa loĝateco. La optimuma denseco de la loĝantaro. Troloĝata regiono. Urbo ne tre multhoma. Loĝi en unu el la plej malriĉaj stratoj./ Sakstrato. La surfundaĵo de la loĝantaro (plej malestiminda parto).

Ŝi estas virino popolamasa. La urbo ne estas tre multe loĝata. Kia abomena urbeto. Iri al la urbo. Loĝi en la urbo.

Urboplanismo. Urbanizi./ Aksa prilumado de la stratoj. Akvodukto: la provizado de la modernaj urboj je akvo estas en somero grava problemo. Kloako. Kloakfaŭko. Kloakisto.

25. Urbestro. Magistro. Konsilantaro (= konsilio).

**Notoj :**

## 38 LUDI

*"Kiu ne riskas, tiu ne gajnas."*

1. Pri infanoj : "Lotu, por ke ni sciu, kiu ludos la unua." Ili lotis kaj la loto falis sur lin, trafis lin. La loto decidos; ĉesigis la disputojn.

Ludi "rabistoj kaj ĝendarmo". Ludi "kaŝiĝo" (kukui). Ludi je averso aŭ reverso, fronto aŭ dorso de monero. "Vi estas varma" (proksime al la serĉata objekto de la ludo). Blind-ludo.

"Divenu kiom da nuksoj mi havas en la mano". Lasi tri provojn por diveni. Diveni malĝuste. Morao. Tuŝludo. Ŝafsaltado./ Rulringo. Ŝnursalti. Ludi globetojn, keglojn. Ludi soldatojn. Stanaj soldatoj.

Sin balanci sur tabulo. Balanciloj: baskulo, pendolilo. Baskulludo.

5. Ludi kun sia pupo. Ludi per ostoj (kiel kegloj). Treti kolorajn bidojn. Tredi fadenon tra koloraj bidoj.

Paradiza ludo. Turbo. Puzlo.

Kroketludo (arkoj). Bilboko. Volano. Diabolo./ Polmoludo.

KARTOJ : Kartaro. Partio de kartoj. Gajni, perdi la partion. Kvaro da kartludantoj. Partnero.

La naŭ de piko, trefa damo./ Reĝo. Damo. Fanto (= bubo) Piko. Trefo. Karoo. Kero./ Aso. Trio de asoj.

10. Miksi, disdoni, sterni la kartojn. Egaligi la ŝancojn inter la ludantoj./ Surtabligi siajn kartojn. Atuti. La atuto estas kero. Superatuti. Renonci./ Talono. Ŝlemo.

Nun estas via vico ludi. Fari ĉeson (provizore rezigni pri rajto ludi).

Li prenis du prenojn kaj mi faris tri. Poentoj. Gajni en kartludo. Havi fortunon ĉe la ludkarto./ Blufi (en pokera ludo). Ŝkopi. Ĝui peĉe nigran misfortunon ĉe pokero./ Ili ludis kartojn je grandaj sumoj. La amo al kartludo lin plene ruinigis.

Konata trompisto ĉe kartludo./ Kibico.

15. Damoj. Ludi damojn. Disko de damludo. Blovi.

Ŝako. La 64 ĉeloj de la ŝaktabulo. La pecoj de la ŝakludo. Ĉevalo. Reĝo. Damo. Kuriero. Peono. Aroki. Ŝako per malkovro. Mato. Pato. Diagonalo.

Sagaca solvo de ŝakproblemo.

Hazardludoj: bakarato, ruleto./ Krupiero./ Kazino. Ludi per alta sumo. La ĵeto estas farita. Riski monon en ludo. Kvarobligi sian ludmonon. Ricevi okoblan gajnon el sia vetmono.

Bilardo. Karamboli. Defii amikon ĉe bilardo.

20. La ludo ne valoras la kandelon.

Vortludo: Diamanto, di-amanto. Esperanto, edz-peranto. Viando estas dolĉa aĵo sed ne dolĉaĵo. La aŭtomato estas sprita aĵo sed ne spritaĵo. Ne estas novaĵo, ke nova aĵo plaĉas. Pli facile estas ordoni, ol oron doni.
Trovi la solvon de enigmo./ Kalemburo.
Kontraŭknalo : Labori fiŝe kaj muse; Labori fuŝe kaj mise.
**Notoj :** Hobio.

## 39 MANO - BRAKO - FINGRO

*"Mano dekstra ne sciu, kion faras la maldekstra."*

1. La linioj de la mano./ Mano karnodika. Havi la manojn malpuraj. Havi rompitan brakon.

Etendi la manon (por almozo). Ŝovi la manon en la poŝon. Teni la manon laŭlonge de la kruroj (soldato). Reveni kun plenaj manoj. Plenmano el faruno, da floroj. Pinĉaĵo da salo.

Pugni la manon. Minaci iun per la pugno. Svingi la manon, la pugnon./ Kontente interfroti la manojn. Froti al si la manojn.

Iri mano en mano, brako en brako, interkroĉite per la etaj fingroj./ Preni, kapti iun ĉe la brako, ĉirkaŭ la korpo.

5. Preni iun je la mano (= lia) per la mano (= sia). Ŝi falis kaj ekkaptis min per la manoj (= siaj), je la piedoj (= miaj).

Preni, teni, kapti iun je (ĉe) la brako.

Preni sian kapon per ambaŭ manoj. Tuŝi, preni per profanaj, seninicaj manoj. Havi la vortaron prete sub la mano, ĉemane.

For la manojn!/ Fali en la manojn de iu./ Foriri kun plenaj manoj./ Fera mano en velura ganto.

Atrofiita brako./ Resti, sidi kun krucitaj brakoj. Kruci, kunŝovi, disŝovi la brakojn./ Porti ion sub (en) la brakoj. Sin apogi sur ies brakoj. Apogi sin sur la kubutoj. La atingo de mia brako ne estis sufiĉa por kapti la libron el la breto. Strebi mane kaj piede.

10. Fingro : dika (polekso), montra, longa, ringa, malgranda.. Meti la fingron sur ion (serĉante trafi ion). Nervoze tamburi per fingroj sur tablo./ Ne movi eĉ unu fingron./ Mordi al si la ungojn. Donu fingron al avidulo, la tutan manon li postulas. Polmo. Mandorso. Manartiko (= pojno)/. Falango. Ungo (kaj duonluno). Enkarniĝinta ungo./ Bulmano (denaska misformiĝo).

**Notoj :**

# 40 MANĜI

*"Dum la manĝado, venas apetito."*

1. Bonan apetiton! Veki, stimuli, eksciti, perdi apetiton. Solida apetito. Senapetiteco. Aperitivo. Venigi akvon en la buŝon. Manĝi, gluti ion per la okuloj.

Manĝi sen apetito, nur per dentopintoj, tiom kiom birdeto. Manĝi modere, ĝis krevo, ĝissate. Plenŝtopi sian ventron. Disbuki zonon pli vaste. Havi la okulojn pli grandajn ol la ventro. Ekscesoj en la manĝado.

Malsata kiel lupo. Krevi, morti de malsato. Suferi malsaton./ Doni al iu (por) manĝi kaj trinki.

Formanĝi, gluti ion per unu gluto. Bulimio. Fari misgluton. Gluti misvojen. Senmaĉe gluti. Leki al si la lipojn.

5. Havi nenion por manĝi. Li ricevis pli ol kiom lia porcio. Porciolimigo en milittempo. La registaro porciumis la kafon. Porciuma karto. Malbloki kontingenton de sukero./ Surogato.

Neelĉerpebla provizo de manĝajoj. Provianto. "Viktualio".

Ne por manĝi ni vivas, sed por vivi ni manĝas./ Dufoja manĝado en la tago.

La plezuroj de la tablo. Ĝui delikatajn manĝojn. Delektinda, fajna manĝo. Fidi la fajnan guston, la nazon de sia ĉefkuiristo. Aranĝi delikatan, rafinitan menuon.

La odoro de la rostaĵo tiklis ĉies nazon. La rostata kokido apetitveke oriĝis. La tagmanĝo vin atendas. Malfruiĝi al la tagmanĝo. Preni tagmanĝon en restoracio. Inviti iun ĉe sia tablo./ Albergo.

10. La prezo de la manĝo estas 8 frankoj. En tiu prezo estas entenata la vino. 8 frankoj ekskluzive je, de la vino. La prezo ekskluzivas, inkluzivas, inkludas...

Preni tagmanĝon en restoracio kun fiksa prezo, laŭ karto. Rekomendita restoracio. Kafeterio. Kantino. Refektorio./ Bufedo. Pikniki. Kunporti ne varman manĝaĵon./ Konservaĵo el.../ Ladmanĝo (ladlakto, ladbovaĵo).

Kiaj estas la horoj de la manĝoj? Unua manĝmeto.

Primeti la tablon (alonĝo). Kompleta servico el fajenco (teleroj, pladoj, saŭcujo, salatujo, supujo). Servico da glasoj. Servico-ŝranko./ Bovlo. Fingrolava bovlo. Breĉetita telero. Rustimuna tranĉilo./ Korodimuna klingo.

Surtabligi manĝaĵon. Servi ĉe tablo. Kelnero./ Trinkmono. Riĉe, abunde primetita tablo./ Surtabligi la fruktojn (en la fino de la manĝo).

15. "OSIP! Prenu supon al vi!" Atentu, via maniko trempiĝas en la saŭco.

Sin regali per bona manĝo. Riĉa manĝaĵo.

MENUO : Supo legoma, vianda, porea, piza, avena, kun cepoj. Senŝaŭmigi supon. Blovi la supon (se tro varma). Kubo de kondensita supo. Buljono. Konsomeo./ Pureo.

Almanĝaĵoj : artiŝokoj, anŝovoj.

Entreoj : pasteĉo de anserhepato kun trufoj.

20. Viandoj : ŝafaĵo en raguo. Kradrostita ŝafripaĵo. Klabo. Porka kotleto panerumita. Bovida farĉita brustaĵo. Fileaj ŝafkotletoj. Bovida eskalopo. Stufita, brezita bovidaĵo. Lardaj kubetoj frititaj. Lardita ŝaffemuraĵo. Panumita ripaĵo.

Fiŝaĵoj : Krustetoj kun soleaj fileoj. Bujabeso kun ajlitaj krustetoj./ Abomeni ostrojn./ Senskvamigi, sentripigi fiŝon antaŭ la kuirado.

Ovo : bati ovon. Kirli ovoblankon al ŝaŭmo. Omleto kun lardo, kun asparagaj pintoj, kun aromherboj, kun konfitaĵo. Ŝinkomleto. Bati, kirli./ Enŝele boligitaj ovoj./ Ovoblanko (albumeno). Flavo de ovo./ Poĉi ovojn./ Sorbi krudan ovon. Freŝa ovo.

Mi volas havi la ovon kuiritan (= kiu estas kuirita). Mi volas havi la ovon kuirita (= ke la ovo estu kuirita).

La ovoj, ju pli longe estas kuiritaj, fariĝas des pli malmolaj (mole, malmole kuirita ovo).

25. Legomoj : Terpomoj farĉitaj, stufitaj, frit-ŝveligitaj, pajle frititaj, ŝelkuiritaj. Kaĉo terpoma. Gratenita terpoma kaĉo. Kuiri terpomojn en ilia haŭto. Saŭrkraŭto. Brogi brasikon. Kaĉo el aveno. Avenflokoj. Flokoj de maizo./

Tomato, ajlo kaj olivoleo mirinde akordas.

Deserto : Ĉokolada kremaĵo (suĉi stangeton de ĉokolado); briketo, tabuleto de ĉokolado./ Sekvinberaj kukoj. Babao. Brioĉo. Spongokuko./ Batita kremo. Konfitaĵo. Marmelado. Ĵeleo el pomoj, riboj (koagulita fruktosuko). Konfitaj ĉerizoj. Delikate alkoholigita kremaĵo, kuko.

Kafo forta. Espreso. Kuiri, preni kafon./ Perkolatoro.

INTERNACIA KUIRLIBRO : Recepto./ Brezi. Brogi. Rosti. Frikasi./ Bruldifekti kukon en la forno.

Fornelo. Lavkuvo, drenbreto. Rulknedilo. Fridujo.

30. Restis nenio absolute nek por mordi nek por gluti. Sin levi de ĉe tablo. Prilevi la tablon. Lavi la telerojn. Vazlavisto.

Digesti. Siesti. Facila digesto./ Havi malbonan stomakon, digeston. Misdigesto. Dispepsio./ Ŝtala stomako. Li manĝus fernajlojn. Peza manĝaĵo. Pezeco de malbone kuirita pano.

Singulti. Rukti. Regurgiti. Vomi.

Sveltiga dieto. Mi volas pezi malpli.

Lunĉo. Supeo. Kolaziono.

Ne el unu forno li jam manĝis panon.

**Notoj :** Mikroonda forno.

## 41 MEMORI

*"Kiu volas mensogi, devas bone memori."*

1. Memoro fidela, bone meblita, malfidela./ Lia memoro rifuzas lin servi, forlasis lin. Memori vorton, fakton, lecionon, ofendon, bonfaron. Memori bone, klare, konfuze. Sian memoron kultivi, ekzerci, streĉi. En sia(n) memoro(n) ion enskribi, stampi, noti, gravuri, revoki./ El sia memoro ion forviŝi.

La fluo de la rememoroj. Tuta rozario da rememoraĵoj. Rememorojn veki, elvoki.

De post nememorebla tempo. Mi konas vin tiel longan

tempon, kian povas ampleksi mia memoro. Freŝe vivas io en la memoro. Mi revidas ĉiam en mia memoro la bildon de tiu terura nokto. Ĉi tiu tago restos por mi ĉiam memorinda.

Mi elportas el via urbo la plej bonan rememoron. Konservi agrablan memoron pri tio. Ne forgesi ion ĝis la tago de sia morto.

5. Kiom mi memoras... (la peco ne plaĉis al mi).

Se min ne trompas mia memoro./ Fari nodon sur sia tuko (por ne forgesi pri io).

Senti kulton por ies memoro. Honori ies memoron. Kulpa je forgeso. Ripari forgeson./ Lia memoro vivos eterne. Rememori iun kun pietato. Starigi daŭran, nedetrueblan, tempospitan monumenton al iu./ Monumento konstruita por la honoro de tiu, kiu meritis estimon, estis tenata en alta estimo, akiris al si gloron./ Revigligi malnovajn kutimojn.

**Notoj :**

## 42 MILITO - PACO

*"Kiu havas la forton, havas la rajton."*

1. Milito defenda, agresa, maljusta, kolonia, eksterlanda, interna, enlanda, intercivitana, malvarma, psikologia, totala, fulma, prembutona (= butonprema), la plej ekstermanta (kiun oni konis en la historio). Milito de la nervoj.

Militon deklari, fari, gajni, perdi. Eniri en militon.

Milita parado, preparado, ago, kanto./ Vidu : ARMEO.

Satigi sian bezonon de gloro per milito. Atingi sian celon per fero kaj sango (= per fajro kaj glavo). Dronigi la mondon en la barbareco. Verŝi senkulpan sangon. La registaroj ĵetas la homojn unujn kontraŭ la aliajn. Frato fratan atakas ŝakale./ Du militas, tria profitas.

5. Al la armiloj! Invadi la landon. Armita ĝis la dentoj. Koalicii kontraŭ... Sin alianci kun najbara regno. Perfidi sian aliancon. Tio aŭguras nenion bonan. Internigi fremdajn civitanojn en koncentrejon dum milito.

Neakordigebla konflikto. Ultimato. Militkazo. La patrujo estas en danĝero. La kvina kolono. La dua "buroo" de la armeo okupiĝas pri spionado kaj kontraŭspionado.

Anonco de la militdeklaro. Tumultsonorado. Mobilizado. La milito eksplodis tute ne atendite. Internacia konflikto. Eniri en militon.

Akcepti la batalon. Pretigi sin por la batalo. Iri al la fronto. (Iri) kiel bovo iras al la buĉo. Konduki iun kiel ŝafidon al la buĉo./ Akceli la marŝon de trupo.

Defendi sian patrujon. Ricevi fajrobapton. Montri elstaran heroecon. Sola kontraŭ ĉiuj. Brave, kuraĝe batali. Kuraĝe riski sian vivon. La kuraĝo kreskas kun la danĝero./ Lia kuraĝo sinkis en la krurojn, en la botojn. Perdi la kuraĝon. Repreni kuraĝon. Kolekti sian kuraĝon. Ĉerpi kuraĝon.

10. Perdi brakon en la batalo. Milita invalido. Hajlo, pluvo da kugloj. Sub fajfado de kugloj. Kuglo trafis lin meze en la frunto. Profundo de penetro de kuglo. Maro da sango.

Levi la vunditojn el la batalkampo. Akceli la evakuadon de la vunditoj. Reveni, eskapi senvunda el la batalo. Savi sian haŭton.

Doni, verŝi sian sangon por la patrujo. Tero sorbigita de sango. Glore morti ĉe la fronto por (pro) la patrujo. Perei en batalo. Miloj da soldatoj estis sternitaj de la bombardo./ Apokalipsa spektaklo.

Suferi grandajn perdojn. Mankantoj. La pafado falĉis tutajn vicojn el la soldatoj. Kadavroj kuŝis dense unu ĉe la alia. Hekatombo. La cifero de la mortintoj estas alta. Miloj da kadavroj forfalintaj sur la batalkampo. Buĉi blinde sendistinge. Kion utilos nia sango? Tia buĉado malhonoras la civilizitan mondon. Multe da larmoj estis ploritaj pro ĝi. Nia priplorinda filo./ Bona generalo ŝparas siajn soldatojn.

Plej bona defendo estas atako. Furiozas la batalo. Decida batalo. Ataki je la ĉarniro de la du armeoj. Sturma taĉmento. Sturmi tranĉeon. Nerezistebla sturmo. Kuratako per ondoj ; en densa, disa ordo./ Avancado haltigita. Ek al la batalo! Ni devas aŭ venki aŭ morti. Ni pli aŭ

malpli frue venkos. Forpuŝi la atakantojn./ Encirkligi armeon.

15. Celi nur trafeblajn objektivojn. Ili okupis la ponton per plena surprizo./ Kamufli, nevidebligi objektivon militan. Nigrumi urbon, kunvojon kontraŭ noktaj flugatakoj. Bombadi nemilitistan objektivon./ La unua ondo de la bombaviadiloj./ Kamikazo.

La trupoj manovris ŝirme de kurteno de kavalerio. La malamiko pretergalopis la dekstran alon. Kavalerio (skadro) cedigis la alon de nia armeo. Fari breĉon en la malamikaj vicoj.

Esti faligita malsupren en paraŝuto. Paraŝutigi trupon (paraŝuta malfermiĝo, "descendo", trupo). Plonĝi. Plonĝbombadi./ Alarmi la trupojn kontraŭ aeratakoj.

La urbo falis en la manojn de la malamikoj. Urbo prenita sen sangoverŝo. Okupi la urbon./ Fari el urboj dezertojn. Elviŝi urbon, kiel oni elviŝas pladon. Ĝi ne plu estas urbo sed amaso da ruinaĵoj (post la milito). La urbo rapide releviĝis el siaj ruinoj.

Bulteno de militaj operacioj. Glora venko. Ebrii pro la venko. Militpaŭzo.

20. Demoraliziĝo de la venkita armeo. La spirito de nia armeo estas malfidinda. Defetismo. Dizertinto. Dekumi./ Lojalaj trupopj.

Kompensi la militdifektojn. Niaj pozicioj estis bombarditaj. Defensiva pozicio. Sin teni je la defensivo. Ili estas premataj en direkto al la maro. Defenda strategio. Municioj mankas.

Neatakebla urbo. Defendi urbon kontraŭ sieĝantoj. Reduktejo. La kanonoj faris breĉojn en la remparojn./ Tiu ruzo certigis la venkon.

Rezista poŝo. Rekonkeri la perditan terenon. Organizi la terenon. Elekti bonan terenon por la manovro. Gajni terenon. Avanci.

Retreto pro la premo de la malamiko. Kapitulaci. Lasi al iu la eblon retiriĝi kun honoro. Demeti la armilojn. Senarmigi kapitulacintan armeon.

25. Armistico. Parlamentario. Prezenti ekstremajn postulojn. Trudi severajn kondiĉojn al la venkito. Trakti la venkitojn kun humaneco. Ve! al la venkitoj.

Aneksi. Militakiro. Okupacio. Reparacio./ Partizano.

Makisano. Rezistado. Esti la animo de Rezistado./ Preni, ekzekuti "ostaĝojn" (= garantiulojn). Gerilo. Reprezalio./ Liberbrigado./ Kaŝnomo.

Batalanto de la unua mondmilito. La "Nekonata Soldato". EN OKCIDENTO NENIO NOVA. LA BRAVA SOLDATO ŜVEJK.

Militkaptito. Kaptitejo./ Koncentrejo. Barakoj. Gaskamero. Pikdrato.

30. Post la fino de milito kunvenas la diplomatoj. Fari pacon. Kontrakti traktaton. Paca kontrakto./ Demarkacio. Agnoski rajton de popolo al memdispono. Tiu ĉi kondiĉo ne estis vortigita en la kontrakto.

La problemo pri malarmado, pri internacia limigo de la armadoj. Ĝenerala konferenco por malarmado. Kiu nacio konsentos malarmi sen ia garantio? Konkurado de armado (= vetarmado). Ili forĝos el siaj glavoj plugilojn. Enterigi tomahokon. La paca kunekzistado de kapitalismo kaj komunismo. Armita paco./ Bufroŝtato. Firme starigi, konservi, rompi pacon.

Eduki siajn infanojn en pacema kaj tuthomara spirito. Inokuli en ies animo abomenon al la milito. Provi ekstermi la radikojn de la milito./ La absurdeco de la milito ĉiam pli kaj pli evidentiĝas.
La kolombo de paco. Pacifismo.

Venos la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unu kontraŭ la aliaj./ Mi venis por enkonduki ne pacon sed glavon./ Kiu kaptas glavon pereos per glavo.

Ni ne devas malesperi pri la homaro. Neperforto. Neviolenta kampanjo. "Sur la tero se azenoj ne amasus, la milit' ne okazus." (Kalocsay).

"En la mondon venis nova sento...
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion".

**Notoj :** Polemologio.

## 43 MORTI - HEREDO

*"La morto ne distingas, ĉiujn egale atingas."*

1. Morto subita, tragedia, tro frua, antaŭtempa, akcidenta, "violenta", natura, malhonora.
Morti per natura morto, de perforta morto, per haladzo, asfiksio, dronado, de malsato (permalsata morto), pro inanicio, en sia lito.
Perei per la glavo, en batalo. Se mi pereos, mi pereu./ Restis al mi nur morti.

For! vi kava, terura, konvulsia rigardo de la morto! La instinkto de memkonservado ne tute ŝin forlasis.

Kiu naskiĝis, tiu ankaŭ mortos. Ĉio havas finon. Ĉiu vivanto devas morti. Ĉiu homo estas mortema. Simpla, tera mortemulo. Falĉilo estas atributo de Morto. La senkompata morto.

Antaŭaverta sonĝo./ "Mortodanco" (SAINT-SAENS)

5. Perdi la vivon sub ies mano. Suicido (= memmortigo, = sinmortigo). Hommortigo pro malzorgemo. Murdo. Nekropsio. Li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis.

Ekspedi iun en alian mondon. Elpeli iun el la mondo de la vivantoj. Sufoki. Strangoli iun. Krimi. Murdi./ Eŭtanazio. Plifruigi ies morton. Meti iun en danĝeron de morto. Riski danĝeron de morto.

Lia horo ekbatis. Batis la horo de lia morto. La morto jam estas ĉe la sojlo. Stari per unu piedo en la tombo. Anonci siajn lastajn volojn.
Kuraĝe alfronti la morton. Rigardi la Morton en la vizaĝon, alvizaĝe. Barakti kontraŭ la morto. Ŝvebi inter vivo kaj morto. Atendi rezignacie la morton./ .Rekomendi sian animon al Dio. Stertori. Liaj okuloj fariĝis vitrecaj, vitreskaj. Diri adiaŭ al la mondo surtera.

Formorti, dormi kaj nenion pli. Esti en la faŭko de la morto. Ekdormi, endormiĝi por eterna morto, ripozo./ Fino de ĉiuj zorgoj.

La morto rabis al li la infanojn. Frua morto. Perdiĝis granda poeto, kantisto. Paco al lia cindro. Lia morto konsternis ĉiujn liajn amikojn. Priplori ies morton.

10. Preĝi por la animo de iu. Sen ceremonioj, kaj sen funebraj formoj kaj parado.

Muldigi per gipso la vizaĝon de mortinto. Balzami.

Mortsonorado. Enterigi iun sur la (malnova) tombejo. Mallevo de la ĉerko, en la foson. Estu la tero malpeza, "leĝera" por li. Sepulti. Sepultentreprenisto. Tombo. Monumento. "Slabo". Sarkofago. Cenotafo.

Kremacii. Kremaciejo. Cindrourno./ Balzami. (Jozefo ordonis al siaj servistoj balzami sian patron)./ Mumio. Disĵeti la cindrojn de iu el la kvar ventoj. Starigi krucon sur la tombo. Tomboskribo. Ĉi tie kuŝas X.

Saluton al via tombo, tro frue mortinta amiko. Funebra laŭdo de mortinto. Nia bedaŭrata prezidanto. Lia nomo estos eterne ĉirkaŭita de gloro. Oracio. Ĉiuj enterigitoj estas plenaj de meritoj. Vivantojn ni malhonoras, mortintojn ni adoras.

15. Bedaŭre ekscii pri ies morto. Honori enterigon per sia ĉeesto. Sendi kondolencojn al la familio. Akceptu mian funebran saluton. Kondolenca vizito.

Porti funebron pri iu. Sin izoli en sia funebro. Survesti funebron. Funebre vestita. Florornami ies tombon./ Li ne supervivos la funebran sciigon./ De tiam, ĉio fariĝis indiferenta por li.

Vidvino post homo, kiun mi konis, de oficisto. Senti la amarecon de sia vidviĝo. Post mia malapero renversiĝu la tero. Post mi, la diluvo./ Okazu, kio okazi devas. Vidu : VIVO : 66.

HEREDO : Testamente disponi pri siaj havaĵoj. Legacio (= legaco). Fari sian testamenton (kodicilo). Legitimi testamenton ĉe la tribunalo. Testamentaj aranĝoj, malpermesoj, dispozicioj. Falsi testamenton.
Hereda havaĵo. Esperi heredaĵon. Riĉa heredaĵo. Meti, ĵeti siajn manojn sur heredaĵon de alia. Postuli, depostuli sian parton de heredaĵo. Universala heredanto. Dividi heredon kun fratoj./ La nemoveblaĵoj en heredaĵo.

20. Transdoni ion herede al iu. Senheredigi maldankan, hontindan filon. Domo kaj havo estas heredataj post gepatroj. Postlasi heredaĵon al institucio. Testamenti fonduson por...

Disipi heredon. Malŝpari tutan heredaĵon.

Avarulo avaras, heredantoj malŝparas.
Ne fidu heredon, fidu posedon.

**Notoj :**

## 44 MUZIKO

*"Li komprenas predikon, kiel bovo muzikon."*

1. Infano kun orelo sensiva por muziko. Akuta sensiveco. Mirinfano (Mozart). Havi grandan dispozicion por la muziko. Distingiĝi per sia talento./ Havi dian voĉon./ Majstro de la muzikarto.

Esti surda al muziko. Havi muziksurdajn orelojn. Kun preskaŭ nenia muzika klereco. Ekzerci sian orelon. Trejnita orelo facile distingas la sonojn.

Li povas rivali kun niaj plej grandaj pianistoj. Li ludis la adaĝon kun bravuro. Mirigan mondon de tonoj li elsorĉis el sia instrumento. Li forgesis sin en aŭdado de la melodio. Orelkaresa melodio. Religie aŭskulti la muzikon de.../ Tiu muziko tranĉas la orelojn.

Melodio memorata de Petro, sed forgesita de Paŭlo.

5. Konservatorio. Gamo diatona, kromata.
Notoj :
do re mi fa sol la si (en romidaj landoj, ktp)
C D E F G A B (aŭ H) (en ĝermanaj)
Natura, maĵora, minora skalo (gamo).
Kleo (fa-kleo). Liniaro.

DO (= C) : diesa, dudiesa, bemola. Naturigi dieson, bemolon./ Bekvadrato.
Intervalo : melodia, maĵora, minora.
Medianto (3-a ŝtupo de la skalo). Dominanto (5-a).
Submedianto (6-a).

Silento. Plensilento, duon-, kvaron-. Noto : plena noto. Trioleto. Mezuro (dutempa,...). Tempo. Takto. Ĉefpulso. (la unua pulso de mezuro; forta pulso). Forta taktero.

Tercio, kvarto, kvinto, seksto, septimo.
Akordo : tonika, supertonika, medianta.

Harmoniscienco : kombinado de akordoj.
Harmonizi. Melodio. Akompano./ Komponisto./ Kompozicio./ Aranĝo.

10. Solfeĝo. Solfeĝi./ Muzikaj reguloj. Komponi operon./ Muzikigi poemon de Bodlero. Partituro./ Transponi.

Instrumentoj : vidu PIV p.1278 (28 vortoj).

Violono : korpo, sontabulo, selo, kapo, sontruoj, agordkejloj, ponteto, animo, kordoj. Sordino (= dampilo).
Violono de Stradivario. Arĉo. Kolofano./ Per unu tiro de arĉo. Se vi prenis violonon, prenu ankaŭ la arĉon.
Aldo. Violonĉelo. Kontrabaso.

Piano (= fortepiano). Kun bona sonoro. Harmono (flanka sono produktata de vibranta kordo, kune kun la ĉefsono).

Agordisto. Piano agordita laŭ egala temperado. Temperi. Klavoj. Klavaro./ Draŝi pianon./ Improvize kantistinon akompani per piano./ Recitalo./ Mirinde interpreti Chopin.

15. Blovi per trumpeto. Buŝo de fluto. Anĉo (libera, batanta) de hobojo. Langeto, lameno de hobojo.

Fagoto, klarneto, trombono, korno, korneto, timbalo. Perkutinstrumento./ Akordiono.

Baso (ulo). (La basulo havas belan organon).
Baritono (ulo). Tenoro (ulo). Falseto. Kaponvoĉo. Kontralto. Soprano. Koloraturo./ Tembro./ Registro tenora.

Diapazono, pitĉforko, pitĉtubo./ La tono de tiu kanzono estas tro alta por via voĉo. Levi la pitĉon. Kanti subpitĉe. Perdi la pitĉon./ Voĉkordoj. Obtuza, iom rompita voĉo. Kanti kun akompano de liuto.

Duopo de kantistoj. Kvarteto. Kvinteto.

20. Kanti arion, operon. Adapti poemon al ario./ Mirinde interpreti. Vidu : SPEKTAKLO: 57.

Kanti laŭte, duonvoĉe, el la tuta gorĝo./ Jodli. Trili. Agrabla voĉo./ Ŝi kantis agrable sed ne ĉiam ĝuste.

Am-, lul-, venk-kanto. Himno./ Kanzono. Refreno (= rekantaĵo). El centoj da gorĝoj ondas la konataj sonoj de l' himno.

Kanono. Ĉenkanto je la unisono. Ĥoro (= koruso).

"Kiam la du violonistoj violone violonis
Kiam la du cimbalistoj cimbaliste cimbaladis..."
(PIRON - TSAUT).

25. Disko : fajne kanelita disko. Longdaŭra registrado.

Ludi, doni koncerton. Direkti orkestron. La bastono de la direktisto. Dirigento. Eldoni tonon. Bati la takton. Observi la takton./ La riĉaj harmonioj de la orkestro./ Kakofonio. Balanci la kapon laŭ la takto de la muziko./ Ekludi arion ĉe vido.

Solo (soloo). La unua violonisto. Agordi sian violonon. La agordo de via tria kordo estas malĝusta.

Fugo. (kontrapunkto). Kapriĉo. Suito. Kantato. (La Pasio). Oratorio. Konĉerto. Nokturno. Simfonio (La Heroa Simfonio). Sonato. Serenado. Etudo de Chopin. Preludo. Uverturo. Alegro. Skerco. La movimento de la pianokonĉerto de Grieg. Kresĉendo. Diminuendo. Forte.

Ĵazo. Ĵaztrupo./ Akceli la kadencon de danco./ Sin akompani per gitaro.

**Notoj :**

## 45 NASKI

*"En doloro vi naskados infanojn."*

1. Ovolo. Spermatozoo. Embrio. Feto./ Koncipi (vidu : RELIGIO). Artefarita fekundigo de virino./ Ginekologio.

Graveda de tri monatoj, je ĝemeloj./ La abortigo estas malpermesata en pluraj landoj./ Abortiga operacio, drogo. Gravedeco ofte donas la naŭzon. La ekdeziroj de gravedulino./ Fruktoportado estas beno.

Ŝi naskis du infanojn per unu fojo. Akuŝi je ĝemeloj, je malviva infano, belan infanon. Feliĉa akuŝo. Antaŭ ol venis la akuŝistino, ŝi jam estis naskinta./ Antaŭtempa akuŝo. Inkubatoro. Malfeliĉa akuŝo. Dilatiĝo de vagino ĉe la akuŝo. Forcepso. La infano prezentiĝis malĝuste. Puga prezentiĝo./ Krio de naskantino./ Cezara operacio.

Ĝemeloj veraj, falsaj. Ĝemela simileco. Ĵusnaskito. Unue-

naskito. Frunaskito. Mortnaskito.
Akuŝa, puerpera febro. Obstetriko. Obstetrika traŭmatismo.

5. Formulo de naskiĝakto. Duplikato de naskiĝatesto. Registro de naskiĝoj.
Kia estas via civila stato. Mi naskiĝis ...

Vaŝington estis naskita la 22-an de Februaro (en februaro) en la jaro mil sepcent tridek dua. Datreveno (vidu: AĜO).

La lando, kiu vidis lin naskiĝi. Feliĉa la ventro, kiu vin naskis. Benita estu la frukto de via ventro./ Li estis naskita sub favora astro.

Pli bone estus al li ne veni en la mondon, se li neniam estus naskita. Naskita sub malbona stelo. Kial mia patro faris min? Li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita.

Maltusanismo. Limigo de naskado. Kontraŭkoncipaĵo. Steriligado. Preventilo (kondomo). Demografio. (vidu : FAMILIO).
Ne naskas porko leonidon, nek korniko aglidon.

**Notoj :**

## 46 OKULO - RIGARDI

*"Inter la blinduloj reĝas la strabuloj."*

1. Okuloj nigraj, bluaj, verdaj, ametistaj,/ brilaj (brila okulparo), klaraj, malklaraj, flamaj, ardaj, inteligentaj, parolantaj, revantaj./ arogantaj, lacaj, bluringaj, larme humidaj, ruĝaj (de ploro), dilatitaj (de teruro).

Rigardo fluga, preterfluga, penetranta, penetrema,/ agla, akra, riproĉa, malafabla, straba, oblikva, fulmanta,/ senpensa, vaka,/ indigna, senparola,/ danka, amplena, karesa, signifoplena, scivola, multparola, elokventa, bonkora, varmiga, hipokrita.

Okulojn levi, mallevi, fermi, direkti al, streĉi, levi petege, bendi (al iu).

Okuloj radias, haltas sur io, gluiĝas al io, ĵetas fulmojn, ronde malfermiĝas, ne povas satiĝi je la vidado de...,

preskaŭ elŝoviĝas el la kavoj./ La flama brilo de liaj pupiloj.

5. Rigardi malafable, de proksime, malantaŭen, ĉirkaŭen, kun riproĉo, tra la seruro ; per malŝata, fluga... rigardo; per ambaŭ okuloj, gvatokule, per larĝe malfermitaj okuloj.

Kroŝi sian rigardon sur iun. Haltigi sian rigardon sur ies vizaĝo. Avidege ĵeti okulon al iu. Sinforgese glui la rigardon sur iun. Lia okulo brilis per ekstazo. Ekstaziĝi. Kuraĝi rigardi iun en la okulojn./ Deturni de iu la rigardon./ Alforĝi al si la rigardojn.

Ĵeti la rigardon ĉirkaŭen. Havi panoraman vidon de la regiono, ĝis vidlimo, ĝis kie la rigardo atingas, povas atingi ; pli malproksime ol oni povas atingi per la rigardo. Oni ne vidis unu la alian./ Liaj okuloj ronde malfermiĝis. Ne kredi al siaj okuloj. Rigardi per ambaŭ okuloj. Teni la okulojn en streĉo. Buŝon kaj okulojn disstreĉi pro miro.

Trabori iun per la okuloj. Malŝate rigardi iun de alte. Sendi al iu akran rigardon. Neniam plu lin mi vidu. Neniam li venu antaŭ miaj okuloj. Ne aperu plu antaŭ mia vizaĝo. For de miaj okuloj. Foriru de mi!

Akcepti la novaĵon kun vaka okulo. Kredu al mi, tielajn (ratojn) mi neniam vidis. Fidu propran okulon. Observi kun atentaj okuloj. Laŭ la unua rigardo, tio ŝajnas al mi ĝusta. Pli da okuloj, pli da certeco. Propraokule konvinkiĝi pri io. Vindi, kovri al si la okulojn (por ne vidi). Ĵeti supraĵan rigardon sur ion. Mezuri per unu rigardo. Rigardi ĉion tra persona vitro. Tio estas evidenta kaj falas al ĉiu en la okulojn.

10. Strabe rigardi la riĉaĵojn de la najbaro (kiu) : ŝutas polvon en la okulojn (por blindmirigi). Morti de envio (ĉar): ju pli da havo, des pli da pravo.

Sablero enfalis en mian okulon. Havi fremdan korpon en la okulo./ En fremda okulo ni vidas ligneron (spliton), en nia ni trabon ne vidas (ne rimarkas). Havi bluaĵojn sub la okuloj ; blue kadritajn okulojn.

Havi malbonajn okulojn. Perdi la lumon (blindiĝi). Blinda de naskiĝo. Trafita de blindeco. Skribi brajle./ Ridas blindulo pri lamulo.

Okulo al okulo, vizaĝo al vizaĝo./ Okulon pro okulo, denton pro dento.

Gardi ion kiel la pupilon de siaj okuloj. Retino (retina disiĝo). La bildo formiĝas sur la retino. La flava makulo de la retino. Korneo. Iriso (kun la pupilo). Kristalino. Optika nervo. La povo de akomodo de la homaj okuloj. Akomodiĝi./ Larmodukto./ Vidu PIV p.1263.

15. Okulvitroj senkadraj. Surmeti, alŝovi okulvitrojn proksime al la okuloj./ Brova arko. Nazumo. Surmeti kontakt-lensojn.
Okulisto (= oftalmologo). Optikisto./ Banko de l'okuloj. Katarakto. Glaŭkomo. Kisto. Miopa, presbiopa, hiper-metropa, anastigmata./ Strabismo (diverĝa, konverĝa)./ Konjunktivito./ Kolirio.
Hordeolo.

**Notoj :**

## 47 OPERACIO

1. Serioza akcidento. Fari transfuzon tuj post akcidento. Profunda, dolora, grava vundo./ Li rompis al si la femuron. (Vidu : TRAFIKO : akcidento).

Operacio de la unua urĝeco./ Fari operacion. Kirurga masko. Asepsa instrumento./ Bisturio./ La kirurgia ins-trumentaro. Porti iun sur la operacian tablon. Asisti al kirurgo por anestezado.

Anestezi operacioton. Anesteza drogo. Loka anestezo. Nesensivigi korpan regionon per injektoj. Operacia kampo./ Spraji.

Incizi la haŭton ekde umbiliko./ Tranĉi rekte en la karnon./ Laparotomio.

5. Perforado. Ĉirkaŭpremita hernio. Ulcero./ Biopsio. Operacio de la galveziko. Operacii iun pri apendicito, katarakto./ Ablacio de reno, ovario./ Ektomio. Desekci tumoron./ Grefto de koro, reno.

Vagina kuretado. Kureto./ Cezara operacio./ Trepani. Amputi la piedon al iu, iun je la kruro. Amputado de la dikfingro./ Mutilanta operacio. Stumpo de amputita brako.

Ligna kruro./ Kriplulo./ Amputito./ Sin akomodi al nova situacio.

Sekci arterion inter du ligaturoj. Anastomozi. Kunkudri la lipojn de vundo per katguto. Suturi. Sutureroj./ Kirurgia agrafilo.

Kirurgia procedo por operacii kun malfermita koro./ Katetero./ Sanga kompatibileco.

Tiu operacio tre doloras. Tre traŭmatiza operacio. Operacia ŝoko./ La operacio havis feliĉan sekvon./ Kaŭterizi. Cikatriĝo (rapida, seninfekta).

10. Vundoj : tranĉvundo, skrap-, ŝir-, mord-, ungo-, pik-, bat-, brul-, streĉvundo./ Ŝvelaĵo de la brulvundo.

Redukti luksaciitan, frakturitan oston, delokitan organon (hernio, fimozo)./ Frakturo (ostrompiĝo). Aperta frakturo. Remeti elartikigitan membron.

**Notoj :** Reanimado. Artefarita reno./ ... koro./ Handikapulo.

## 48 ORELO - AŬDI - AŬSKULTI

*"Ne kredu al orelo, kredu al okulo."*

1. Orelo delikata, fajna (de muzikisto)./ Vidu PIV, p.1263. Orelo ekstera (aŭriklo : lobo, helikso, konko); meza (ĉeno de la ostetoj : maleo, inkudo, stapedo); interna (labirinto, kokleo = heliko, semicirklaj kanaloj). Timpano. Akustika meato. Tubo de Eŭstakio./ Otito. Oto-rino-laringologo.

Havi malbonan orelon. Misaŭdi. Esti surda je la dekstra orelo, kiel trunko, kiel puto. Muta kaj surda de la naskiĝo.

Streĉi la orelon. Meti la manon tube, konke al la orelo. Klini la orelon al ies parolo.

Aŭskulti sub, malantaŭ la pordo, trans la muro. La muro havas orelojn (= iu subaŭskultas). Glui sian orelon al la pordo, al la serurtruo.

5. Ŝajnigi aŭdi nenion. Preterfluge, unuorele aŭdi ion. Mi estas kiel surdulo kaj ne aŭdas./ Orelojn ili havas sed ne aŭdas./ Aŭtomate ripeti ion aŭditan.

Tra unu orelo eniras, tra la dua eliras./ Resti surda al ies peto. Prediki al surduloj.

Aŭdi ion el lia propra buŝo. Sciiĝi pri io el onidiroj. Diri en ies orelon (= sekrete). Ĉu oni jam aŭdis ion tian? La diablo furiozus, se io simila alvenus al liaj oreloj. Ne kredi al siaj oreloj . Eĉ aŭdi mi ne volas pri tio./ Mi neniam antaŭe aŭdis pri ĝi.

Kiu aŭdis la unuan, ankaŭ aŭdu la duan.

Unu vido taŭgas pli ol dek aŭdoj.

10. Aŭskultu kaj aŭdu! Aŭdu! mi promesas al vi, ke... Mi kore ekĝojis, kiam mi aŭdis pri... Gustumi la plezuron aŭdi ...on. Estas plezure aŭdi... Aŭskulti ion kun malfermita buŝo, kun avideco.

Tiu muziko skrapas, trancas la orelojn./ Krevigi al iu la timpanon (tro forte krii). Parolu pli mallaŭte, vi surdigas min. Senĉese gurdi ion en ies orelon.

Vidu : RADIOFONIO : 56/5

**Notoj :** Otoskopo.

## 49 PAROLI - SILENTI

*"Parolo estas arĝenta, sed ora la silento."*

1. Parolo(j) klara, hakata, klarbilda, maskitaj./ Frakasa tono.
Parolon doni, rifuzi, interrompi.
Parola ordono, promeso.
Paroli flue, senĉese, laŭte, senpaŭze, sensence, decideme, tekse-mikse, fajre, severe, libere, trosenĝene, kviete, liprande, bombaste, emfaze, elokvente, lakone, kolere, senprepare, ŝerce.

Paroli, diri, deklari, raporti, esprimi, aludi, prononci, babili, balbuti, flustri, murmuri, grunti, grumbli, klaĉi, "krokodili", konversacii, oratori, prediki, kartavi, lispi./ Havi kamparan, sudan akĉenton. Havi bonan bekon. Ne serĉi vorton en la poŝo./ Blezi./ Teni konversacion./ Palavri./ Konsumi ies tempon per malsaĝa babilado.

Paroli el la profundeco de sia koro, per vortoj kovritaj, per gestoj, tra la nazo, kontraŭ sia penso, kun flameco,

kun vervo, kun impeto, el alta selo, senspirhalto, por si mem, en la vento, dolĉe en la orelon. Diri al si en la pensoj./ Pri kiu afero li parolas?

Paroli al si mem. Direkti sian parolon al iu. Malsigeli ies lipojn. Esti "timida". Rompi la glacion de la rigida konversacio./ Temo, objekto de babilado./ Havi la vorton sur la pinto de la lango. La vorto estis preta sur miaj lipoj./ Perdi la fadenon de (en) la parolo. Ŝiriĝis ŝia pensofadeno./ Vorto kiu sugestas alian vorton. Kunĉenado de vortoj. Asociado de la ideoj./ Forpreni la vortojn, parolon de sur ies lango./ Digresio.

5. Ripeti ĉion vorto post vorto./ Direkti la interparolon, la konversacion al alia temo. Diri al si en la pensoj. Interrompi ies vortojn, parolon. Mencii ion preterkure. Saltadi el unua al deka (paroli sensekve). La konversacio saltis de unu temo al alia./ Ne interrompu vian konversacion pro mi./ Ŝanĝi la temon.

Oni devas eltiri, elŝiri per tenajlo el li la vortojn./
Mi atendis, ĝis ili ĉesos paroli.

La vortoj venas flue kaj glate sur la lango. Gluti la vortojn. Havi klaran, konfuzan artikulacion (artikigi). Paroli kvazaŭ havante knelon en la buŝo. Gargari nekompreneblajn vortojn. Galimatio./ Mia lango stumbladas.

Laŭdire. Onidiroj. Se oni povas tiel diri. Se paroli sincere, mi devas diri... Estu dirate je lia honoro. Diri ion pri iu al iu. Mi rakontos ĉion laŭ ordo, laŭ kronologia ordo. Senvuale diri, ke... Tio ne pravigas min diri, ke...

Fariĝi objekto, temo de klaĉo. Kurigi, disvastigi famon pri iu. Disporti malicaĵon. Cirkuligi kalumnion. Ĵeti miskrediton sur iun. La tuta urbo parolas nur pri tio./ Ŝi estas la honto de sia familio! Honora familio./ Virina lango buĉas sen sango./ Damaĝi ies reputacion. Gravigi bagatelojn./ Granda frakaso en malgranda glaso./ Ŝajno trompas. Ŝajnon ne fidu, juĝi ne rapidu./ Ŝi ne transvivos tiun ĉi honton./ Ĉu ne estas kiel mi diris al vi?/ Tiaaĵon ni neniam diris./ Diri ion ĵete, rekte en la vizaĝon./ Kie fumo leviĝas, tie fajro troviĝas.

10. Li ne povas teni ĉe si sekreton. Perfidi sekreton. Elpumpi, eltordi el iu sekretojn./ Famo cirkulas! Vi sekre-

tos al edzino, ŝi sekretos al fratino kaj tiel la sekreto promenados sen fino./ Profesia sekreto. Subsigela sekreto. Konservu bone la sekreton. La sekreto iel "tralikiĝis". Sekreton de aliulo ne malkaŝu. Tenado de sekreto./ Ne diri eĉ unu vorton.

Mi trovas superflua (superflue) paroli pri tio. Eĉ se paroli pri tio. Ne valoras, ne estas inde paroli pri tio. Havi nenion alian por diri, ol ke... Pri tio oni povus multon diri. Ne diskriu tion sur la stratoj.

Ĵuru, ke neniam vi parolos eĉ per unu vorto pri tio. Pri nenio oni povas ĵuri. Doni sian honorvorton, vorton de honoro. Mortsilentigi ion. Dronigi ion en silenton. Kateni sian langon. Bridi sian buŝon.

Vorto dirita neniam revenas. Gardu vian langon. Fermu vian klapon. Senti la bezonon silenti. Ĉi tio restu inter ni. Teni sian langon en la buŝo. Kiu retenas siajn vortojn estas saĝa.

Pli bone silenti ol diri stultaĵojn./ Ju pli oni babilas des pli oni malutilas./ Antaŭ la lango, laboru la cerbo. Paroli estas arĝento, silenti estas oro.

15. Devigi iun silenti. Redukti iun al silento. Ŝanĝu la diskon, ĝi tedas./ Turnu la paĝon. Silenti, gardi la silenton pri malagrabla afero. Fiŝe silenti. Obstini en silento. Strikta silento. Aranĝi kontraŭ iu aŭ io la konspiron de silento. Suspektinda silento. Plej ofte silento estas konfeso./ Rompi la silenton.

Libere elverŝi sian koron. Nudigi, malkovri, malŝarĝi al iu sian koron. Tiuj vortoj venis el la plej profundo de la koro.
La komuna saĝo, la homa saĝo diras al mi, ke...

Diri nen al ĉiu kaj al ĉio.
Populara oratoro, kiu scias interesi sian aŭskultantaron. La impeto de lia natura elokventeco. La persvado estas la celo de ĉia elokventeco. Oratoraj efektoj. Blindigi iun per vortoj. Li oratoras. Li komencis sian paroladon per sonoraj vortoj, frazoj. Li parolis du horojn sen notoj, adaptis siajn parolojn al la cirkonstancoj. Li parolas, kiom la vortoj povas torenti el lia buŝo. Teni la atenton de la publiko. Brila elokventeco./ Tondra voĉo.

Interrompi paroladon per aplaŭdoj. Sorbi ies parolojn. Lasi sin kapti per lertaj vortoj. Bone dirite! Pendi je la lipoj de iu. Akcepti belajn parolojn por kontanta mono. La blinda, entuziasmigita amaso. Ne lasu vin trompi per la brilo de liaj vortoj. Oni plu serĉas, kion li diris, kiam li finis paroli.

Diskurso. Oracio. Prelego.

20. Afazio./ Afonio./ Voĉestingo.

**Notoj :**

## 50 PENTRI - SKULPTI

1. Pikturo (= arto de pentrado). Skulpturo. Arkitekturo. (Vidu PIV p.1266 : 58 vortoj).

Pentrado naiva, abstrakta, figura. Romantika pentrarto. Primitivuloj.

Pentri per oleo, akvarelo ; per etaj, delikataj tuŝoj. Freskoj pentritaj tempere.

Pentri : laŭ la naturo, figurojn pli grandaj ol laŭ la naturo. Pentri mutan naturon (fruktoj, ktp). Interioro. Ĝenro.

5. Pejzaĝisto : marpentraĵo. Portretisto : piedostara portreto. Memportreto. Fari portreton en tri seancoj./ La portreto ĝuste redonas lian fizionomion./ Pozisto./ Karikaturisto. La ora nombro (responda al aparte harmonia proporcio).

Havi delikatan penikon. Granda sobreco de koloroj. Tro lekita pentraĵo./ Neatingebla perfekteco./ Pentraĵo kun karaktero. Harmoniigi la kolorojn. Zorge elekti inter la diversaj nuancoj de bluo. Tranĉanta koloro.

Specifa stilo de pentristo. Speciala stilo de pentristo. Tie oni rekonas la manon de la artisto./ Kemia esplorado aŭtentigis tiun pentraĵon./ Tiu pentristo havis plurajn manierojn. Verko el la unua maniero de Vermeer. Pentraĵo laŭ la maniero de Rafaelo. Oni apenaŭ distingas la retuŝojn sur la pentraĵo.

La morbideco de Rafaela pentraĵo./ Rembrandt, la magi-

isto de la lumoj kaj de la ombroj./ Molaj ombroj en pentraĵo. La riĉaj, profundaj nigroj de Van Dick. "La leciono pri anatomio" estas fama pentraĵo de Rembrandt.

Sin okupi pri arto./ Loki pentraĵon en favora lumo.
Rigardi ĝin distance.

10. La galerio de pentraĵoj. Eksponi pentraĵojn. La pentraĵoj de tiu artisto estas tre serĉataj. Taksi iun pli alte, ol kiom li meritas. Senti kulton por la arto. "Apreci" (= kompetente taksi la artan valoron de o). Du pentraĵoj kolektis (arigis) ĉirkaŭ si amason da admirantoj. Riĉa amatoro aĉetis ĉiujn liajn pentraĵojn.

Ateliero. Paletro. Spatelo.
Desegni (laŭ, el la memoro). Skizi (portreton). Krokizi. Karikaturi.

Avangarda pentristo. Pariza skolo de pentristoj. Ekspresionismo. Impresionismo.

SKULPTURO : Skulpti el la maso. Abstrakta skulptaĵo. Skulpti la buston de iu./ Skulpti lignon, marmoron. Busto de faraono el porfiro. La skulptado el porfiro estas plej malfacila./ La aŭtoro de skulptaĵo, de desegno. Bareliefo.

Malŝati la regulojn de la arto rajtas geniulo.
La artoj ricevis grandan akcelon dum tiu epoko. La aristokrataro de la arto. La arto por la arto./ La opinio de la publiko estas indiferenta por multaj artistoj./ La krea potenco de artisto./ Lasi liberan kuron al sia fantazio.

**Notoj :**

## 51 PIEDO - MARŜI - IRI

1. Havi platajn piedojn, gambojn kiel alumetoj. Bulpiedo (denaska misformiĝo). Suferi je la piedoj./ Pedikuri./ Liaj piedoj rifuzas lin porti.

Doni al iu piedon en la postaĵon. Krurfalĉi iun. Dolorige surtreti la piedojn de iu. Treti ion per la piedoj. Kunŝovi, disŝovi la krurojn. Sidi krurkruce.

Fali sur la genuojn. Leviĝi de la genua pozicio. Mia genuo

ankiloziĝas. Sin meti de unu piedo sur la alian. Li ne scias sur kiun piedon stariĝi. Stari firme sur la plandoj, per(kun) ambaŭ piedoj, sur la tero. Li staras, kiel se li estus plantita. Liaj piedoj kvazaŭ enradikiĝis.

Sin streĉi sur la piedfingroj./ Havi sur la piedoj nur ŝtrumpojn.

5. Banu al vi la torditan piedon en varma salakvo. Tordi al si la piedon. Rompi al si la femuron. Femuralo (kapo kaj kolo). Tibio. Fibulo. Patelo. Kalkano.

Suro. Maleolo (havi maldikajn maleolojn). Kalo./ Plando. Dorso de la piedo (= insepto). La arkeco de insepto.

Ligna kruro de kriplulo. Unukrura. Lami.

Femuraĵo de kokino, ŝafo, porko, bovo.

MARŜI : arope, samtakte, anservice, lame, etpaŝe, sturmopaŝe, nudapiede, kvarpiede. Marŝi per (kun) piedoj nudaj, firmaj, facilaj, rapidaj, hezitaj, malcertaj, mezuraj. Marŝi sur la pinto de la piedoj, kun peza paŝado, kun plumbaj paŝoj, je kelka distanco, per limaka (helika) irado, rapideco. Kalkulante siajn paŝojn./ Domaĝi siajn paŝojn.

10. Anasiri (anaspaŝi). Ambli.
Lula paŝado./ Rekoni ies paŝojn. Fari falsan paŝon. Stumbli./ Fermi la marŝon./ La ritmo de la paŝado. La knabo provis paŝteni kun mi. Ni iros kun vi pecon da vojo. Alkroĉiĝi al ies paŝoj. Neniu volis halti por preterlasi la aliajn. Iri dorsdirekten. Paŝi flanko ĉe flanko./ Pasumi.

Retropaŝi, retroiri./ Direkti la paŝojn ien. Iri tien kaj reen. Iri, kiel la piedoj lin portas. Iri longan vojon. Sin direkti al alia flanko. Unua paŝo iron direktas./ Fari la necesajn paŝojn. Veturi sur sia paro da kruroj.
Li paŝadis tien kaj reen ĝis malfrua nokto.

Iri en direkto de hormontriloj, inverse de la hormontriloj (rivolui en la senco de la hormontriloj).

Ni paŝo post paŝo atingos la celon en gloro.

Promenbastono. Kano. Lambastono. Stilzoj.

**Notoj :**

51 PIEDO

## 52 RELIGIO

*"Al dio plaĉu, sed nur la diablo ne kraĉu."*

1. Esti kredanto. Kredi je vivo eterna./ Hipokriti kredon, kiun oni ne havas./ Infane suĉebla religio. Esplori la komparan valoron de ĉiuj religioj. Esti skeptika. Mi ne kredas, ke tri estas unu./ Pruvi la ekziston de Dio estas io logike neebla. Dubi pri Dio. Atakita de dubo./ Nei la ekziston de Dio./ Agnostikulo. Ateisto. Sendiulo. Liberpensulo.

Perdi la religian kredon. Ataki religion. Forĵuri sian kredon. Malkonfesi sian religion./ Ekpastriĝi. Senfrokiĝi.

Sekto. Fermita sekto. Sekta komunumo./ Kristanismo estis origine nur hebrea sekto./ Krei novan religion./ Ni devas obei Dion prefere ol la homojn. Herezo. Katarismo. Valdano. Albigenso./ Profani. Blasfemi. Sakrilegio./ Krucmilito.

La paganaj dioj./ Superstiĉoj. Kredi eĉ la plej nekredeblajn aferojn : kredi je dancantaj tabloj (spiritismo), je sonĝoj, je la antaŭsignoj, je la fantomoj, je divenado per la kristala globo, per la kafa rekremento, per la ludkartoj./ Kartaŭguri./ Blinde kredi. Superstiĉigi iun.
Ne devas troviĝi inter vi aŭguristo, antaŭdiristo, magiisto, sorĉisto, nek elvokisto de spiritoj, nek sonĝklarigistoj, nek esploristo de mortintoj.

5. Konvinki la skeptikulojn (la nekredema Tomaso). Prozelitismo. Fanatikulo. Fanatika inkviziciulo. Inkvizicio. La sekulara brako. Aŭtodafeo.

Tuŝu la religiajn konvinkojn de neniu. Mi atestas, ke estas neniu alia dio krom Alaho, kaj Mohamedo estas la profeto de Alaho (kredkonfeso de la islamanoj). Paŭlo asertis al la Judoj, ke Jesuo estas la Kristo.

Ŝtata religio. Konkordato. La trono kaj la altaro (= civila kaj religia povoj). Senŝtatigo de la religio. Sekularigi la lernejojn (konfesia lernejo). Senkonfesia civitano.

DIO : Redonu al Cezaro la propraĵon de Cezaro kaj al Dio la propraĵon de Dio.

Sincera amo al Dio. Afekti, hipokriti piecon. Ludi, aspekti piulon. Bigoto. Devotulo. Tartufo.

10. Dio de la Dioj. La Eternulo. Alaho. Glorata estu la Eternulo./ Dio kreis la homon laŭ sia bildo.

Dank'al Dio. Dio nin helpu. Dio volu, ke... La dia volo plenumiĝu. Dio nin gardu. Preĝu al la Eternulo ne al lia sanktulo. (Al ĉiu sanktulo apartan kandelon).

"Patro nia, kiu estas en la ĉielo..." Ekpreĝi sian "Patronian" (= sian "Patro nia"n). Trapreĝi rozarion. Kunplekti la manojn. Tablopreĝo. Litanio./ Preĝrado./ Fari al si la signonde kruco.

Adori. Kulti. Prediki./ La hindua Triunuo (Bramo, Viĉno, Ŝivao). Karmo./ Por la Hinduoj bovino estas sankta.

Islamo. Ramadano. Fasto./ Moskeo. Minareto. Muezino. LA NOBLA KORANO.

15. Ne perturbu la sanktecon de tiu loko. "Kirko", kapelo. Templo. Sinagogo. Pagodo.
Katedralo (Navo, transepto, ĥorejo, kripto).
Romanika, gotika. Arkoj. Spajro. Vitralo./ Volbo. Volboŝlosilo. Volboapogantoj./ Rondarko. Ogivo. Ogivkruciĝo./ La bulboj de la slavaj preĝejoj. Klostro (enklostrigi iun).

Biblio : La Savonto (= Mesio)./ La origina peko. Prapeko. La tentiĝo de Eva. La malpermesita frukto. Eva deŝiris la frukton de sciado. Frukto malpermsita estas plej bongusta./ La sep mortmeritaj pekoj. Veniala peko./ Konfesi, absolvi pekojn./ Dio indulgu nin, pekulojn. Pardonu al ni niajn pekojn./ Propeka kapro./ En la tago de la lasta juĝo./ Elviŝi pekon./ Al homo pekinta senintence Dio facile pardonas.

La sep ĉefaj virtoj estas kvar naturaj (justeco, saĝo, modereco kaj kuraĝo) kaj la tri teologiaj (kredo, espero kaj karitato).

Sakramentoj : bapto, konfirmacio, eŭkaristio, pento, krismo (sanktolei, unkti : preĝo por la agoniantoj), ordino kaj edziĝo./ Unuafoja komuniiĝanto.

La dogmo de la Triunuo. La kulto de la Sankta Virgulino. Laŭ la katolika dogmo la Di-patrino estis koncipita senpeke. Ŝi estas la Senpeka Koncipiteco. Nia Damo.

20. Epifanio (= Festo de la Tri Reĝoj). La Palmaĵoj. Anunciacio. Fastomezo. Pasko (ĉi-jare falas en marto). Ĉieliro de Kristo. Pentekosto. Ĉieliro de Maria. La festo de Ĉiuj Sanktuloj, la Mortintoj. Kristnasko. (Kripo).

Laŭdatu Jesu-Kristo! La Savinto. (La Savanto). Kalvaria vojo. Resurekti (releviĝi). La dolorplena patrino de la Krucumito./ Dekruciĝo de Kristo. Miraklo.

Sacerdoto. Pastro. Pastoro./ Ekumena konsilio.

Abato. Monaĥo (monaĥa severeco, regularo).

Papo : Mia beno vin akompanu!/ Buleo./ Ne agnoski la neerarivecon de papo pri la dogmoj (malnovkatoliko).

25. DIABLO : Diabla ruzo, kaptilo, malico./ Al mil diabloj! Diablo forportu./ LA DIA KOMEDIO. Fordoni sian animon al la diablo. Kurbiĝadi kiel diablo en akvo benita.

Kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas. La tentiĝo de Eva. La perdita paradizo. Edeno. Cedi al tentoj.

Per promesoj estas pavimita la infero.

Demonhavanto. Ekzorci./ Sukubo. Inkubo.

La diablo, kiel leono blekanta, ĉirkaŭiras, serĉante kiun forgluti.

**Notoj :** Eksvoto./ Karismo. Sakrala.

## 53 RIĈA - MONO - IMPOSTO

*"Ju pli oni posedas, des pli oni avidas."*

1. Vivi larĝe kaj lukse. Esti bonstata kaj en komforteco. Havi ion en superfluo. Naĝi en riĉo kaj abundo.

Persono posedanta grandajn monajn rimedojn. Li estas la arkitekto de sia propra riĉeco. Riĉa zorgas pri ĉampano, malriĉa pri pano.

Ŝajnigi sin riĉa, nenion havante. Strabe rigardi la riĉaĵojn de la najbaro. Avida je riĉaĵoj. Serĉi rimedojn de riĉiĝo. Riĉa estas tiu, kiu ŝuldas al neniu. Ĉasi monon, profiton. Se malriĉulo sukcesas, li ĉiujn forgesas.

Krezo./ La novaj riĉuloj. Elsaltulo, novriĉulo. Parvenuo.

Malmoliĝo de la koro de la riĉuloj. Sata malsatan ne povas kompreni. (Vidu : KAMELO : 12/12). Kiam vi donas almozon, ne lasu vian maldekstran scii, kion faras via dekstra.

5. Mono kuras al mono. Fari el mono sian dion. Adori la oran bovidon (= monon)./ Promesi orajn montojn. Mono havata estas pli grava ol mono havita.

Monon bezoni, prunti, elspezi, ricevi. Ne prenu prunte kaj ne prunte donu. Ĉu vi ne povas doni al mi prunte 300 ...ojn? Redoni, returni la prunton.

Ĵeti sian monon al la kloako. Elspezi sian monon por frivolaĵoj./ El lia mano ĉiu mono elglitas. Li havas truon en la manplato (= malŝparema). (MALRIĈA : Vidu FELIĈO 20/7,8). Vidi la fundon de sia monujo.

Ŝparmonujo./ Ŝparado estas komenco de riĉeco./ Edzino pli elverŝas per funelo, ol edzo enverŝas per sitelo.

Monfalsisto.

Fisko. Fiska leĝo./ Imposton krei, kolekti. Meti imposton sur iun, ion; super la aŭtomobiloj, pri lukso. Pagi pezan imposton. Laŭenspeza imposto. Streĉi ankoraŭ pli la impostan ŝraŭbon.
Loĝantaro ŝarĝita, elsuĉita, sufokata per (de) pezaj impostoj. Alte procenta imposto. Pagi sian imposton per mono, per naturaĵoj./ Imposteviti. Akcizo.

**Notoj :**

## 54 RIDI - PLORI

*"Plej bone ridas, kiu laste ridas."*

1. Rido laŭta, brua, tondra, skua, retenata, subpremata, sardona, sarkasma, moka, malica. Rideto preterkura. La ĝojaj ridetantaj okuloj. Ridon sufoki, reteni, repreni.

Rideti indulge, cinike, amare, honteme. Ridi kiel kreteno, el la tuta gorĝo, el la tuta koro, plengorĝe, ĝis larmoj, sub mantelo (= subridi).

Ridi pro (je) lia naiveco (= ridi lian naivecon). Ne vidi kiom da ridinda estas en tio.

Rikani. Simieska rikano./ Ne paroli alie, ol kun ironia rido. Priridi iun alvizaĝe. Infektiĝi je neretenebla rido./ Atako de rido. La rido estas infekta, infektas. Kaskado da ridoj. Eksplodi per rido. Skuiĝi de rido. Li ne povis ne ridi. Teni al si la ventron (de ridego). Peni konservi sian seriozecon.

5. Kovriĝi per ridindeco. Priridi iun al ies okuloj. Prikanzoni. Kanzonisto.

Rido matene, ploro vespere./ Estas tempo por plori kaj tempo por ridi. Transiri de rido al larmoj. Li ne scias, ĉu plori aŭ ridi.

Larmoj grandaj, pezaj, varmegaj. Vidu : MALFELIĈO. Ploro amara, dolorega, maldolĉa.

Larmoj vualis liajn okulojn, banis ŝiajn vangojn. Okuloj vualataj de larma nebulo, vangoj banataj de larmoj.

Torento da larmoj. Verŝi, elverŝi larmegojn;(larmoj de krokodilo) kvazaŭ per riveroj, pro la morto de infano. Nenies okuloj restis sekaj. Plori nevidate per sangaj, pezaj larmoj.
Preta ekplori. Esti plorema, plorinklina. Havi ploreman humoron.

10. Li demandis ŝin, pro kio ŝi ploras./ El ŝiaj okuloj perlas malrapide larmoj. Okuloj ruĝaj de plorado. Ne povi sin deteni de plorado. Viŝi al si larmojn el okuloj. Forviŝi larmojn.

Virina larmo estas ruza armo./ Plori al ŝi (estas) pli facile ol nubo pluvi./ Larmoj ne pruvas.

Larmi senŝeligante cepojn./ Larmodukto. Larmiga gaso, obuso.

**Notoj :**

## 55 SALUTI - AKCEPTI - ADIAŬ

*"Ĉe tre ĝentila ekstero mankas sincereco."*

1. Saluti per manpremo, mankiso, demeto de la ĉapelo, kliniĝo, klino de la kapo, riverenco, brakumo.

Kiam ajn vi venos, mi vin volonte akceptos. Kio venigis vin ĉi tien? Por kio vi venis al mi?/. Aŭdienco./ Lia alveno koincidas kun mia deziro.

Premi al iu la manon. Demeti la ĉapelon antaŭ iu. Skui ies manon (por vigle saluti). Profunda saluto. Amika kapsigno./ Prezenti brakon al virino./ Prezenti al iu sian respektegon.

Kora akcepto. Per kora movo etendi la manon por manpremo. Neniam mi premis al iu la manon kun pli sincera estimo kaj koreco./ Estas al mi agrable vin saluti. Bonvenon al vi! Permesu, ke mi prezentu al vi mian amikon X.

5. Akcepti iun, esti akceptita : afable, froste, varme, gastame, senceremonie, kun etenditaj brakoj. Fari, aranĝi, prepari la akcepton al iu, por iu./ Aranĝi kafobabilan kunvenon.

Akcepta ceremonio. Akcepto de gastiganto al gasto; de gasto fare de gastiganto. La leĝoj de ĝentileco. Ĉu estas permesite al mi havi la kuraĝon inviti vin?/ Havu la afablecon... ...i.

Peti aŭdiencon ĉe iu. Aranĝi aŭdiencon por iu./ Trafi bonan akcepton./ Kiom da tempo vi restos en la urbo? Malbona akcepto de ĝenulo, trudulo. Akcepti laŭ vizaĝo. Arogante akcepti vizitanton./ Tie (= en tiu salono) mi ne estas en mia elemento.

Providenca, hazarda renkontiĝo. Tio estis ŝanca renkonto; mi eĉ ne sciis, ke li estas en mia urbo. Li alvenis tute ne atendite. Mi venis al vi por pasigi en via mezo unu semajnon./ Vi faras al ni multe da honoro. Soleni ies venon./ Okupi la honoran lokon ĉe la tablo, la supran finon de la tablo./ Ondo de simpatio kuris tra la lando.

Agrabla estas gasto se li ne longe restas.

10. Profundan, koran dankon por (por = danko donata kvazaŭ interŝanĝe). Danki pro la speciala afableco, via komplezo.

Adresi sian dankon al... Al li flugas mia kara danko. Al ĉiuj kune mi esprimas mian dankon. Montri tre konkrete sian dankon.

Pagi al iu per dankemo. Turpa maldanko. Ĵuri al iu eternan dankon. Ŝuldi dankon. Morala ŝuldo. Mil dankojn. Tio ne meritas dankon. Ne dankinde! Akompani iun ĝis la pordo.

Ĝis revido! Salutu lin en mia nomo./ Per abrupta adiaŭo. Sendi perfingrajn kisojn. Sekvi, akompani per la okuloj. Svingi per la naztuko./ Adiaŭ por ĉiam./ Letero de adiaŭ.

**Notoj :**

## 56 SCIENCOJ

Aranĝi eksperimenton./ Scienco estas akumulado de etaj faktoj./ Apliki teorion al la praktikado. El teoria vidpunkto, tio estas pravigebla. Senbaza teorio. Li havas konsciencon, ke la fruktoj de lia laboro neniam pereos./ La grandaj sciencistoj estas ofte distriĝemaj.

1. KEMIO (= ĥemio)

Analizo. Sintezo.
Acido : konsistas el hidrogeno kaj acidresto.
Bazo : Hidroksido de metalo, kiu kombiniĝante kun acido naskas salon.
Alkalo. Alkala reakcio./ Eferveski. Acido ruĝigas lakmuson; alkaloj ree ĝin bluigas. Titri acidon (per lesivo). Lesivo = koncentrita solvaĵo de potaso aŭ sodo.

Malkomponi aeron. Aero konsistas el nitrogeno kaj oksigeno, kaj ankaŭ el raraj (= maloftaj) gasoj.

Karbona dioksido : rezultas de la spirado de vivaj estaĵoj aŭ de la bruligado de karbonhavaj substancoj. Karbona dioksido asfiksias.

Du substancoj povas montri apartan afinecon. Fero estas afina al sulfuro, hidrogeno al oksigeno.

Akceli kemian reakcion. Milde varmigi esplorotan substancon. Agiti likvaĵon. Kirli likvaĵon per agitilo. Analizi solvaĵon.

Kupro reagas sur hidrogenon. Redukti kupran oksidon al kupro. Balono (frakciiga, distila). Retorto.

**Notoj :**

2. FIZIKO

Fero bone kondukas la varmon. Ekvilibro firma, nefirma, indiferenta (stabila, labila, astata)./ Pesilo balanciĝas ĉirkaŭ la ekvilibra pozicio.

Atmosfero : estas egala al pezo de cilindra kolono el hidrargo, kun alto de 76 cm kaj bazo de 1 $cm^2$. Premo de 10 atmosferoj.

Pura akvo bolas en temperaturo de 100 gradoj centezimalaj. La akvo vaporiĝas je la ordinara temperaturo.

La likvaĵo en du komunikiĝantaj vazoj ĉiam serĉas sian nivelon.

Fortoj povas kunagi unu alian, aŭ kontraŭagi unu alian; aŭ neniigi unu alian.

La forto agas sur la pezcentron. Rezultanto. Leĝo pri ago kaj reago.

Impulso donita de motoro al maŝino.
Centripeta, tanĝa, gravita alcelo.

La morta punkto de aksuma movo. Aksumi (= rotacii ĉirkaŭ akso). Rotacii sur pivoto. Rivolui en la senco de horloĝmontriloj.

**Notoj :**

3. FOTOGRAFIO

Fotografi = foti./ Fotografaĵo = foto./ Fotografado = fotado. La **fotografisto fotografis** min kaj mi sendis mian **fotografaĵon** al mia patro.
Angulo de fotado. Ekfoto. Kontraŭfoto./ Kodako. Kodaki. **Telefoti.**

Vidu PIV p.1272./ Uzindikoj = instrukcioj.
Stativo. Kadrado. Enfokusigi. Eksponi plakon. Sentiveco de fotografia plako. Daŭro de eksponado. Eksponi, subeksponi, supereksponi plakon. Eksponmetro.
Fulmlumo./ Numera aperturo de objektiva lenso. Obturilo

de fotoaparato (obturatoro). Momenta, prokrasta obturilo de fotoaparato. Negativo. Riveli. Rivelilo./ Retuŝi foton.

**Notoj :**

4. ELEKTRO

Ne tuŝu la kablon : danĝero de elektrokutiĝo! Debranĉigi draton disde la cirkvito. Lineo./ Splisi.

Kurento : kontinua, alterna, altfrekvenca.

Kurta cirkvito (= fuŝkontakto). Kurtcirkvita kurento. Fandaĵo. Fandaĵportilo. Fandogardilo. Gardilo (de cirkvito). Fermi cirkviton, konektilon. Tranĉi konekson. Interrompi elektran fluon./ Ŝalti la lumon. Ŝalti lampon. Ŝaltilo. Komutilo (komutatoro). Premi butonon. Ŝtopilo (kun stiftoj). Ŝtopilingo./ Ĵako.

La blanka drato de inkandeska lampo. Lampo de cent kandeloj. Ingo de elektra lampo. Ingi ampolon.

Paralela, seria konekto. Konektoskemo./ Ŝuntado.

Elektrolizi. Elektrolito. Elektrodo : katodo, anodo. Braĝo.

**Notoj :**

5. RADIOFONIO

Sendstacio. Radiofoniaj kurtaj ondoj. Dissendilo (publikserva, neleĝa, pirata). Maŝaro de radiofonio./ Ĵami./ Fado. Anoncist(in)o.
Disaŭdigi la ceremonion de la kronado de ..., teatraĵon.
Radiofono = ricevilo. Tiu aparato ne ricevas la ultrakurtajn ondojn. Riceveblaj stacioj. Mi facile ricevas Romon. Esti ĉe la aŭskultado de radiostacio. Agordi sian radiofonon.

**Notoj :**

6. TELEVIZIO

Televidi matĉon ktp. Televidantoj. Televidilo. Bildotubo (katodaj radioj). Ekrano.
Telesendi komedion, inaŭguron.
Televidado estas pasiva distraĵo.

**Notoj :**

## 57 SPEKTAKLO

1. Spektaklo amuza, riĉa, premanta, kurioza, alloga, gajiga, grandioza, korŝira, burleska, bela, korĝojiga, senkompare majesta, engaĝinta (dramo), halucina (filmo).

"Spektanto". La teatra jaro./ Teatra agentejo. Teatra bileto. La bileto estas nepre persona kaj ekskluzivas la transdonon al alia persono./ Senkosta eniro al teatro. Aboni loĝion en la teatro. Fari mendon de unu loĝio ĉe la unua balkono. Sidi sur la unua balkono. Partero. Galerio. Pulbalkono./ Lasi sian ĉapelon ĉe la vestejo de la teatro.

Kiu venas plej frue, sidas plej ĝue. Ju pli frue, des pli certe. Alveni antaŭ la leviĝo de la kurteno (de la operejo). Scenejo./ Ĉeesti la provon de drama prezentado, la unuan prezentadon de filmo.

Spekti filmon, operon, baleton./ Binoklo./ Benefico./ Matineo./ Premiero.

Rolon lerni, provi, prilabori, forgesi./ Suflori. Doni, maltrafi la replikon. Brila, mirinda interpretistino de Ifigenia./ Tondre aplaŭdi aktorinon. Aplaŭdistaro. Prifajfi./ Oni ne ŝparis al ŝi (la primadono) la aplaŭdojn. Ovacio. Ĉiuj rigardoj koncentriĝis al ŝi./ Ŝi estas atendata de ĉiuj siaj admirantoj./ Aŭtografo.

5. La entuziasmo atingis la zeniton. Apoteozo./ Ĉiuj spektantoj estis larme tuŝitaj. La spektaklo valoris la vojaĝon.

Aktoro : Destini sin al teatro. Debuti kun granda sukceso. Aspiri sensacian efekton./ Aktoro kiu furoras. Akiri al si grandan famon. Havi tiom da talento, kiel.../ Esti je la apogeo de la famo, de la sukceso. Eklipsi iun. Ŝajnas, ke la aktoro duiĝas, perdante preskaŭ sian personecon kaj akirante novan.

Efemera sukceso. Lia suno estas subiranta. Lia paliĝanta stelo. Venis fino al lia gloro. La miraĝo de la gloro.

Engaĝi artiston./ Montru al mi provon de via aktora arto./ Krei rolon. Improvize ludi rolon. Identiĝi kun sia rolo. Tre bone deklami kun estetika tono. (instruisto pri deklamado).

Altempigi sian aperon sur la scenejo. En la profundo de la scenejo./ Doni, maltrafi replikon.

Kritiko. Brila teatra kritikisto. Fari la kritikadon de novaj teatraĵoj, filmoj. Damaĝi ies reputacion (renomo, gloro, famo).

10. La agado havas lokon en Elsinoro. Komplika, malrapida agado de la tragedio. Disligo de dramo, de intrigo. Elnodiĝo.

Teatra direkcio. Reĝisoro. Enscenigisto. Trupo. Ensemblo. Turneo. Baleto (komponi, prezenti). Baletmastro. La unua baletistino. Baletjupo./ Koregrafo./ Asekuri la gambojn de dancistino kontraŭ akcidento./ Repertuaro. Bona akustiko de teatro.

Sceno. Rivalto. Orkestro. Kulisoj. Dekoracio (= dekoro) (armaturo). Rekvizito. Lumefektoj./ Figurantaro (statisto)./ Antaŭscenejo.

Dramo. Tragedio. Komedio. Opero. Pantomimo. Melodramo. Vodvilo. Farso. Skeĉo. Revuo. Grandefekta revuo. Varieteo.

Arlekeno. Pieroto. Pulĉinelo. Klaŭno. Kolombino. Pajaco.

15. KINO : La sepa arto (kinematografio). La balbutado de la kinoarto en la jaroj 1910-1914. Adapti romanon al la ekrano./ Filmo mirinde komponita./ Cenzuri filmon.

Scenaristo./ Gago. Suspenso./ La nova ondo en filmarto. Li prezentas la avangardon de kinarto.

Filmo virga, uzita. Lantmova, silenta. Dokumenta, aktualaĵa (kinejaj aktualaĵoj), dublita, mallongdaŭra, malmorala, malĉasta.

Aŭditorio. Sonekipaĵo. Studioj de Holivudo. Filmi en pozejo (80m x 40m x 15m). Kamerao. Bobeno. Kameraisto. Muntisto. Reĝisoro. Kontinuistino. Sekvenco./ Truko.

Stelulino. Impresario./ Figuri en filmo.

20. Populara filmheroo./ Dubli aktoron, dublanto. La franca versio de usona filmo. Sonora tono de filmo./ Silenta filmo. Parolfilmo./ Parkokinejo.

Plano fora, meza, proksima, unua, ekstra (vidu PIV).

La plano estas en filmo tio, kio estas la frazo en romano. Lumefekto.

LA DIKTATORO. (Chaplin = "Ŝaplin") : en kiu la ŝildoj de la magazenoj estas en Esperanto. ANGOROJ. INKUBO.

Larĝekrana filmo. Filmo prezentata en ekskluziveco, permesata nur al adoltoj./ Klimatizita kinejo.

CIRKO : Akrobato. Burleskulo. Klaŭno. Ŝnurdancisto. Ĵonglisto. Dresisto./ Fari transkapiĝon. Salti transkapiĝe. Mortosalti. La ĉefa efekto de la spektaklo estis la trapezistaj akrobataĵoj.

**Notoj :** Atrakcio.

## 58 SPORTO

*Sana menso en sana korpo.*

1. Interesiĝi pri sporto./ Disciplino(j).
Rekordon starigi, superi, posedi, venki, rompi.
Agnoski rekordon pri io. Rekordulo. Sporta konkurso.
Atingi la ĉampionecon pri salto. Defii ĉampionon de bokso. Trejni sin je la ĵetado de la disko. Premio por plej rapida kurado. Li kvalifikiĝis kiel futbala avanulo. Fari la mejlon en rekorda tempo. Ŝi komencis perdi rapidecon en sia kurado. Misa ĵeto de lanco.

Venki super iu, io. Doni al iu ŝancon montri siajn kapablojn. Eklipsi siajn konkurantojn./ Finiŝo./ Spurti.

Stadiono. Vego. Atleto. Atletismo./ Stafetkurado. Saltado en alto, en longo, per stango. Trampolino. Kurado. Hurdokurado. Sprinti. Antaŭeco de kaplongo. Vetkuro. Kuri ĝis perdo de la spiro. "Anheli"./ Dekatlono.

Naĝo. Remado. Skermo. Alpinismo. Marŝado./ Futbalo. Matĉo. Teamo. Avanulo. halfo, arierulo, golulo. Kapitano./ Matĉestro (Laŭ : **Praktika Bildvortaro de E.**). Golejo. Enpafi golon./ Taĉo (tuŝlinio). Ŝoti. Dribli. Finti. Faŭli./ Finalo./ Penalo.

5. Bokso : Svingo. Knokaŭto. Raŭndo. Fali./ Bokspilko. Lukto. Pankraco. Haltero. Ŝiri.

Handbalo. Volejbalo (= flugpilkado). Rugbeo : ludata de du trupoj el po dek kvin ludantoj per ovalforma pilkego. Basketbalo (= korbopilko)./ Sketado (pri rapideco)./ Skiado (slalomo). Haltero, halteri.

Teniso (drajvi). Rakedo. Reto./ Tabloteniso./ Serviro. Naĝado : naĝi sur la brusto, flanko, dorso; kontraŭ la fluo, la tajdo, kiel ŝtono.
Plonĝi. Subakva naĝo. Kraŭlo. Sporta plonĝisto. Tuŝi la fundon.
Gimnastiko. Reko./ Skermado : renkontiĝoj./ Spaliero. Ĉevalvetkuro. Ĵokeo. Boatvetkuro. Velvetkuro.

DISKOBOLO : statuo de diskĵetanto.
Olimpikoj (= Olimpiaj ludoj).
Peloto (ĉistero). Pentatlono.

**Notoj :** Dopi (amfetamino, anabolizaj drogoj, ktp.). Revanĉo. Tempokurumo.

## 59 ŜTATO - POLITIKO - LIBERO

*"Pli bone pano sen butero,*
*ol dolĉa kuko sen libero."*

1. Konstitucio. Submeti konstitucion al referendumo./ Rajtoj kaj devoj fiksitaj en la konstitucio.

Estro de respubliko. Prezidento. Prezidentejo. La grandaj korpoj de la ŝtato./ Ambasado. Ambasadorejo. Ambasadoro. Sendi, revoki ambasadoron. Peti aŭdiencon ĉe la Prezidento. Ambasadoro akreditita apud la papo. Akreditivo (= kreditletero). Nuncio./ Konsulo. La ambasadorejo havas rajton de eksterteritorieco.

La leĝodona, ekzekutiva, jurisdikcia povoj. Ekzekutivo. Parlamento (kunvoki, forsendi, eksigi). Parlamentejo. Parlamentano./ Unuĉambra, duĉambra parlamento./ Reprezentata reĝimo. Sistemo de majoritata, de proporcia reprezentado.

Deputito : de ekstrema maldekstro. Mandato de deputito. (Vidu : ELEKTADO)/ La venkinta partio balais la opozicion. La opozicia ĉefo./ Politikaj manovroj.

5. Leĝo : proponi leĝon. Forĵeti amendon. Oni amendis la tri lastajn dispoziciojn. Ĉiu parlamento havas la rajton amendi./ Oni senfine argumentas, kaj neniu konvinkas la alian./ Ĉiun iniciativon pri socialaj leĝoj la konservativuloj kontraŭbatalis./ Burĝe politike kaj sociale konservativaj. Fanatika, blinda ŝovinismo./ Rutina konservatismo.

La opoziciantaro provis obstrukci la baloton de la leĝo. Baloti por, kontraŭ la leĝpropono. Batalo pure politika. La leĝo estis akceptita sen longaj debatoj, sendiskute.

Promulgi leĝon. Klarigi la spiriton de la leĝo. Interpreti leĝon./ Apliko de leĝo./ Nesciado de leĝo neniun pravigas./ Egaleco antaŭ la leĝo./ Leĝo ne havas retroaktivan efikon, pasintaĵon ne tuŝas. Leĝo valoras (validas) por poste, ne por antaŭe. Tiu ĉi leĝo kadukiĝas la antaŭan proceduron./ Baldaŭ aperos la instrukcio pri aplikado de tiu nova leĝo./ Tordi la leĝon./ Leĝo pri familia juro. Tiu kazo estas eksplicite antaŭvidita en la leĝo.

MINISTRO :

Ministeria "skipo". Kabineta ataŝeo.
Difini sian politikon. Prezenti apologion de sia politiko. Iniciati novan politikon./ Fari strutan politikon. Tia politiko defias ĉian difinon./ Interpelacio. Postuli la konfidon de la Parlamento. (Benko de la registaro, en la parlamenta ĉambro). Havi nediskuteblan, nekontesteblan, nedisputeblan aŭtoritaton.

Prospera ŝtato. (Ŝtata deprunto amortizita en 20 jaroj). Akra krizo. Apliki severajn rimedojn al ekonomia kriza situacio. Adaptiĝi al la situacio. Ĝenerala redukto de ĉiuj elspezoj en la nova buĝeto (= budĝeto). Voĉdoni, rifuzi buĝeton. Ekvilibro de la buĝeto. Deficita, plusa buĝeto. Tiu devaluto estigis veran asfiksion de la ekonomio.

10. Disrabi la ŝtatajn financojn./ Abunde venis la protestoj. Fermi strute la okulojn antaŭ la faktoj. Troviĝi vidalvide antaŭ la realo. Distordita prezento de la faktoj. La ciferoj, la faktoj parolas per si mem. Ne ekzistas terno sen nazo nek fakto sen bazo. Ne ekzistas fumo sen fajro.

La danĝereco de la politika situacio. Intrigoj, kiuj ruinigis la aŭtoritaton de la ĉefministro. Sapei ies aŭtoritatecon. Ataki la registaron. Senaŭtoritata registaro.

59 ŜTATO

La politika situacio ne estas brila. La politika horizonto nebuliĝas. Politikaj manovroj. Amasiĝas la obstakloj. Situacio sen eliro. Plena renverso de la situacio. La demisio de la ministraro estas probabla. La kabineto demisiis. Plenumi la kurantajn aferojn.

Debuti en tre malalta posteno. Okupi gravan, eminentan postenon. Intrigi por ricevi postenon. Konkuri kun iu pri vakanta ofico. Ricevi sian nomumiĝon al ia funkcio. Tio ne decas al lia ofico. Konscio pri sia senkapableco. Misuzo de la oficiala potenco. Fraŭdi. Korupti. Nekoruptebla oficisto. Rampi antaŭ potenculoj. Piedleki al superuloj./ La statistiko liveras pri tio elokventan ateston.

POLITIKO : Politika grupo.
Partio klerikala (la trono kaj la altaro), reakcia, modera, demokrata, popoldemokrata, liberala, komunista.

15. Sin okupi pri politiko. Sin dediĉi al politiko. Eniri en la politikan arenon./ Aliĝi al partio per la tuta korpo kaj animo. La bazo, la stabo de partio. Bazaj militantoj. Partio precipe el kadroj, ne amaspartio. Adopti opinion. Resti fidela al siaj principoj. Meti siajn principojn en la naftalinon./ Batali por triumfigi siajn ideojn. Diskuti kun iu pri politiko. Li multe suferis pro siaj opinioj. Libere eldiri sian penson.

Servi sian partion. Unuj servas sian partion, aliaj volas servigi la partion al si./ Ĝui grandan influon. Fidi sian partion. Submeti sin al la plimulto. Diskrediti sian partion per sia privata konduto. Fari publikan sinakuzon, memkritikon, memekzamenon.

Frakcio. Nepacigebla, fanatika opoziciulo, kontraŭulo. Blindigita de partieco./ Kliko./ Frakcia laboro sub la influo de agitantoj, minacanta la unuecon de la partio./ Tiu frakcio estas la marŝanta alo de la partio. Deviacio. Deviaciisto. Renegato. Herezo. Herezulo. Disidento.

Malligiĝi de partio./ La partio ne akceptis lian memkritikon kaj eksigis lin./ Esti eksigita el la partio./ Kruele elrevigita. Perdi siajn iluziojn. Seniluziiĝi. Kruela disreviĝo./ Tio endanĝerigis lian politikan situacion./ En politikaj aferoj pli ofte sukcesas intrigoj ol meritoj./ Politiko ĉion invadas.

ŜTATO 59

Diskurso./ Voĉo de krianto en dezerto. Senkohera parolado./ Komenciĝis diskurso impeta./ Kriegi ĝis raŭkiĝo. Minacaj krioj. Liaj furiozaj paroladoj fanatikigis la amasojn./ Slogano. Siglo. Moto : Proletoj el ĉiuj landoj unuiĝu!

20. DIKTATURO. Diktaturo (de la proletaro). Diktatoro. Despoto. Aŭtokrato. Tirano./ Faŝismo. Sapei la reĝimon (maĥinacio). Esti engaĝita en komploto por renversi la reĝimon./ Decidi areston de komplotanto. Akiri perforte la regadon. Puĉo. Konstitucirompo./ Renversi la plej fundamentajn principojn.

Politiko de forta mano./ Li sinsekve encirkvitigis ĉiujn administraciojn de sia lando./ Teni la regstangojn de la tuta ŝtato.

Senti avidecon je gloro kaj povo. Regno de teroro. Ĵetadi teruron sur la popolon. Teni la popolamason sub la pantoflo. Elporti la ekscesojn de tirano./ Kruele persekuti iun. Tirano fama pro siaj kruelaĵoj./ Subĵeti tutan popolon al sklaveco. "Opresi". Kontraŭ forta mano la leĝo estas vana. Protesti kontraŭ arbitra agado, decido. La oratoroj penis agiti la popolamason kontraŭ...

Likvidi la kontraŭulojn de la reĝimo. Preventa arestado antaŭ la tempo de la manifestacio. Protesti kontraŭ la arbitreco de tiu malliberigo. Kontraŭkonstitucia aresto. La policano admonis la popolamason disiri./ Larmiga gaso, obuso./ Eksploda situacio.

Totalismo. Misuzo de la potenco. La ŝtata racio./ La historio juĝos lin senindulge.

25. Liberaligi la reĝimon. Ŝanĝi la formon de la registaro. Plebiscito.

Kurbiĝi sub la jugo de despotismo. Forskui, deĵeti la jugon. Blovi per la korno de ribelo. Kalcitri./ Ĵus okazis atenco per bombo, kontraŭ la caro.

Agitfolio. La sankta rajto de "Insurekcio". "Insurgento". Kovejo de konspiro. Civila malobeado./ Maŝaro de rezistantoj. Partizano.

Eliri el sub la jugo. Liberigi iun el la ungoj, el la "krifo" de polico.

59 ŜTATO

Abortigi, provoki ribelon, subpremi ribelon por certigi la stabilecon de la reĝimo./ La ribelo eksplodis (senbridigita popolo), subite ekflamis, estis dronigita en sango./ Submeti la ribelantojn. Abortigi revolucion en la sango./ Sanga, paca revolucio./ Sieĝostato.

Morto aŭ libereco. Prefere morti glore ol vivi malhonore. Demando pri vivo aŭ morto.

30. Proskribi. Proskripcio. Deporti. Ekzili. Emigri. Peti azilon ĉe iu. Gulago.

Anonci, deklari ĝeneralan amnestion. Liberigi la arestitojn.

LIBERO : Leviĝi por la defendo de la libereco. Tio restos bela paĝo en nia historio. Retrovi la ĝuadon de libereco. Batali por (pro) la plej elementa homa libereco. La individuaj garantioj (pri la sekureco de ĉiu civitano)./ Atenci la liberecon de la civitanoj./ Pensi libere. Libereco ne povas degeneri en anarkion. (Profiti el senorda situacio)./ Lando de libereco.

Individua, persona, politika libereco. Starigi la liberecon de la kultoj. Libereco de kredo, de la gazetaro (preslibereco), de la penso.

En tempo pasinta ni ĉerpu instruon por tempo venonta./ Kio fariĝis, jam ne refariĝos.
LA BAPTO DE CARO VLADIMIR.

**Notoj :** Politologo.

## 60 TEMPO - HORO - TAGO - JARO

*"Pli bone malfrue ol neniam."*

1. Tempo flugas, forflugas, estas kara, gaje fluas, pasas. Tempon gajni, ŝpari, disipi, disponi, perdi, fordistri, uzi utile, forrabi, akapari. (Tio akaparas mian tutan tempon).

Avara je sia tempo. Vi ŝtelis de mi karan horon. Ne havi tempon por perdi. Ne estas inde perdi tempon por tio.

Tio ne okupas multe da tempo. Tio postulas, bezonas ankoraŭ multe da tempo. Tio konsumas multan tempon.

Tuj de la komenco. Estas jam tempo, ke ni iru. De post

tiu tempo, kiam... En tiu tempo, en la difinita tempo.

5. En la bona malnova tempo. Kio pasis, ne revenos. Ne bedaŭri hieraŭon. Tiu epoko agonias. Stranga estas la tempo, en kiu ni vivas. Kiu fariĝis, jam ne refariĝos. Nuba estonteco. La estonteco apartenas al ni.

Tio estis tiel longatempe antaŭe, ke... Mi konas lin tiel longan tempon, kian povas ampleksi mia memoro.

Anticipi sian epokon. Nun ne estas ankoraŭ tempo por... Prokrastita ne estas perdita. Donu al mi iom da tempo. Atendi ĝis venos tempo pli oportuna.

Ŝparo de tempo. Domaĝi sian tempon. Tempo estas mono. Dividi sian tempon inter diversaj taskoj. Tio ne okupis multe da tempo. Fari uzon el ĉiu momento.

Formeti ĝis la grekaj kalendoj, en la tago de sankta Neniamo, en la triĵaŭda semajno, kiam la kokinoj ricevos dentojn.

10. Estas tempo por ĉio. Por ĉiu faro estas horo./ Estis (tio estis) la unua fojo, ke.../ Ĉiun fojon, ĉiufoje, kiam... Unu fojon por ĉiam. Per unu fojo : solvi ĉion, naski du infanojn... La koko kriis je la tria fojo. Tio estas mil fojojn pli bona. Ankoraŭ unu fojon. Ne pli ofte ol unu fojon en kvin jaroj. La lastan fojon mi vidas lin ĉe vi (= neniam plu revidos lin). La lastan fojon mi vidis lin ĉe vi (eble mi revidos lin ie). Foje. Fojfoje.

HORO : Demandi pri la horo. Kioma horo estas? Havi la ĝustan horon. Solida horloĝo, kiu iras bone, laŭ la minuto, tro frue, fruas, iras tro malfrue.

Rigardi la horon sur sia poŝhorloĝo. Antaŭiĝi je tuta horo. Fruigi, streĉi sian poŝhorloĝon. Akordigi sian horloĝon, kiu malfruas kvin minutojn, kun la hordona aŭtomato de la franca observatorio./ Horloĝo komputas la tempon./

Vi venas en bona horo, frue je la sesa. Alveninta tre ĝustatempe, akurate je la oka. Lasthore, en la lasta minuto, lastmomente. La forkuro de la minutoj. La horoj treniĝas testude, maldiligente, plumbapiede. Trovi la horojn longaj. Estas jam malfrue en la tago. La horloĝo ĵus batis la 12 batojn de noktomezo, ĵus batis la kvaran.

15. TAGO : Kiun tagon de la semajno ni havas hodiaŭ? Lundon. Kiun daton ni havas hodiaŭ? - La dekkvinan de Decembro. Kioman tagon ni havas hodiaŭ? Kiuj estas la datoj de naskiĝo kaj de morto de Zamenhof? (1859-12-15 kaj 14-04-1917).

Dum tutaj tri tagoj (= tutajn tri tagojn). Tago post tago./ Unu belan tagon. Ĉiun duan tagon, ĉiun sesan sekundon./ La hieraŭo, la morgaŭo de Kristnasko. La morgaŭon de lia alveno, mi foriros.

Venontan semajnon. Unu semajnon post la hodiaŭa tago. Li alvenos morgaŭ post semajno (= post 8 tagoj).

Li revenis en la difinita tago./ Tio povas okazi en ĉiu tago.

Tagon tago sekvas sed ne similas./ Ne en unu tago elkreskis Karttago.

20. Agendo.
JARO : la lerneja, la teatra, la buĝeta, la leĝa, la civila. Venonta, pasinta.

Superjaro (= 366 tagoj). Silvestra vespero (316a de Decembro). En la favorjaro 1887... Pasis jam plenaj du jaroj de kiam ni renkontiĝis. (Vidu : AĜO)./ En la tria jardeko de la lasta jarcento.

Unu fojon en ĉiu jaro. En la daŭro de kvin jaroj. De jaro al jaro. Ili ĉiujn tri jarojn (= ĉiun trian jaron) elektas siajn membrojn./ Jaro post jaro.

Dezirante plej bonan jaron al vi. Novjara saluto. Novjaro.

**Notoj :**

## 61 TRAFIKO

1. Reglamento de la trafiko. La intenseco de la trafiko en grandaj urboj. La senco de la trafiko. Unudirekta, cirkla cirkulado. Veturi kontraŭsence en la strato. Atentu la vojon, laŭ kiu vi iras./ Sekvu la sagon. (piktogramo)./
TRAFIKŜILDOJ : vidu en **Praktika Poŝkalendaro** de MONATO, p.89 (1981) kaj p.92 (1982), el kiuj :
zebro-strioj, malpermesita preterpaso, semaforo, mal-

permeso hupi, malpermeso parki, eniro malpermesita por veturiloj (kies radaksa pezo superas la indikitan limon), devojiĝo dekstren malpermesita, ktp.

Blua zono. Parkado malpermesita. Preterpaso malpermesita en tiu strato. "Devanci".

Estas malpermesite staradi : cirkulu!/ La intenseco de la trafiko. Veturiloj ruliĝas sur la strato. La aŭtoj svarmas en la arterioj de la urbo. Regas vigla trafiko. La ĉiam kreskanta trafiko. Fluo de la cirkulado. Ĉizoji. Lasi liberan pason al io./ Maldekstraflanka trafiko. Estas malmulte da trafiko laŭ tiu itinero.

Semaforo : la ruĝa, oranĝa, verda lumo (lumsignaloj)/ Palpebruma lumo./ Doni al iu la verdan lumon.

5. Zebrostria pasejo por piedirantoj. "Prioritato" de dekstra pasrajto, cedodevo.

La antaŭaĵo de via aŭto estas tute difektita. Lia aŭto kroĉis mian bufron./ Pro stranga koincido de cirkonstancoj ... Akcidento./ Jori. Kolizio. Kolizifuĝinto. Karambolo. Kunfrapiĝo de aŭtomobiloj./ Atentu! nebulas en malaltaj lokoj de la vojoj. Veturi trioble pli malrapide./ Veki iun el distreco. Vigli.

La akcidento malfruigis mian alvenon./ La akcidento profunde impresis lin. Impresebla naturo. Li estas tre impresiĝema.

Spekti akcidenton. Troviĝi sur la loko de la akcidento. La kamiono volis krucpasi la aŭtomobilon ne havante la pasrajton.

Suferi akcidenton. Preteratenta akcidento. Alvoki iun kiel atestanton. Alvoki la ateston de ĉiu, kiu...

10. Ambulanco. Brankardo. Sukuri. Reanimado.

La aŭto surveturis du kokinojn kaj unu hundon.

Atribui ies morton al akcidento. Esti renversita de aŭto. Ricevi cerban skuon (komocio).

Endanĝerigi la vivon de piedirantoj per tro rapida aŭtado. Imputi akcidenton al la mallerteco de la kondukanto. Determini la kaŭzon de akcidento.

61 TRAFIKO

Asekuro kontraŭ la akcidentoj, kontraŭ korpodifektiĝoj (poliso, krompoliso).

15. Danĝera, blinda, harpingla ĝirejo. Tro rapide, abrupte preni la ĝirejon. Ĝiri la aŭton. Intermita ĝirlumo de aŭto. "Liva" ĝirado. Turnu "liven" tuj post la angulo.

Kruciĝo de du veturiloj kun "prioritata" vojo. Kruciĝejo. Trefkruciĝo de aŭtovojo.

Kurbiĝo de vojo. Vojfleksiĝo. La fleksoj (= "sinuoj") de la vojo. La vojo oblikvas tra kampoj, serpentumas inter la montetoj.

Delikata, transversa deklivo (= altigo de la pavimo por faciligi la venkon super la centrifuga forto). Dekliva vojsekcio. Milde leviĝanta deklivo. Azendorsa ponto.

Ĉefa, flanka vojo. Akso de vojo. Kruta vojo. Garaĝo. La forko de vojo. La vojo forkiĝas, duiĝas, disbranĉiĝas de la ĉefa ŝoseo. Kubuto de vojo.

20. Grava nodo de trafikvojoj. Ĉe la intersekco de du vojoj. Punkto de kruciĝo de du vojoj./ Preterirejo.

Ni povas per kurba vojo al rekta celo veni. Perdi sian vojon. Trafi la ĝustan vojon./ Vojo barita pro la degelo.

Bloko da veturiloj (tiel multe, ke oni ne povas antaŭeniri). Blokado de aŭtovojo pro kolizio de kamionoj, neĝamaso. La manifestacio blokis la trafikon, la straton. La trafiko obstrukciĝis. Per sistema deviado malobstrukci la centrajn stratojn de la urbo. Granda obstrukco sur strato.

Longdistanca trafiko./ Petveturi.

La kurso de aŭtobuso (vojlinio). Ŝoseo. Kratereto.

25. Asfaltita, makadamita avenuo./ Ŝoseorulilo.
Voj(et)o, pado serpentumas, meandras. Kverpado.

**Notoj :**

## 62 TRINKI - DRINKI

*"Kun kiu vi festas, tia vi estas."*

1. Preni bieron, kafon (kuiri kafon). Trinki akvon el glaso, el kavigita mano. Eltrinki per unu tiro. Havi bezonon trinki. Levi sian glason. Trinki pro ies sano. Kunfrapi, tintigi la glasojn (honore al iu).

Prediki akvon kaj trinki vinon.

Drinki kiel truo, kiel spongo, kiel funelo./ Havi glason troan, iom da vaporo en la kapo. Ebriiĝi de vino. Esti en ebria stato. Ebria kiel lordo, barelo, ĝis falo sub la tablon. Mortebria./ Rulfali sub la tablon. Alkoholemio.

Li esploris la fundon de la glaso. Liaj okuloj iras krucvoje. Dancas al li ringoj antaŭ la okuloj./ Drinkulo kiu brogis al si la intestojn. Ne spirebla atmosfero de drinkejo./ Stardrinkejo. Bufedo.

5. Aresti ebriulon. Sentoksigi drinkemulon.

Drinkado bestigas la homon, bestigas la plej inteligentajn.

Vera opinio montriĝas en ebrio. (En ebrio estas vero). Homo post drinko sin montras sen ŝminko.

Fordoni sin al drinkado. Fordrinki sian monon. Fordrinki sian ĉagrenon. Li komencis dronigadi siajn pensojn kaj sin mem en brando. Fordiboĉi ĉion ĝis la lasta ĉemizo. Fosi al si mem la tombon. Pro la kulpoj de la patroj suferas (pagas) la filoj.

"Ni ebriigu patron per vino kaj ni kuŝu kun li, por ke ni aperigu de nia patro idaron." (Gen. 19/32).

10. Alkoholo. Aperitivo. Brando : ĉeriz-, gren-, terpom-. (Nur unu larmon da brando). Viskio. Fajna brando. Brandfarejo.

Postebrio (kapdoloro). Malebriiĝi./ Etilismo.

**Notoj :**

## 63 VERO - MENSOGO - ASERTI

*"Kiu volas mensogi, devas bone memori."*

1. Vero banala, kristala, pura, nuda, sankta. Mensogo senhonta, impertinenta, malnobla. La veron serĉi, kaŝi, maski, fortordi, diri, elŝeligi.

La vero ĉiam venkas. La tempo malkaŝas la veron. Dronigi ion en silenton. Mortsilentigi ion./ Havi ion kaŝindan. Kio vera, tio vera. Ho! se tio estus vera! Tio estas tro bela por esti vera. Vero kiel la sankta skribo, kiel vorto de profeto.

Diri puran veron. Se diri la veron... Esti malproksime de la vero. Tio estas la vero en sia nudeco./ Mi cedas, ke vi pravas.

Senti kulton por la vereco. Batali por la triumfo de la vero. Mi estas preta preni, rompi la lancon por la vero. La serĉantoj de la vero.

5. Distingi la veron disde malvero. Formi al si juĝon pri io, pri iu. La vero estas multfaceta kristalo. Mi diras al vi nenion alian, ol plej puran veron, krom plej pura vero. Sincere, mi devas diri, ke... Mi devas kun konfuzo konfesi, ke...

Diro de vero estas ofte danĝero. Kaŝado de la vero estas mensogo./ Ĉe tro ĝentila ekstero mankas sincereco. Mieni mielon al iu.

Aplombe, senhonte aserti malveraĵon. Ili akordiĝas por vin trompi. Falsistoj de vero. Ĉe li oni neniam povas esti certa pri io. Li maŝine, senhonte mensogas, kiel kalendaro, kiel gazeto. Li mensogas tiel, ke la muroj krakas. Diri, kulpi mensogojn. Implikiĝi, embarasiĝi en mensogojn. Mensoganto devas havi bonan memoron./ La tero min englutu se mi mensogas. Kiu mensogas per unu vorto, ne trovos kredon ĝis la morto.

Via hezito mem atestas, ke vi mensogas./ "Dupo". Kapti iun ĉe mensogo. Kiu stranga muŝo vin pikas? Jen por unu fojo ŝi diris la veron.

Kalumnii. Disporti kalumnion inter la popolo. Esti alarmita de kalumnia kampanjo. Defendi sin kontraŭ malamiko.

10. Kontesti la verecon de aserto. Dubi pri la vereco de liaj vortoj. Venis la horo diri la tutan veron. La tero min englutu, se mi ne diras veron.

"Folulo" (= malsaĝulo) kaj infano eldiras la veron.

Absoluta certeco. Certe kiel duoble du estas kvar. Pli ol certe./ Citi aŭtoritatulojn por apogi siajn dirojn. Kategorie aserti. Aserto ne estas pruvo./ Senbaza, nekontrolebla, tre diskutebla aserto.

Erara prezento de io. Svarmi de eraro. Amasigi erarojn. Fari krudan, dikan eraron. Kroni eraron per eraro.

Matematika certeo. Sen troigo oni povas aserti, diri, ke... Tio konfirmas mian supozon.

15. Sen ia ajn ombro da dubo. Tio estas eksterduba, ekster dubo. Ne restas loko por iu dubo./ Mi estas certa, ke... Mi ne estas certa, ĉu... Ili certiĝis, ĉu... Oni ne havas absolutan certecon, ĉu... Mi volonte kredas. Li absolute ne volas kredi, ke... Skui senkrede la kapon. Ne kredu al li eĉ unu silabon.

Alporti la pruvon de io. Eksenti dubon kontraŭ aserto. Kia blago! Gluti blagon. Ne tro streĉu la pafarkon.

**Notoj :**

## 64 VESTOJ

*"Pli bone ĉifona vesto, ol riĉeco en malhonesteco."*

1. MODO : Adopti modon./ Vestita laŭ la plej nova modo. Ĝi estas la lasta modo. Modo jam datiĝanta de ok jaroj. Eksmodiĝinta. La modo pri tio jam pasis de longe. Krei, enkonduki, adopti novan modon./

Vestoj de bongusta, eleganta fasono. Strikte fasonita robo. La vestoj bonege sidas al vi. Tiu ĉapelo ne bone sidas. Lastmode, sed komike ĉapelita.

Vesti sin kun gusto. Ŝike vestita. Havi la parizan ŝikon. Vesti sin varme, malpeze. Porti somerajn vestojn.

Vesto tro strikta, kiu ĝenas min. Doni amplekson al jupo per plisado. Fasonita, konfekcia vesto, jako./ Tajlora ŝablono./ Subŝtofi mantelon.

5. Retuŝi la ŝultrojn de konfekcia vesto. Ripari ŝiritan veston. Reversi ĉemizkolumon. Alfliki pecon al pantalono. Fliki truon en la fundo de pantalono. Borderi kolumon. Brodi monogramon. Orli./ Stebi.

Vesto civila, ceremonia, hejma, dimanĉa, ĉifona, dekoltita (robo), bone aspekta.

Kapvestoj : Ĉapelo. Felta ĉapelo, cilindra ĉapelo. Depreni, demeti, levi la ĉapelon antaŭ iu. For la ĉapelon! Tiri la ĉapelon sur la frunton.
Li ventumas al si per sia ĉapelo. Li ne sciis, kion fari pri sia ĉapelo. Pluvo deformis la ĉapelon. Al la ĉapelo donu nur brostiron.

Ĉapo, bereto (vaska ĉapo). Ĉapo de maristo. La "Ruĝa Ĉapeto". Kaskedo. (Viziero). Kapuĉo monaĥon ne faras (= ne juĝu laŭ ekstero).

Ĉemizo supla, amelita, ĉifa. Esti en siaj ĉemizmanikoj. Kuspi siajn manikojn. Refaldi la manikojn ĝis la kubutoj./ Ektiri ies manikon.

10. Jako : eluzita ĉe la kubutoj. Malkroĉi jakon de la kroĉilo. Ĝi pendas de la hoko. Vestarko.

Jupo. Robo. Laŭ la modo, ili longiĝas aŭ mallongiĝas. Ŝi surŝovis la robon levante la brakojn, movante la koksojn. Suprenfaldi sian jupon (por pli bone kuri). Pufa jupo. Ĝisgenua jupo./ Lasi fali sian jupon. Senmanika robo, tre dekoltita, kun ronda, V-forma dekoltaĵo./ Aperturo por la kapo (kolaperturo = koltruo).

Pantalono : du krurumoj, fundo, fendo ("kacujo" familiare!). Pantalono kun malsupra faldo. Pantalono el kvadratita ŝtofo. Kuspi sian pantalonon./ Tiri supren la pantalonon.
Kuloto. Ŝorto. Kalsono. Bikino./ Kombineo.

Kostumo (iri al la preĝejo en sia dimanĉa kostumo).

Piedvesto : Paro da ŝuoj. Du botoj faras paron. Tubo de boto. Gumbotoj./ Lango de ŝuo. Religi la laĉon de sia ŝuo. Marŝi kun truitaj plandumoj. Replandumi botojn. Najlizita ŝuplando./ Farigi al si ŝuojn laŭmezure./ Ŝudorso. Ĉe la botisto la ŝuo estas ĉiam kun truo...

15. Havi sur la piedoj nur ŝtrumpojn. Viaj ŝuoj estu sur viaj piedoj. La ŝuoj ne eltenas la akvon./ "Trivitaj" ŝuoj.

Ŝuojn senkotigi, ŝmiri, ciri, poluri, briligi./ Pikkalkanumoj. Pantoflo. Sandalo. Babuŝo. Galoŝo. Gamaŝo./ Laĉtruo. Ŝtrumpoj : Mi portas silkajn ŝtrumpojn. Lasi fali siajn ŝtrumpojn sur la kalkanojn. Nilonaj ŝtrumpoj. Sekurmaŝaj ŝtrumpoj. Eskalimunaj ŝtrumpoj. Nedismaŝiĝaj ŝtrumpoj. "Bluŝtrumpulino" (fabelo).

Bluzo. Kitelo. Kamizolo. Frako. Jaketo. Pluvimuna mantelo. Jako. Veŝto./ Braktruo. Korsaĵo : dekolta, altkoluma (neĉifebla nilona korsaĵo).
Ĵartelo. Gaino. Mamzono. Korseto.

ŜTOFO : Krepo. Ĉina krepo. Kretono. Bloko da ŝtofo (kiun oni disvolvas antaŭ aĉetantoj).

Prembutono. Zipo.

20. Tekstilaj plantoj, industrioj (ŝpinado, teksado, apreturado)./ Tekstilaĵoj (teksaĵoj, trikotoj, maŝinfabrikitaj trikotoj)./ Dismaŝigi malnovan trikaĵon. Tuko. Sekig-ŝnuro. Tukpinĉilo.

**Notoj :**

## 65 VETERO

*"Aprila vetero - trompa aero."*

1. Vetero frosta, pluva, prema, severa, kota, kaprica, malbela, varia, ŝanĝa, nuba, senvida, seka, hela, venta. Aero sufoka, seka, humida, saniga.

La rigoro, la severo de la vetero./ Debiliga klimato. La vetero ŝanĝiĝas, heliĝas./ Atendi bonan veteron. Transatendi la malbonan veteron.

Laŭ tio, ĉu la vetero estos bela aŭ ne, mi promenos. Li promenas en ĉia vetero. / La bela vetero invitas, logas al promenado.

Scii paroli nur pri la vetero : frua printempo, aŭtuno. Mi vetas kun vi dek frankojn kontraŭ unu, ke morgaŭ pluvos./ La antaŭa semajno estis pli belvetera ol la nuna./ En bela dimanĉo./ Milde kaj varme./ La furiozado de la

elementoj./ Somero de Sankta Marteno. Estis tia vetero, ke eĉ hundon oni ne elpelus. Ŝajnigi fari la veteron. Post vetero malbela lumas suno plej hela.

5. Meteorologio (= meteologio). Meteologo. Meteostacio. Meteobulteno./ Sondbalono. Regiono de malalta aerpremo. La Acora anticiklono. Malproksima, proksima prognozo de la veterstacio. La stacio prognozas ŝtormon por morgaŭ./ Premo atmosfera. Barometro : hidrarga, aneroida.

Temperaturo leviĝas, falas. Somera temperaturo. Kia estas la lego sur la termometro? Termometro montras 2 gradojn super nulo. La gradoj saltis de 8 ĝis 15.

Ondo de granda malvarmo. Tranĉa malvarmo. Frosta, akra, grinca malvarmo, "frido". Pika, pinĉa frosto (= gelo). Malvarmo penetranta ĝisoste.
Frostotremo trakuras lian dorson. Siberia malvarmo. "Fridego". Dentoklaki de frosto. Trafrostiĝi ĝisoste. Ricevi impreson de malvarmo. Ne plu senti siajn piedojn. Por forigi malvarmon : blovi sur siajn fingrojn; batadi sian korpon per brakoj./ Frostoŝvelo (= pernio).

Estas malvarme al mi. Esti tute blua de malvarmo. Frostas al mi en la piedoj. Frostas tie ĉi. Intensa malvarmo. Sensi malvarmon. Sensiva al malvarmo. Severa malvarmo. Skuiĝi de frosto. Friska. Tepida.

Centra hejtado. "Stovo". Agrabla sento de varmo. Estas varme al mi. Teni al si piedojn varmaj. La disperdiĝo de la varmo./ Termobotelo.

10. PLUVO : abunda, densa, konstanta, batanta, kontinua, forta, kvieta, kaprica, senĉesa. Pluvo persistas, ĉesas, torentas, falas torente, rekomenciĝas. Pluvas, pluvas senfine, senhalte. Pluvas kvazaŭ la akvo estus verŝata per siteloj, trogoj, per grandaj, dikaj gutoj./ Diluvo. Pluva vetero. Ŝirmi sin kontraŭ la pluvo. Esti tute malseka. Tramalsekiĝi, malsekiĝi ĝis la haŭto, ĝis la ostoj.

Unu kampo estis pripluvita, kaj la alia ne pripluvita elsekiĝis.
Kreski kiel fungo post pluvo./ Pluvometro.

Nuboj nigraj, grizaj, malaltaj. Nuboj kovras la ĉielon; pendas supre, en aero; vagas sur la ĉielo./ La nuboj kun-

buliĝis en unu solan grandan mason. Granda nubo, eta pluvo. Nimbuso. Kumuluso. Ciruso. Stratuso./

Brumo. Nebulo. Roso (diamantaj rosogutoj). Gelo. Degelo. Hajlo. Grajlo. Glatiso (ŝutado de sablo sur la glatisaj stratoj). Prujno. Tondro : tondra krako; la tondro aŭdigadis brue frapon post frapo. Ĉi tio trafis min kiel tondro. Fulmo : trafita de la fulmo; altan arbon batas la fulmo.

NEĜO : Amaso da, dika tavolo da neĝo. Neĝoduno. Neĝi en grandaj flokoj. Neĝo falas dense, same kiel se da ĝi pluvus. Neĝeroj kirliĝas en la vento. Lavango. Obtuze tondra bruo de lavango. (Lavange kreski). Branĉoj lanugaj de neĝo. Branĉoj falas sub la neĝo.

15. Neĝo kovras teron. Tero estas kovrita de neĝo./ Neĝa blovado. Blanka neĝa sternaĵo. Neĝo vatas la tutan pejzaĝon. Regiono fortranĉita de la mondo dum la tuta vintro. Neĝo brilas, glimas sub la suno. Trabati al si vojon en la neĝo. Ŝoveli irejon en la neĝo. Buboj batalantaj per neĝbuloj. Neĝa homo, neĝhomo. Ruli neĝbulon./ NEĜULINO. Neĝo fandiĝas. Fluidigi neĝon./ Esti pli blanka ol neĝo.

VENTO milda, akra, morda, ŝira, furioza, konstanta, perioda, loka, kvieta, kontraŭa, posta, mara, favora, norda, monta; "ascenda", "descenda" (super deklivo). Aŭtun-ekvinoksaj ventegoj. Vento nordeosta.

Vento blovas de sud-okcidento, sur la kampoj. Direkto. Forto. Skalo de Beauforto (pr.: bofor'). Boforta indico. Anemometro. Ventoflago (= ventokoko). Ĉu la ventoflago turnas sin? Ventoturno./ Ventorozo (al ĉiuj ĉieldirektoj).

Leviĝis aŭtunaj ventegoj. Regis kruda malseka vento. Viviga printempa vento. Veladi ĉe la vento, kontraŭ la vento, antaŭ la vento. Turniĝis la vento./ Ŝtormo furiozas.

20. La vento rulas la nebulon (benko). Nebulo, kiun la vento forrulis. Vento milde lulas la branĉojn. La vento tranĉis glacie. La vento balaas la nubojn. La vento forblovis de mia kapo la ĉapon./ La ĉielo aspektis, kvazaŭ ĝi estus balaita.

Iri kiel la vento (= rapide). Batali kontraŭ ventmuelejoj. Disĵeti la cindrojn de ... al la kvar ventoj.

Li scias de kie venas la vento. Li ŝanĝiĝas kiel la vento.

65 VETERO

Kia vento vin alportis?

Post brua vento, subita silento.

Ĉar li semas venton, ili rikoltos ventegon.

25. Zefiro. Brizo. Blizardo. Siroko. Mistralo. Musono. Tajfuno. Alizeo. Feno. Ciklono. Tornado. Tempesto. Ŝtormo. Uragano. Trombo. Burasko. Eolo.
"LA KVERKO KAJ LA KANO" (Kalocsay).

Tondro. Fulmotondro. Fulmoj kontinue zigzagas./ Li staras kvazaŭ frapite de fulmo.

**Notoj :**

## 66 VIVO

*"Kiu vivos, tiu vidos."*

1. Vivo vegetala, animala; intelekta, morala, privata, publika, pia, familia, intima, idilia, skandala, agoplena, sencela.
Vivi longe, mizere, pensie, emerite, sate, larĝe kaj lukse, laŭtage (= per sistemo de "el mano al buŝo", sen ŝparoj). Vivi izole de la mondo, iele trapele (= hazarde, kiel oni estas trapelata).

Vivi : harmonie inter si; kun iu en granda amikeco; kun iu kiel kato kaj hundo. Vivi duoblan vivon (kun du nomoj ktp), laŭ siaj principoj; laŭ sia naturo; en libera aero. Vivi sola, kun nelega edzino, sub reĝo, en respubliko.

Stari, esti ĉe la aŭroro, en la mezo, ĉe la vespero (la krepusko) de sia vivo.

Meza espero de vivo. Statistiko pri la meza vivdaŭro de viroj kaj virinoj. La supervivo de la plej taŭgaj. La batalo pro la ekzistado. Lukto por la vivo. Instinkto de memkonservado. La plejmulto el ni ne ĝisvivos tiun momenton.

5. Ni estu gajaj, ni uzu bone la vivon. La vivo estas tro valora, ke oni perdu ĝin en disputaĉoj. Por mi komenciĝis nova vivo. Ni uzu bone la vivon, ĉar la vivo ne estas longa. Ŝprucas la vivo. Esti plena de vivo. Ŝiri la rozojn de la vivo. Vidi la vivon kun rozaj koloroj. Vivi inter forno hejtita kaj tablo kovrita, kiel kuko en butero.

Vivi per mizera vivo. La vivtenaj kostoj plialtiĝis. Li ne kuŝas sur lito el rozoj./ Trabati sin en la vivo. Tia estas la vivo. Fari ies vivon peza./ Rakonti sian vivon.

Ŝuldi sian vivon al iu (savinto). Reveni al la vivo. Pagi per la vivo. Tio kostis al li la vivon.

Afero, demando pri vivo aŭ morto./ Vive aŭ morte.

Dediĉi sian vivon al... Aŭskulti la instruojn de la vivo. Oferi sian vivon al la scienco.

10. Li ne vivos pli ol unu tagon. Vivo pendas sur unu fadeno. Perdi la vivon. Forlasi la mondon de la vivantoj. La alia vivo. (Vidu : MORTO).

**Notoj :**

## 67 VOJAĜI - VETURILOJ

1. Entrepreni vojaĝon. Vojaĝi por plezuro. Ekkoni la mondon. Vojaĝi inkognite, sub la nomo "X...". Prezenti sin sub falsa nomo./ Vojaĝi tra la mondo, en la vasta mondo./ Vidi interesajn aferojn. Ligi utilon kun agrablo./ Forvojaĝi por tri semajnoj./ Bagaĝo.

Mia foriro de Parizo al provinco, pro monmanko, per vagonaro, laŭ plej rapida vojo. Mendi sidlokon en aviadilo. Mi ekiros lundon matene. La ekflugo okazos je nul horo kaj dek kvin minutoj./ Signi per la mano al taksio. Jen estas la vojo, iru laŭ ĝi./ Starigi itineron de turisma rond-veturado./ Aŭtoĉaro.

Li donis al mi provizojn por la vojo. Prepari provizojn. Perdi sian vojon./ Ondis seninterrompe ĉeno da veturiloj.

Laca de vojaĝo. Fali de laciĝo./ Esti freŝa post longa vojaĝo./ Ni devis akceli nian revenon hejmen./ Motelo./ Albergo.

5. AŬTOMOBILO : Vidu PIV p.1285 (77 vortoj) kaj p.1274 (12 vortoj). Kia estas la marko de via aŭto?/ Ĉevalpovo (1 ĉv. egalas 75 kgm/s). Kvarcilindra motoro. Kvartakta motoro. Cilindra kapacito de motoro. Ŝoviĝado de la piŝto en la cilindro. Kalamino. Ovaligita motorcilindro. Alezi./ Revizii motoron. Rajpi. Elmeti motoron al provoj.

Gasigi benzinon per karburilo (flosilo, nadlo, aĵuto)./ Karburaĵo.

Ekfunkciigi motoron per kranko.

Aŭtisto. Ŝoforo (= profesiulo).

Direkti, gvidi, stiri aŭton. Doni plenajn gasojn. Haltigi la gasojn. Premi la akcelilon./ Devanci (= preterveturi). Krucpasi. Akceli la peladon de la motoro. Kluĉi. Meti la kluĉilon en la mortan punkton. Trakluĉi la rapidumojn. Pasigi la rapidojn (de la dua al la tria). Reveni de la tria al la dua.

10. Progresiva bremsado. Ĝisbloke bremsi. Bloki la radojn de aŭto./ Streĉi, malstreĉi la manbremson./ Blokita bremso (bremsokablo)./ Sava zono.
Retroirigi aŭton. La aŭto regresas. Ruliĝi senskue. Veturi 30 kilometrojn hore.

Pneŭmatiko (pneŭo) : trapikita, malŝvela, krevinta, "lika". Ripari krevon de pneŭmatiko. Nekrevigebla pneŭo. Remuntado de riparita pneŭo./ Retegi pneŭon./ Vicrado de aŭto.

Panei. Remorki. Trenkablo. Garaĝo. Via aŭto estos riparita morgaŭ matene./ Spindelo de aŭtorado./ Frusparkado. Malfrusparkado. Nesplitebla vitro./ Vendado de anstataŭantaj pecoj por aŭto.

Malŝargitaj baterioj. Ŝargi akumulatoron.

Sidi en la fundo de aŭtomobilo. Ŝanĝi la aŭtomobilon. La kilometra kiomo de la aŭtomobil-komputilo. Aeri. Aertubo./ Senpaga aerado. Aeri aertubon.

15. BICIKLO : Rajdi sur biciklo. Biciklo. Idli (Vidu PIV p.1282)./ Rako por bicikloj.
TRAMO : vicatendi la tramon, vice atendi la aŭtobuson.
SKOTERO. MOPEDO. Motorciklo kun cilindra kapacito de 80 kubaj centimetroj.

TRAJNO : Pasaĝero. Aĉeti bileton por iro kaj reveno. Datstampilo. La limdato de valideco estas 2 monatoj. Zorgu, ke oni stampu viajn rabatilojn ĉe la stacidomo. Rezervi sidlokon en trajno.

Stari ĉe la kajo (alvena, elira).
Urĝiĝu : la trajno vin atendas. La trajno alvenis tro frue, havas negravan malfruon./ Maltrafi. Horaro.

Tiu trajno kursadas nur sabte. Naveta trajno./ Trajno rapida (= rapido), ekspresa, omnibusa, ekstra. Pulmano. Ŝanĝi la trajnon./ Ni pakiĝis en la vagonaro (dense prem-itaj kiel sardeloj en barelo).

Fervoja nodo. Trakforko (frogo)./ Jungi vagonojn al loko-motivo. Nivelpasejo senbariera. Bariero de fervoja nivel-pasejo.

20. Fervojaj signaloj (diskoj, semaforoj). Fermi trakon.
La lokomotivo elreliĝis.
Larĝa ŝpuro, normala ŝpuro (1,435 m) : (traklarĝo), etŝpura trako. Ŝpaloj. Bufro. Bufrobloko. Intervagona balgo./ Boĝio.

Kupeo por nefumantoj. Ne "licas" fumi. Estas malpermes-ate fumi./ Tre plaĉas al mi la blueta fumo de cigaro, (kiu) spiralas./ Oni postulas, ke mi ĉesu fumi./ Asekuro kontraŭ averioj de fervoje transportataj nutrovaroj. Fer-voja avizo pri alveninta pakaĵo.

ŜIPO : vidu PIV p.1289 (52 vortoj).
Lanĉi ŝipon. Lulilo de lanĉota ŝipo. Ĉeesti la bapton de ŝipo. Atesto de navigebleco./ Ŝipekipisto. Kilsono. Pruo, pobo. Tribordo (tribordano). Babordo (babordano). Ferdeko. Pavezo. (Li akceptis la vizitanton ĉe la pavezpordo.)/ Rudro. Rudrostango.
Kajuto. Koridoro de ŝipo. Aksiometro.

Granda ŝipo bezonas profundon. La ŝipo enakviĝas tri metrojn. Mergi. Floslinio.

Eliri el la haveno per trenado. Hisi, malhisi la flagon. Starigi, kuŝigi la maston. Ŝipo kun plene levitaj veloj. Milda impulso de plena velaro. Favora vento blovis la velojn plenaj. Enverguro. Streĉi, mallevi la velojn. Ferli, brajli, rigi, hisi./ Boardi, refi, trampi.

25. Navigi. Determini la punkton de ŝipirado. Kompaso (nadlo). Ŝiplinio. La biro de rifo. Preni siajn birojn. Gvatnesto. Vaĉi (Vigli. Deĵori).

La ŝipo tenis sian kurson norden. Navigado per rekta

vidado, per instrumentoj. Meti la kapuson al Nov-Jorko. Ŝanĝi la kapuson. La ŝipo kuras po 8 nodoj(n).

La ŝipo traplugis, tranĉis la maron. La pruo dividis la ondojn. La ŝipo estis lulata de facilaj ondoj, trenante post si longan ŝaŭman postsignon.

Respondi ŝipon (per salvo, resaluto).

Krozado. La tangado, la ruliĝado de la ŝipo ŝin naŭzis. Kaŝpasaĝero./ La bapto de la linio.

30. Likimuna ŝipmuro, septo. En kazo de difekto de la ŝipo oni fermas la fakmurojn. La ŝipo grave averiis, suferis averiojn pro la ŝtormo. La ŝipo ne plu obeas la direktilon. Ripari breĉon de ŝipkorpo. Ŝoveli la akvon. Ŝkopi. Kalfatri (stupo, sebo, gudro). Doko : seka, flosanta ; ripardoko. La ŝipo tuŝis benkon el roko, el sablo, grundis sur la sablaĵo, kuŝiĝis sur flanko. La ŝipo sinkis sub la okuloj de la konvojistoj, pereis, iris al la fundo, dronis kun homoj kaj varoj (kun homoj kaj musoj), apike alfundiĝis. Levado de grundigita (aŭ : grundinta) boato. Ŝippereo. Pecoj de ŝiprompaĵo. Ŝiprompulo. Ŝipon rompitan ĉiuj ventoj atakas. Vrako. Eksplode pereigi ŝipon.

Ĵeti, levi ankron. Esti, stari ĉe la ankro. Ŝipo ankriĝas. Alligi ŝipon al la kajo./ Transŝarĝi kargon. Loza kargo. Holdo. Davito. Frajti kargoŝipon, trampon. Tiu ŝipo tenas 1000 tonelojn. Kruda, neta tonelaro.

Haveno. Rodo. Varfo./ Buo, lumhava buo. Kajo. Moleo./ Bolardo. Bito. Vinĉo./ Eklipsa lumturo. Lumturo kun intermitaj ekbriloj.

Kaperi./ Marhundo (hardita, maljuna maristo). Maristo. Ĉapo de maristo.

35. "AVIO" (aviadilo). Vidu PIV p.1286 (14 vortoj). Aerlinio. Stevardino./ Ricevi sian aerbapton. Ĉarti (ĉarto). La kurso de kurieraviadilo./ Aviadilo kun fluga aŭtonomio de 4 horoj./ Provizi aviadilon per benzino dum flugado. Reakciaviadilo./ Helico kun variigebla paŝo. Supersona aviadilo. Flugi je 2, 3 maĥoj (sonmuro).
Enverguro. Aloj. Planeoj.

Jeto./ Fuzelaĝo./ Hangaro.

Aerobatiko (aviadilaj akrobataĵoj). Vidu : MILITO.
Aermalsano./ Aerkavo (Aertruo) : loko de maldensa aero.

Flughaveno. Aerodromo. Kurejo./ Balzo.

Kraŝi. Esti trafita en akcidento de aviadilo.

Glisilo. (Sori. Svebi)./ Orbiti./ Simulilo de flugado.

**Notoj :** Blinda flugado. Funikularo.

# ENHAVO

"Abelo" : 12/24 = vidu ĉapitron 12 kaj en ĝi la § 24.


abelo : 12/24
aboni : 22/18
adiaŭ : 55/13
* ADMONI : 1
advokato : 24/25
* AFERO : 2
afranko : 34/7
* AGI : 3
* AGRIKULTURO : 4
* AĜO : 5
akcepti : 55/4-6
akcidento : 61/6
aktoro : 57/4...8
akuŝi : 45
akuzi : 24/16-20
* AKVO : 6
ambicia : 21/3
* AMI : 7
* AMIKO : 8
amiko(mal) : 8/6
* AMORO : 9
* ARBO : 10
* ARMEO : 11
armistico : 42/25
artiklo : 27/4
artikolo : 22/11
artisto : 50/14
asekuri : 4/10
„ : 61/14
aserti : 63/12
atesti : 24/11-21
aŭdi : 48
aŭskulti : 31/12
aŭto : 67/5
avio : 67/35

baloti : 18+29/16
banurbo : 31/16
batalo : 42/8...15
bazaro : 27/6
bebo : 19/1-2-5
bela : 7/6 + 9/5
* BESTOJ : 12
biblio : 36/10+52/16
biblioteko : 35/11
biciklo : 67/15
bieno : 4/9
* BLEKOJ : 13
bono : 20/25
borso : 27/18
bovo : 12/2
brako : 39/9
bruo : 13
buĝeto : 59/9-10
buŝo : 30/6
butiko : 27/10

cenzuro : 22/15
certa : 63/11
cirko : 57/24

ĉapelo : 64/7-8
ĉasi : 12/1
ĉasta : 9/15-17
ĉemizo : 64/9
ĉevalo : 12/3
* ĈIELO : 14

danki : 55/10
delikto : 24/2
dento : 30/7
deputito : 18/7
„ : 59/4
deserto : 40/26
deziro : 7/7 + 9/2
diablo : 52/25
digesti : 40/32
diktatoro : 59/20...
* DIMENSIO : 15
dio : 52/8...11
diskuto : 29/7-13
distanco : 15
divorco : 17/16
doloro : 31/1-2-3
domo : 37/1...5
* DORMI : 16
dorso : 30/9
drinki : 62
droni : 6/15
dungi : 32/11

* EDZO : 17
ekzameno : 33/15-16
ekzekuti : 24/31-33
elefanto : 12/8
* ELEKTADO : 18+29/16
elektro : 56/4
eraro : 63/13
Esperanto : 36/6
espero : 20/11...17

* FAMILIO : 19
famo : 49/9
febro : 31/4
* FELIĈO : 20
feliĉo(mal) : 20/5...

fenestro : 37/13
festoj : 52/20
fianĉo : 17/2
* FIERA : 21
filo : 19/4-5-8
fingro : 39/10
fiŝi : 6/17
fiziko : 56/2
flegi : 31/23
flirti : 9/4
fojo : 60/10
foto : 56/3
fraŭlo : 17/1
frosto : 65/7
frukto : 4/22
frunto : 30/2
fulmo : 65/14
futbalo : 58/4

gasto : 55/6
* GAZETO : 22
geometrio : 25/35
gloro : 21/5
gorĝo : 30/10
grundo : 4/1-2
ĝardeno : 4/21

haroj : 30/17
haŭto : 30/16
hejmo : 37/14
hejti : 37/19+65/9
heredi : 43/18...
horo : 60/11...
horto : 4/22
humila : 21/10
hundo : 12/10

imposto : 53/9
infano : 19/1
inteligenta : 33/3-6
instrui : 33/8-10
* INSULTOJ : 23
inundo : 6/7
iri : 51/9-11
Ĥaribdo : 20/21

jaro : 60/21
juĝi : 24/10-11
juna(mal) : 5/5-6
jupo : 64/11
* JUSTICO : 24

ĵaluza : 17/14
ĵuri : 17/13

* KALKULO : 25
kalumnii : 49/9+63/9
kamelo : 12/12
kameno : 37/20
kanti : 44/17-20
kapo : 30/1
* KARAKTERO : 26
kartoj : 38/8-13
katedralo : 52/15
kato : 12/13
kemio : 56/1
kino : 57/15...23
kiso : 7/10+30/6
koiti : 9/9
koko : 12/22
kokri : 17/15
kokso : 30/12
kolero : 26/7...13
kolo : 30/10
* KOMERCO : 27
* KOMPAROJ : 28
kompato : 20/14
kondolenco : 43/15
konduto : 33/7
* KONGRESO : 29
konstitucio : 59/1-2-3
konversacio : 49/4
koro : 30/14
* KORPO : 30
krimo : 24/3-14...
kulpo : 24/16-19
kultivi : 4/3-4-5
* KURACI : 31,
kuracilo : 31/16-18
kuraĝo : 42/9
kvanto : 25

* LABORO : 32
larmo : 54/10
legi : 35/10
legomo : 4/20
leĝo : 59/5-7
* LERNI : 33
* LETERO : 34
libero : 59/32
* LIBRO : 35
ligno : 10/5
* LINGVO : 36
lipo : 30/6
lito : 16/9-10
* LOĜI : 37
lui : 37/17
* LUDI : 38
lukri : 32/10
luno : 14/12
lupo : 12/15

magazeno : 27/10
malsano : 31/7-25
* MANO : 39
* MANĜI : 40
maro : 6/11

marŝi : 51/9...
medikamento : 31/18
* MEMORI : 41
mensogo : 63/7+1/1
menuo : 40/17
merkato : 27/14
meteo : 65/5
mieno : 30/8
* MILITO : 42
ministro : 59/8
mizero : 20/10
modo : 64/1
mono : 53/5...
monumento : 41/6
* MORTO : 43+24/28
* MUZIKO : 44

* NASKI : 45
nazo : 30/3
neĝo : 65/14
nokto : 14/18+16/7
nombro : 25
noto : 33/6
nubo : 65/12

oficisto : 59/13
* OKULO : 46
* OPERACIO : 47
opinio : 22/1...6
" : 29/10-11
oratoro : 49/17-18
" : 59/19
* ORELO : 48
orkestro : 44/26...
osto : 30/13
ovo : 12/22 + 40/22

paco : 42/30...
pantalono : 64/12
pardoni : 1/8+8/7
* PAROLI : 49
parolado : 49/17
" : 59/19
paraŝuto : 42/17
partio : 59/4-14...
pasio : 9/1
patro : 19/8
patrino : 19/1-6
peĉo : 20/10
pedagogio : 33/10
peko : 52/16
* PENTRI : 50
persekuti : 24/15-22
" : 59/22
piano : 44/13-14
* PIEDO : 51
pigra : 32/7-8
planedo : 14/17
plano : 3/2
" : 57/21
plendi : 24/6+20/13

plori : 54/6
pluvo : 65/10
politiko : 59/14...
pordo : 37/8

radiofonio : 56/5
raketo : 14/12
" : 11/19
rasismo : 7/16
recepto : 31/14
" : 40/28

* RELIGIO : 52
restoracio : 40/9...
ribelo : 59/26...
* RIĈA : 53+46/10
riĉa(mal) : 20/7-9
* RIDI : 54
rigardi : 46/2...
rikolto : 4/7
rivero : 6/5
romano : 35/4-5

* SALUTI : 55
sano : 31/33
sano(mal) : 31/7...
" : 31/25
sango : 30/15
* SCIENCOJ / 56
sekreto : 49/10
sekto : 52/3
sensoj : 30/18
silenti : 49/10...
skulpti : 50/13
soldato : 11/1...
solfeĝo : 44/5-10
* SPEKTAKLO : 57
* SPORTO : 58
stelo : 14/14
stilo : 35/1-2-3
studento : 33/12...
stulta : 1/3+33/3
striko : 32/12
suferi : 31/3-5
suno : 14/3...
superstiĉo : 52/4
svati : 17/2

ŝafo : 12/18+13/1
ŝako : 38/16-17
ŝerco : 26/12
ŝipo : 67/23

* ŜTATO : 59
ŝteli : 24/4-7
ŝuldi : 20/8-9
ŝultro : 30/11
ŝuoj : 64/14...

tablo : 40/13-15-30
tago : 60/15
teatro : 57/2-13
telefono : 34/13
televizio : 56/6
temperaturo : 65/6-7
* TEMPO : 60
* TRAFIKO : 61
trajno : 67/16
tribunalo : 24/6-7...
* TRINKI : 62
trista : 20/19-23
trunko : 30/9

urbo : 37/21
urso : 12/20+14/14

vadi : 6/9
vagabondo : 20/27
vana : 32/14
vango : 30/2
varma(mal) : 65/7
veki : 16/8
venĝi : 8/8
* VERO : 63
verki : 35/2
* VESTOJ : 64
* VETERO : 65
vino : 4/16
violono : 44/12-27
virga : 9/16-18
virto : 1/6+9/19
vito : 4/13
* VIVO : 66
vizaĝo : 30/8
volupto : 9/7
* VOJAĜI : 67
vulpo : 12/21
vundi : 42/10+47/10

*En la sama serio* :

## Lentaigne : TIEL DIRU !

**"Tiel diru!"** sin turnas al franclingvanoj.
Sed povas ĉerpi el ĝi ankaŭ alilingvanoj.
**"Tiel diru!"** estas kvazaŭ suplemento al **Kiel diri?**
Ambaŭ enhavas ĉirkaŭ 5000 esprimojn. Se oni konsideras, ke 1000/2000 troviĝas en la du libroj, kiu posedas **Tiel diru!** kaj **Kiel diri?** disponos pri ĉ. 8000/9000 malsimilaj esprimoj.
(128 paĝoj, 25 FF)

Mendojn sendi al : Cercle amical esp. de l'Agenais
F - 47340 Laroque Timbaut, pĉk : 3371 74 M Bordeaux.

## ĈEFAJ IDEOJ


| | |
|---|---|
| Admoni | 1 |
| Afero | 2 |
| Agi | 3 |
| Agrikulturo | 4 |
| Aĝo | 5 |
| Akvo | 6 |
| Ami | 7 |
| Amiko | 8 |
| Amoro | 9 |
| Arbo | 10 |
| Armeo | 11 |
| Bestoj | 12 |
| Blekoj | 13 |
| Ĉielo | 14 |
| Dimensio | 15 |
| Dormi | 16 |
| Edzo | 17 |
| Elektado | 18 |
| Familio | 19 |
| Feliĉo | 20 |
| Fiera | 21 |
| Gazeto | 22 |
| Insultoj | 23 |
| Justico | 24 |
| Kalkulo | 25 |
| Karaktero | 26 |
| Komerco | 27 |
| Komparoj | 28 |
| Kongreso | 29 |
| Korpo | 30 |
| Kuraci | 31 |
| Laboro | 32 |
| Lerni | 33 |
| Letero | 34 |
| Libro | 35 |
| Lingvo | 36 |
| Loĝi | 37 |
| Ludi | 38 |
| Mano | 39 |
| Manĝi | 40 |
| Memori | 41 |
| Milito | 42 |
| Morto | 43 |
| Muziko | 44 |
| Naski | 45 |
| Okulo | 46 |
| Operacio | 47 |
| Orelo | 48 |
| Paroli | 49 |
| Pentri | 50 |
| Piedo | 51 |
| Religio | 52 |
| Riĉa | 53 |
| Ridi | 54 |
| Saluti | 55 |
| Sciencoj | 56 |
| Spektaklo | 57 |
| Sporto | 58 |
| Ŝtato | 59 |
| Tempo | 60 |
| Trafiko | 61 |
| Trinki | 62 |
| Vero | 63 |
| Vestoj | 64 |
| Vetero | 65 |
| Vivo | 66 |
| Vojaĝi | 67 |


******************

Imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque Timbaut